


# EL POPOLA


中國報道

7 1982

# ĈINIO







# Moroj de la mjaŭ-a nacieco

Fotoj de WANG SHOULIANG

La mjaŭ-a nacieco nombranta pli ol 3.9 milionojn da homoj estas ĉina naciminoritato kun kompare granda loĝantaro. Pli ol duono de la mjaŭ-oj vivas en Guizhou-provinco, kaj la ceteraj en la provincoj Yunnan, Hunan kaj Sichuan kaj en la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. Pro la disa loĝado ili havas siajn proprajn trajtojn en lingvo, kostumoj kaj moroj. La vilaĝoj de mjaŭ-oj en Guizhou pliparte troviĝas sur montdeklivoj. La domoj estas faritaj el ligno kaj tiuj konstruitaj apudmonte havas sian originalecon. La mjaŭ-oj prenas rizon kiel sian ĉefan manĝaĵon. Ili ŝatas drinki. Ĉiu familio faras alkoholaĵon. Kiam venas gastoj la mjaŭ-oj regalias ilin per alkoholaĵo kaj amuzas ilin per kantado. En festo la mjaŭ-aj virinoj portas brilkoloran jupon kun diversaj belaj desegnoj. Krome, ili portas ankaŭ arĝentajn ornamaĵojn sur siaj haroj, kolo, brusto kaj dorso. La mjaŭ-a popolo ŝatas kanti kaj danci. La luŝengo el ses bambuaj tubetoj estas ilia populara muzikilo. La plej granda luŝengo havas longecon de ses aŭ sep metroj kaj la plej malgranda nur de duonmetro. En la tradicia luŝenga festivalo la vilaĝanoj en belaj vestoj gaje dancas, ludante diversspecajn luŝengojn.



Mjaŭ-aj knabinoj en belaj vestoj

Brodado








Mjaŭ-oj apud rivereto

Regalo al gastoj per vino

Maljuna metiisto faras arĝentan ornamajon







En luŝenga festivalo

Danco kun luŝengoj ludataj



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

**SUR LA KOVRILO:**

La 97-jara Wu Tunan estas membro de la Pekina Instituto pri Kulturo kaj Historio kaj vicprezidanto de la Pekina Luktoarta Asocio. Li bone konas la sekreton de longa vivo.

Foto de **YAN ZHONGYI**

**SUR LA DORSKOVRILO:**

Birdo en Bambuaro (Ĉinstila pentraĵo)

de **XU SHAOQING**

**KOLORAJ SERIOJ:**

Moroj de la mjaŭ-a nacieco

Kvar sezonoj de Changbai-montaro

Fotoj pri Naturaj Belaĵoj Faritaj de E-istoj

Ĉinaj Pladoj

Kajtoj

Zhengzhou

**NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:**

Ĝojo kaj plezuroj de maljunuloj


Ĉinaj Esp-istoj

Festaj lanternoj de Quanzhou

**Enhavo**

MIA VIVO: Post mia emeritiĝo . . . . .	2
Maljunuloj prizorgataj . . . . .	4
Pacienca flegado al la patrino . . . . .	8
NIA KULTIVEJO: Cai Yuanpei kaj Esperanto . . . . .	10
Zamenhof kaj Litovio . . . . .	12
Hazarda renkontiĝo . . . . .	14
SUR NIA LIBROBRETO . . . . .	15
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	16
Vojaĝo tra la Meza Baseno de la Flava Rivero (4): En Zhengzhou kaj Huayuankou . . . . .	19
Sekreto en gajno de krono . . . . .	22
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	18
VIDINTAJ LOKOJ: En la natur-rezervejo de Changbai- montaro . . . . .	24
Darvino — scienca koloso . . . . .	27
Ŝekspiro en la hodiaŭa Ĉinio . . . . .	30
Jadskulptisto . . . . .	35
Rara besto — la granda pando . . . . .	38
5000 JAROJ DE ĈINIO: La ekonomio en la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj . . . . .	42
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Luŝeng- festivalo . . . . .	45
Belgio, gastiganto de la 67-a UK . . . . .	48
AMIKECO . . . . .	33
TRA LA MONDO: Monumentoj al bestoj; Bovofaligado en Venezuelo; Enigmo de kolosaj bildoj . . . . .	34
ĈINAJ PLADOJ: Miksita plado . . . . .	27
INTER NI . . . . .	50
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	41





# Post mia emeritiĝo

de NI GUANGXING

Antaŭ sia emeritiĝo la aŭtoro estis dokisto de la Ŝanhaja Haveno. Li havas 68 jarojn. Lia 56-jara edzino Chen Gendi estis laboristino de la Silkteksa Fabriko de Sanhajo. Ili loĝas en duetaĝa domo apud la Ŝanhaja Fervoja Stacio. Ankaŭ iliaj du filoj kaj du filinoj estas laboristoj.

— LA RED.

Mi fariĝis dokisto, kiam mi estis 17-jara, kaj laboris 38 jarojn. En 1970, kiam mi atingis la aĝon de 55 jaroj, mi emeritiĝis. Laŭ la ŝtata difino viro, kiu atingis la aĝon de 60 jaroj, kaj virino, kiu atingis la aĝon de 55 jaroj, rajtas emeritiĝi. Sed la dokistoj rajtas ekĝui sian emeritecon en la aĝo de 55 jaroj. De 1960 ĝis 1980 emeritiĝis pli ol 1 500 dokistoj en nia tria laborsekcio de la Ŝanhaja Haveno. Nun la nombro de emeritoj en Ŝanhajo atingis milionon.

Ĉiumonate mi ricevas de la ŝtato 63 juanojn kiel pension, t.e. sepdek procentoj de mia salajro. Mia edzino ricevas 60.7 juanojn. Niaj pli junaj filino Qiaofeng kaj filo Xuehai loĝas kune kun ni. La filino havas monatan salajron de 45 juanoj kaj la filo de 39 juanoj. Per tiu sumo ni bone vivas. Dekkalkulinte la pagojn por

manĝaĵoj kaj vestoj, ni havas ĉiumonate kelkdek superfluajn juanojn, kiujn ni deponas en banko por la estonta geedziĝo de miaj gefiloj kaj aliaj urgaj bezonoj.

Kuracado por emeritoj estas senpaga. Antaŭ mia emeritiĝo ni ricevis kuracan servon en la Hospitalo de la Ŝanhaja Haveno. Nun ĉiuj malsanulejoj en Ŝanhajo malfermas sian pordon al ni emeritoj. Antaŭ kelkaj jaroj mi suferis de ŝultra ostosprono. Post kuracado en Longhua-hospitalo, kiu ĝuas renomon en kuracado de ostaj malsanoj, kaj preno de pli 100 dozoj da herbodrogoj mi tute resaniĝis.

La administrantaro de la Ŝanhaja Haveno tre zorgas pri ni emeritoj kaj ofte sendas demandi pri nia vivo. Se ni havas malfacilojn, ili tuj nin helpas. Okaze

de festoj mi estis ofte invitita al tekunveno aranĝita de nia entrepreno. Kiam okazis en la haveno kongreso de laboristoj kaj oficistoj, mi ĉeestis ĝin kiel reprezentanto de la emeritoj. En la kongreso mi povis informiĝi pri la laboro en la haveno, rimedoj por plibonigi la laboristan vivon kaj kritikoj kaj proponoj de la reprezentantoj rilate al la laboro de la entrepreno. Dank' al tio mi bone konas nian entreprenon, kvankam mi emeritiĝis.

Iom pri mia ĉiutaga vivo. Mi kutimas ellitiĝi frumatene kaj iom promeni en parko, kie mi ankaŭ faras gimnastikon. Kiam mi havas gajan humoron, mi iras al la fervoja stacio por rigardi tiean ardan laboron. Ŝanhajo estas granda ĉina urbo kun plej multa loĝantaro kaj la stacio ĉiutage akceptas kaj forsendas cent milojn da pasaĝeroj. Se



iuj el ili demandas min pri vojo, mi kun plezuro ilin helpas.

Mi ŝatas bredi fiŝojn kaj kulturi florojn en potoj. En mia akvario naĝas verdkapaj, ruĝkapaj kaj blankkapaj orfiŝoj kaj ankaŭ diversaj tropikaj fiŝoj, kaj en miaj florpotoj kreskas narciso, begonio kaj orkido. Mi ankaŭ havigis al mi kuriozajn ŝtonojn el Huangshan-monto, unu el la famaj ĉinaj pitoreskejoj, kaj faris el ili diversajn artajn montetojn, en kies fendoj mi plantis florojn. Jen kreigis belaj miniaturnaj pejzaĝoj.

Posttagmeze ni emeritoj vizitas unu alian kaj ludas ŝakon aŭ kartojn. Se mi ne volas eliri, mi legas hejme. Mi havas klerecon nur de elementa lernejo, pro kio mi mendis la ĵurnalojn "Liberigo" kaj "Junularo" kaj la gaze-

tojn "Fenestro al la Mondo", "Kulturo kaj Vivo", "Juna Generacio", "La Popola Filmo" kaj "Filmaj Rakontoj", per kiuj mi povas scii nemalmultajn aferojn en kaj ekster la lando.

Apenaŭ fininte vespermanĝon je duono post la sesa, ni komencas rigardi televidajn programecojn, inter kiuj la internaciaj novaĵoj plej interesas min, ĉar dank' al ili mi povas informiĝi pri gravaj aferoj de la mondo.

Mia edzino zorgas ĉiujn hejmajn laborojn. Ŝi estas iom babilema, sed lerte kuiras. Ĉiu vespermanĝo estas tre abunda, ĉar tiam revenas niaj gefiloj post la laboro.

Mia pli aĝa filo Xuejiang laboras en gubernio de Anhui-provinco centojn da kilometroj for de Ŝanhajo. Li jam edziĝis, kaj li


kaj lia edzino vizitas nin dufoje jare. Ankaŭ mia pli aĝa filino Qiaoyun edziniĝis. Ŝi laboras en Ŝanhajo kaj loĝas ne ĉe ni. Merkrede ŝi kaj ŝia edzo ferias kaj vizitas min. En la Printempa Festo ili ĉiuj venas al ni por kune pasigi la feston. Mi ankoraŭ ne havas genepojn, tamen baldaŭ miaj filino kaj bofilino naskos infanon, kaj tiam mi havos plian ĝojon ludi kun la beboj.

Mi havas notlibron, sur kiu mi registris la nomon, aĝon kaj adreson de pli ol 1 500 dokistoj de nia laborsekcio. En libertagoj mi biciklas aŭ veturas per aŭtobuso por viziti ilin. En la pasintaj jaroj mi jam vizitis 600-700 el ili. Malsamajn ŝatokupojn ili havas, tamen ili ĉiuj vivas feliĉe kaj kontente.

*En parko*



*"Ankaŭ tio estas mia ŝatokupo."*



# LA PROJEKTO DE LA REVIZIITA

EN la fino de aprilo estis publikigita "La Projekto de la Reviziita Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko", kiu estis aprobita de la Komitato por Revizii la Konstitucion. La Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso decidis publikigi kaj prezenti ĝin al la tuta popolo por diskuti. La Komitato por Revizii la Konstitucion revizios surbaze de la diskutado kaj prezentos ĝin al la ĉi-jare okazon-

ta Tutlanda Popola Kongreso por ekzameni.

Post sia fondiĝo la Ĉina Popola Respubliko publikigis sinsekve tri konstituciojn en 1954, 1975 kaj 1978. La nuna projekto estas kompare pli malsama enhave al la konstitucio de 1978 kaj konservas iujn artikolojn de la tri konstitucioj, kiuj estas ankoraŭ taŭgaj por la nuna situacio. Ĝi difinas:

Restarigi la postenon de prezidanto de la Ĉina Po-

pola Respubliko, kiu reprezentas la ŝtaton en ĝiaj enlandaj aferoj kaj ĝiaj rilatoj kun aliaj landoj;

Ekspansiigi la funkciojn kaj povojn de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, kiu rajtas ellabori leĝojn kaj dekretojn kaj kontrolas la praktikadon de la konstitucio;

Starigi la Centran Militan Komisionon de la Ĉina Popola Respubliko, kiu

XIAO LIN:

## Maljunuloj prizorgataj

*En Ĉinio la vivo de senhelpaj maljunuloj estas bone aranĝita de popola registaro kaj zorgata de la tuta socio. Plejparto de la senhelpaj maljunuloj, kiuj perdis laborkapablon, estas vivtenata kaj feliĉe pasigas siajn lastajn jarojn. Tiu ĉi artikolo konigas al niaj legantoj kelkajn ekzemplojn, per kiuj ili povas scii, kiel vivas senhelpaj maljunuloj de Ĉinio.*

LA RED.

Aŭguste de 1980 en ĉinaj ĵurnaloj aperis, unu post alia, artikoloj pri Zhang Xiangling, kampanano de la brigado Tunli de Raoyang-gubernio, Hebeiprovinco, kiu bone prizorgis sian bopatrino dum 40 jaroj. Ŝia faro profunde kortuŝis mezlernejaninon Bian Tingmin de Changshan-gubernio, Shandong-provinco. Ricevinte la konsenton de siaj gepatroj, frato, fratino kaj bofratino, ŝi skribis

al Zhang Xiangling kun la peto, ke tiu ĉi prenu ŝin kiel sian filinon, kiu prizorgos la tri maljunulojn de la familio Zhang. Leginte la leteron, la 60-jara Zhang Xiangling ĝojplene diris al sia edzo Li Hengli: "Al nia familio ne mankas manĝaĵoj nek vestaĵoj, sed nur infano. Nun estas feliĉe, ke ni ekhavas filinon, kiu venos de pli ol 500 kilometrojn malproksime." La 86-jara bopatrino estis tute ekster si de ĝojo

kaj urĝis Xiangling doni respondon al la mezlernejanino por frue ŝin venigi.

Post plenumo de ĉiuj necesaj preparoj Bian Tingmin venis al la familio de Zhang Xiangling en majo 1981.

Dum la pasinta pli ol unu jaro ŝi, prenante Zhang Xiangling kiel ekzemplon, prizorgis ŝin, sian edzon kaj ŝian bopatrinojn. Matene ŝi alportis kuiritaĵojn



# KONSTITUCIO DE ĈPR PUBLIKIGITA

gvidas la armitajn fortojn de la tuta lando;

Praktiki la sistemon de persona respondeco de la ĉefministro en la Ŝtata Konsilantaro. La partoprenantoj de la Konstanta Kunveno de la Ŝtata Konsilantaro estas la ĉefministro, du ĝis kvar vicĉefministroj, la ŝtataj komisiitoj kaj ĝenerala sekretario de la Ŝtata Konsilantaro. La Ŝtata Konsilantaro starigos kontrolan institucion, kiu memstare plenumos la kon-

troladon al la financa enspezo kaj elspezo de la ŝtato laŭleĝe;

En la ĉina kamparo estos reestablita la sistemo de subdistrikaj administraj unuoj kaj la popola komunumo estos nur kolektiva ekonomia unuo kaj la registara administracio kaj ekonomia administracio de la popola komunumo estos apartigitaj.

En la projekto de la nova konstitucio krom An-

taŭparolo, estas ankaŭ kvar ĉapitroj pri Ĝeneralaj Principoj, Fundamentaj Rajtoj kaj Devoj de Civitanoj, Strukturo de la Ŝtato, kaj pri Nacia Flago, Nacia Emblemo kaj Ĉefurbo. La tuta teksto enhavas sume 140 artikolojn.

En la Antaŭparolo estas klare difinite, ke en la estonteco la fundamenta tasko de la ĉina popolo estos plenergie fari konstruadon de la socialisma modernigo.

ovojn al la avino; por ke la avino pli facile manĝu akvomeleonon, ŝi per kulero elprenis ĝian karnon kaj metis ĝin kune kun sukero en bovlon; ĉe manĝado ŝi unue metis po unu bovlon da rizajo antaŭ ĉiun maljunulon. Krom ĉio ĉi, ŝi ankaŭ partoprenis en la produktado de la brigado. La pasintan aŭtunon ĉiu familia ano ricevis 250 kilogramojn da greno, kaj la tuta familio centojn da juanoj. Laŭ ŝia propono la familio konstruis domon kun kvar ĉambroj. Nun ŝi jam fariĝis la familia mastrino.

Ŝia kortuŝa faro sensaciis en la kamparo de Hebei-provinco kaj estis disaŭdigita ĉie en la tuta lando. Ŝi ricevis centon da leteroj el ĉiuj partoj de la lando. Iuj laŭdis ŝin, aliaj esprimis sian deziron lerni de ŝi kaj triaj demandis, por kio ŝi tion faris. Ŝia respondo estis: "Kiam mi skribis al Zhang Xiangling, en nia lernejo okazis eduko pri la signifo

de la homa vivo. Mi estas konvinkita, ke la homo vivas por feliĉigi aliajn. Se ĉiuj vivus nur por si mem, luktus unu kontraŭ alia, kaj forpuŝus kaj malamus unu alian, ili ne vivus trankvile nek feliĉe."

Informite pri ŝia faro, la 75-jara emerita vendisto Wang Zengwu interkonsiliĝis kun sia 70-jara paralizita edzino He Shu-

zhen kaj skribis al la redakcio de la ĵurnalo "Xi'an Wanbao", esprimante sian deziron havi filinon. Post aperigo de lia letero en la ĵurnalo, pli ol 600 knabinoj kaj pli ol 80 knaboj el 14 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj skribis al li, esprimante sian deziron vivteni lin kaj lian edzinon. Kaj krome, 25 familioj letere esprimis sian deziron viv-

*Bian Tingmin,  
Zhang Xiangling  
kaj ties edzo kaj  
bopatrino*



teni la maljunajn geedzojn en sia hejmo. Lernantinoj de la najbara Higiena Lernejo de Xi'an sendis reprezentanton, kiu esprimis al la geedzoj, ke ili ĉiuj volas fariĝi iliaj filinoj. Fine la geedzoj elektis lernantinojn de la lernejo kiel siajn filinojn. Ekde la 30-a de decembro pasintjare po tri lernantinoj ĉiutage prizorgas la geedzojn en ties hejmo.

### DUONPARALIZITA MALJUNULINO REAKIRIS IRKAPABLON

Jam pasis 14 jaroj de kiam loĝantoj de la strato "Popolo" en la urbo Baoji, Shaanxi-provinco, komencis prizorgi la maljunan vidvinon He Guiying. En 1968 ŝia edzo mortis, pro kio ŝi tiel ĉagreniĝis, ke ŝi duonparaliziĝis. Informiĝinte pri tio, la najbaroj venis flegi ŝin. Pluraj virinoj alterne prizorgis ŝin dum vico da monatoj. Post tio, preskaŭ ĉiu

familio sur tiu strato laŭvice prizorgis ŝin kaj faris por ŝi dommastrumadon. Ĉiu familio, kiam ĝi preparis bongustajn pladojn, sendis sian infanon alporti al ŝi la frandaĵon. Ŝia najbarino He Lihua, malgraŭ sia okupiteco kaj laco, lavis por ŝi vestaĵojn dum ses-sep jaroj. Ŝia filo Xiao Baolin vektportis por ŝi akvon dum 14 jaroj. Ŝiaj filinoj flikis por ŝi vestaĵojn kaj faris al ŝi tualeton.

Ankaŭ laboristoj kaj vendistoj ĉe la strato tre zorgis pri la maljunulino. La Kompanio de Agrikulturaj Produktaĵoj ĉiumonate donis al ŝi monon por vivkosto. Kiam ŝi estis grave malsana, la kompanio sendis al ŝi servistinon. Laboristo Xu Shoufang kaj aliaj de la Karbovendejo akurate transportis al ŝi karbon. La Vendejo de Greno kaj Kuirleo ĉiumonate alportigis al ŝi siajn varojn. Kaj legomvendistoj preskaŭ ĉiutage alportis al ŝi freŝajn legomojn. En 1971 He terure malsaniĝis. Zhang Yupei, vic-

estro de la Medikamenta Vendejo, kiu havas multjaran sperton pri medicino, kuracis ŝian malsanon, dum aliaj dekoktis por ŝi drogherbojn dufoje ĉiutage. Dank' al la zorgema kuracado kaj flegado, la maljunulino tute resaniĝis en 1976, tiel ke ŝi povis promeni kun bastono.

Ekde 1979, sub la gvido de du instruistoj, lernantoj de proksima elementa lernejo ĉiusemajne ŝultroportas akvon kaj purigas la korton por ŝi. Post diplomitiĝo de unu klaso, sekvas tuj alia. He emocie diris: "Dank' al la nova socio, mi maljuna vidvino povas bone vivi hodiaŭ."


### LA MALJUNULEJO DE LA KOMUNUMO RUĜA FLAGO

Sur la verda deklivo staras etaĝdomo el ruĝaj brikoj. Ĝi estas la maljunulejo de la komunumo Ruĝa Flago en la distrikto Ganjingzi de la urbo Dalian, Liaoning-provinco.

*Zhao Rui, unu el la "filinoj" en la najbara Higiena Lernejo de Xi'an flegas la maljunulinon.*



*En sia libertago junulinoj el la Kompanio de Agrikulturaj Produktaĵoj de Baoji akompanas la maljunulinon He dum la promonado.*







*Maljunuloj en la maljunulejo de la komunumo Ruĝa Flago*

Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj la maljunulejo pli kaj pli grandiĝis kaj la vivkondiĉoj daŭre pliboniĝis. En 1979 la komunumo asignis 137 000 juanojn al konstruado de duetaĝa domo kun plankareo de 500 kvadrataj metroj kaj pligrandigo de la manĝejo. La komunumo aĉetis por la maljunulejo lavmaŝinon, kudromaŝinon kaj televidilon kaj samtempe komisiis sep oficistojn respondeci pri diversaj laboroj.

De sia fondiĝo ĝis nun la maljunulejo akceptis 107 senparencajn maljunulojn, kiuj perdis laborkapablon kaj ne povis prizorgi sian propran vivon. El ili ankoraŭ vivas 27, kies meznombra aĝo estas 76 jaroj. La plej aĝa estas 95-jara maljunulino. De post kiam ŝian filon trafis malfeliĉo en maro antaŭ 20 jaroj, ŝi estis akceptita en la maljunulejon. La lastajn du jarojn la maljunulino estis malsana kaj kuŝis sur lito. Kaj laborantoj helpis ŝin manĝi kaj trinki.

La dormoĉambroj de la maljunuloj estas grandaj, puraj kaj plenaj de sunlumo. En ĉiu ĉam-

bro estas floroj kaj vazo kun orfiŝoj. La naĝantaj malgrandaj orfiŝoj kaj la disflorantaj floroj donas grandan vigecon al la ĉambroj. Sur la neĝblanka muro troviĝas okulfrapa tabelo, sur kiu estas registrita la naskiĝtago de ĉiuj maljunuloj. En la datreveno de ilia naskiĝo la maljunulejo preparas bongustajn manĝaĵojn por festi.

Ankaŭ la amuzejo estas granda kaj plena de sunradioj. Sur ĉiu delikata ronda tablo sterniĝas palruĝa tuko. Sur la fenestroj estas metitaj vazoj kun diversaj floroj. Sur la librobretaro kuŝas diversaj gazetoj. Ĉiuvespere la maljunuloj rigardas televidon en la amuzejo.

Iliaj vestoj kaj litkovriloj estas donitaj de la komunumo. Laŭ statistiko en 1980, la meznombra vivkosto de ĉiu maljunulo estis 628 juanoj jare, iom pli alta ol tiu de ordinara komunumano.

La homo facile sentas solecon en sia maljuneco. Tamen en la maljunulejo la maljunuloj vivas agrable. Malpli aĝaj kaj kompare

fortaj maljunuloj aktive partoprenas fizikajn laborojn laŭ sia eblo. Kune kun laborantoj ili bredas porkojn kaj kulturamas legomojn, per kio ili ĉiujare liveras al la maljunulejo freŝajn porkaĵojn kaj legomojn en valoro de 1 700 juanoj.

La 88-jara maljunulo Su ofte diras: "Mi travivis 15 jarojn en la maljunulejo. Mia vivo pliboniĝas tagon post tago. Mi tute ne bezonas zorgi pri manĝaĵoj kaj vestaĵoj. La servistoj traktas nin pli bone ol niaj propraj gefiloj."



# Pacienca flegado al la patrino



**E**N la ordinara korto Cihuidian, norde de la Imperiestra Palaco, Pekino, loĝas 19 familioj, inter kiuj estas familioj de ŝtata oficisto, intelektulo kaj laboristo. Tie oni ĉiam kun respekto rilatas kun la geedza paro Lin Xiucheng kaj Wu Heze, kiu ĉiam pacience flegas siajn patrinojn. Oni laŭdas precipe la mastrinon Lin, kiu ĉiuflanke prizorgas sian patrino dum longa tempo.

Lin Xiucheng estas inĝenierino de ŝtata departemento pri konstru-materialoj. Ŝia edzo Wu Heze estas geologia inĝeniero. Ili havas tri gefilojn: La pliaĝa filo Xuetao studas en universitato de scienco kaj teknologio ekde 1981. La filino Xueping nun rellernas lecionojn hejme por partopreni ekzamenon por alta lernejo ĉi-jare. La plej juna filo Xueqing studas en la kvina klaso de elementa lernejo. La geedza paro havas du maljunajn patrinojn: La 83-jara patrino de Lin, kiun la najbaroj respekto-

plene nomas avino Lin, kaj la 70-jara patrino de Wu, kiun oni nomas intime avino Wu.

Avino Wu vidviniĝis jam en sia juneco kaj havas solfilon Wu Heze. Kun granda malfacilo ŝi nutris kaj edukis sian filon ĝis li fariĝis plenkreskulo, kaj poste ŝi zorgis pri siaj tri genepoj. Ŝi estas ĉiam laborema kaj restas sana eĉ hodiaŭ, malgraŭ ke iam ŝin atakas hipertensio. Ŝi ne volas sidi senfare. Ŝi ofte helpas la bofilinon aĉeti legomojn, prepari manĝon kaj fari mastrumadon.

Avino Lin estas malsanema pro sia granda aĝo. Ŝi vidas nebule, ne povas prizorgi sin mem kaj devas esti helpata de la filino. Lin Xiucheng ellitiĝas ĉiutage je duono post la kvina matene, vestas la patrino, helpas ŝin por la neceseja bezono, kaj post tio lavas al ŝi la vizaĝon kaj kombas al ŝi la harojn. Ŝi nutras ŝin je duono post la sesa. Tagmeze ŝi devas hejmeniri por manĝigi ŝin. Ŝia laborejo estas proksima kaj ŝi povas reveni hejmen nur post dekelkaj minutoj da veturo per trolebuso. Vespere post la laborhoroj ŝi kutime nutras la patrino kaj lavas ties piedojn antaŭ la enlitiĝo. Nokte ŝi du-tri-foje rigardas, ĉu la maljunulino bone kuŝas sub la litkovrilo. Ŝi diras, ke la patrino estas grandaĝa kaj, dormante, ne povas bone prizorgi sin.

Somere Lin ofte manĝigas sian patrino eksterdome. La patrino kaj filino sidas unu kontraŭ la alia apud kvadrata tableto. Nutrante la patrino, Lin diras al ŝi: "Panjo, tio ĉi estas omleto, tio estas spinaco. Ĉu ili estas bongustaj? . . ." Por la grandaĝulino estas mal-

facile maĉi kaj iafoje la filino bezonas eĉ unu horon por nutri la patrino sed ŝi ĉiam estas tre pacienca.

La malsanema grandaĝulino devas ofte viziti kuraciston. Por ne influi sian taskon, Lin akompanas ŝin al kuracejo ĝenerale en dimanĉo antaŭtagmeze. Antaŭ nelonge en iu dimanĉo ŝi ellitiĝis tre frue kaj iris al du hospitaloj por registri siajn patrino kaj bopatrino. Post tio ŝi unue kondukis la bopatrino en la ambulatorion por mezuri la sangopremon kaj akiri medikamenton, kaj poste ŝi veturigis la patrino per rulseĝo al la proksima Ĉin-medicina Hospitalo de Pekino por kuraci limfangiton. Ŝi klopodis tutan antaŭtagmezon, vere estis ŝvitige!

En Ĉinio cirkulas la proverbo "Por la malsanulo longe kuŝanta ne estas devokonscia filo". Sed por Lin ĝi devas esti ŝanĝita al "Por la malsanulo longe kuŝanta estas devokonscia filino". Lin venigis sian patrino al Pekino de la hejmloko en Fujian-provinco en 1976, post kiam mortis ŝia patro. En la unuaj jaroj la maljunulino estis vigla kaj iafoje eĉ promenis en parko, akompanate de la nepoj. Sed aŭguste de 1980, kiam Wu Heze oficvojaĝis aliloken, la avino Lin estis subite trafita de pneŭmonio kaj suferis longan febron kaj komaton, ne povante reteni sian fekadon kaj urinadon. Helpate de siaj kolegoj kaj najbaroj, Lin tuj veturigis la malsanulinon al hospitalo kaj flegis ŝin tagnokte. Post pli ol unu monato, la maljunulino eldanĝeriĝis kaj elhospitaliĝis. Sed de tiam ŝi ne kapablas plu vivi sen helpo de aliaj.



En la tagoj, kiam la maljunulino estis urĝe savata en la hospitalo, Lin devis pagi pli ol dek juanojn ĉiutage por medikamento, kiuj okupis dekonon de la monata enspezo de la geedzoj. Tamen por savi la patrinon, Lin pli-ol-unufoje diris al la kuracisto: “Estas grave savi ŝin. La ekonomiajn malfacilojn ni povas venki.” Lin elspezis pli ol ducent juanojn por kuraci la patrinon. Konsiderinte ke ŝia familio havas malmulte da enspezoj kaj pezan ŝarĝon, ŝiaj gvidantoj subvenciis ŝin per 70 juanoj. Ŝia frato, kiu laboras kiel kuracisto en alia loko, sendis cent juanojn, kaj la ceteraj estis elspezitaj de Lin mem.

Kiam la maljunulino estis en la malsanulejo, la gvidantoj de Lin sendis kamaradinojn por helpi ŝin flegi la malsanulinon. Kaj la najbaroj, ekz. tapiŝistino Li kaj la edzino de ŝoforo Zhang, helpis ŝin aĉeti legomojn, prepari manĝon kaj fari mastrumadon.

La najbaroj ofte diris al avino Lin: “Sen la plena prizorgado de via filino, vi ja ne ĝisvivus hodiaŭ.” La avino kaptis, dirante: “Mi vivas dank’ al ŝia zorgema penado.”

La konduto de Lin donis ekzemplon por ŝiaj gefiloj. La tri infanoj respektplene traktas ambaŭ avinojn. Kiam la avino estis en la malsanulejo, Xueping kaj Xuetao alterne iris flegi ŝin. Pro tio Xueping ne lernis multajn lecionojn kaj ne trapasis la ekzamenon por alta lernejo. Ŝi tamen neniom plendis. Lin Xiucheng ofte diris al siaj gefiloj: “La avino perdis siajn gepatrojn jam en la infaneco kaj kreskis en orfejo. Ŝi vivis



*Lin Xiucheng manĝigas sian patrinon.*

mizere. Por vivteni la familion kaj ebligi al mi kaj via onklo viziti lernejon, ŝi devis lavi vestaĵojn por aliaj sen forlasi sian instruadon en elementa lernejo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio mi kaj via onklo povis fini mez- kaj alt-lernejojn nur dank’ al stipendio de la ŝtato.” Ŝi diris ankaŭ: “Estis malfacile por ŝi vivteni min kaj vian onklon. Nun ŝi maljuniĝis. Ni, ŝiaj posteuloj, devas multe zorgi pri ŝi.”

Ĉar la tri infanoj kreskis sub la flegado de avino Wu, ili havas profundajn sentojn al ŝi, precipe Xueqing. Ĉiufoje, kiam ŝi rimarkis, ke la avino estas atakata de hipertensio, ŝi tuj helpis ŝin enlitiĝi kaj kovris ŝin per litkovrilo, dirante: “Dormu, avino! Vi resaniĝos post ripozo!”

Dimanĉe, kiam la familio havas freŝan fiŝaĵon ŝatatan de ambaŭ avinoj, Lin manĝigas sian patrinon, pacience senosti-

gante fiŝon, dum la infanoj metas bongustaĵojn en la bovlon de avino Wu. “Mi, maljunulino, ne bezonas tiom da bongustaĵoj. Vi manĝu pli multe por la sano!” Sed la infanoj respondis: “Avinoj, vi ambaŭ estas senilaj kaj bezonas pli da nutraĵo por via sano! Ni estas junaj kaj povos manĝi poste!”

Wu Heze, filo de avino Wu, okupiĝas pri geologio, tial li ofte oficvojaĝas aliloken. Dum lia foresto lia edzino devas pli multe fari mastrumadon. Sed kiam Wu estas hejme, li ĉiam volonte plenumas hejmajn laborojn. Ankaŭ li zorgas pri la patrino kaj bopatrino. Printempe ĉi-jare, en ripoztagoj, li per briketoj kaj ŝtonpecoj konstruis florbedon, kie li plantis peoniojn, rozojn, siringojn kaj aliajn. Li diris: “Mi bone kulturu tiun florbedon, por ke sur ĝi pompu freŝaj floroj. Ambaŭ patrinoj povu ĝoje ripozi kaj babili apud la floroj kaj vivu pli longe!”



Cai Yuanpei

NIA KULTIVEJO



## Cai Yuanpei kaj Esperanto

de HOU ZHIPING

**C**AI Yuanpei (1868-1940) estis fame konata demokratia revoluciulo, edukisto kaj sciencisto en la nuntempa historio de Ĉinio. Frue en la komenco de la nuna jarcento, kiam Esperanto estis ĵus kondukita en Ĉinion, li kune kun Lusin aktive subtenis la aktivadon de Esperanto. Poste li la unua enkondukis Esperanton en lernejojn.

Kiam Cai studis en Germanio dum la tempo de 1907-1911, li mem lernis Esperanton. Tial li profunde komprenis la celon de Zamenhof krei Esperanton kaj superecon de la lingvo. Li subtenis "La Novaj Tempoj", ĉinlingvan semajn-gazeton eldonitan en Parizo, kiu propagandis Esperanton kaj estis unu el tiuj gazetoj, kiuj plej frue prezentis Esperanton al Ĉinio.

Kiam Sun Jatsen enoficiĝis en Nankino kiel la provizora prezidanto de la Respubliko de Ĉinio en 1912, Cai samtempe enoficiĝis en la registaro kiel la unua ministro de edukado. Li ordonis, ke la instruistaj lernejoj en la tuta lando starigu nedevidan kurson de Esperanto por kulturi ins-

truistojn de la lingvo. Krome, li instrukiis, ke oni fondu Esperantan kurson en la eduka ministerio.

En la sama jaro, invitite de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, li faris paroladon, en kiu li elmontris la bezonon de ĝenerale uzata internacia lingvo kaj la utilon al Ĉinio el la apliko de Esperanto kiel "helpa" lingvo. Li diris: "La ĉina lingvo multe diferencas de la okcidentaj lingvoj. En la nuna situacio Ĉinio absolute ne povas ne kontaktiĝi kun aliaj landoj kaj absolute ne povas ne lerni de aliaj landoj. Por tio Ĉinio ne povas ne havi helpan lingvon, kaj Esperanto estas la plej taŭga." Li daŭrigis: "Multaj eksterlandanoj esploras nian landon kaj suferas pro la malfaciloj en lernado de la ĉina lingvo. Se ni ĉiuj scipovus Esperanton, tiam ne nur en la Esperantujo estus pli multaj elementoj, sed ankaŭ lerni Esperanton estus sufiĉe por la eksterlandanoj, kiuj dezirus veni al Ĉinio. Kaj krome, tio povas disvastigi Esperanton, kio estas nia devo." Li opiniis, ke unue lerni Esperanton helpas al la lernado de okcidentaj lingvoj. Li diris: "Estas pli malfa-

cile por la ĉinoj lerni fremdajn ol por la okcidentanoj. Sed post kiam ili lernis unu eŭropan lingvon, ili jam havis la samajn kondiĉojn kiel la okcidentanoj por lerni iun alian eŭropan lingvon. Se la unue lernita lingvo estos Esperanto, tio certe helpos al la lernado de dua fremda lingvo." Li proponis al la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, ke ĝi unue starigu bibliotekon, por ke oni konu la multecon de la Esperantaj libroj; kaj starigu privatan universitaton kun sociscienca kaj naturscienca fakoj por eksperimenti, ĉu Esperanto taŭgos por instruado. El la parolado oni povas facile vidi la profundan komprenon de Cai pri Esperanto kaj lian entuziasmon por disvastigi Esperanton.

Estas menciinde, ke Cai neniam forlasis iun ajn ŝancon por disvastigi Esperanton. En la komenco de 1917, li fariĝis direktoro de la Pekina Universitato kaj decidis starigi nedevidan kurson de Esperanto en ĝia ĉinlingva fakultato. Li speciale invitis s-ron K. Ĉ. Sun el suda Ĉinio al la Pekina Universitato por ke li laboru tie kiel Esperanta lekciisto. Oni diras, ke tiam pli ol 200 kursanoj lernis en ĝi Esperanton. En 1921 la universitato metis Esperanton inter la oficialajn studobjektojn. En la sama jaro la Sepa Tutlanda Eduka Konferenco okazigita en Kantono akceptis proponon de Cai, ke ĉiuj lernejoj de la lando kaj la administraj institucioj pri edukado plenumu la ordonon de la Eduka Ministerio pri Esperanto donitan en 1912 kaj iom post iom disvastigu la lingvon en la mezaj kaj elementaj lernejoj. Kvankam lia propono ne realiĝis pro manko de necesaj kondiĉoj, ĝi tamen ludis aktivan rolon en



la disvastigo de Esperanto en Ĉinio.

La sesan de aŭgusto 1921 Cai partoprenis en la Pacifika Eduka Konferenco okazigita en Honolulu, Usono, reprezentante la tiaman ĉinan registaron. En ĝi li prezentis proponon, ke la ĉeestantaj landoj instruu Esperanton al la lernantoj super la aĝo de dek jaroj en la elementaj lernejoj kaj traduku siajn librojn en Esperanton. La konferenco akceptis lian proponon.

Por fortigi la instruan kaj esploran laboron pri Esperanto en la Pekina Universitato, Cai iniciatis la Esperantan studrondon kaj ankaŭ funkciis kiel ĝia estro. Samtempe li invitis la rusan blindan poeton Eroŝenko al la Pekina Universitato instrui Esperanton. Dank' al la alveno de ĉi tiu, la lernantoj de la Esperanta kurso en la universitato pliiĝis ĝis 500-600 homoj. Krome la universitato invitis ankaŭ iujn fame konatajn esperantistojn kiel Osaka Kenji al la universitato por prelegi.

En la komenco de la dudekaj jaroj multaj ĉinaj altlernejoj starigis nedevidigan kurson de Esperanto. Por solvi la problemon de instrumaterialo, K. Ĉ. Sun kompilis, laŭ la peto de Cai, "La Nova Krestomatieto de Esperanto" kaj "La Plena Gramatiko de Esperanto", kaj Cai verkis por ili antaŭparolon.

Subtenate de Cai Yuanpei, la Esperanto-movado en la Pekina Universitato fariĝis tre vigla. Je la 15-a de decembro 1922 la universitato kunvokis la Esperantan Kongreson, kiun ĉeestis pli ol 2 000 homoj. La tiama prezidanto sendis sian reprezentanton al la kongreso por saluti ĝin. Cai prezidis la kongreson kaj prele-

gis, emfazante kial la homaro bezonas internacian lingvon, kial tiu povas esti nur artefarita kaj kial el la artefaritaj lingvoj oni elektis Esperanton kiel la internacian lingvon. Fine li aparte substrekis la gravan signifon, kiun ĝeneraligo de Esperanto en Ĉinio povus havi. Li diris: "La ĉina lingvo multe diferencas de la eŭropaj lingvoj, la ĉinoj malfacile lernas la eŭropajn lingvojn kaj la eŭropanoj lernas la ĉinan pli malfacile. Sed la loĝantaro de Ĉinio konsistigas kvaronon de la homaro; ĝi havas tiel riĉajn rezervojn kaj tiel longdaŭran kulturon. La ĉinoj ja deziras ricevi helpon de la eŭropanoj kaj amerikanoj kaj ĉi tiuj eĉ pli deziras ricevi helpon de la ĉinoj. Sed pro la lingva baro la tradukoj kaj interpretado de malmultaj homoj ofte kaŭzis miskomprenojn. Se la ĉinoj lernus Esperanton, tio certe helpus al la eŭropanoj kaj amerikanoj koni Ĉinion kaj kontaktiĝi kun la ĉinoj, ĉar per Esperanto eblus eviti la malfacilon en lernado de la ĉina lingvo. Tial ni postulas, ke Ĉinio la unua ĝeneraligu Esperanton." Tiam iuj influaj ĵurnaloj publikigis la paroladon de Cai.

Por ĝeneraligi Esperanton, necesas granda nombro da Esperantaj fakuloj kaj instruistoj. En 1923 Cai, Wu Zhihui, Chen Shengshu kaj aliaj fondis la Pekinan Esperantan Kolegion kaj Cai estis elektita kiel ĝia estro. Tiam Lusin konsentis, por esprimi sian subtenon al Esperanto, fariĝi membro de ĝia protektantaro kaj instruis en la kolegio. La kolegio funkciis malpli ol du jarojn, dum kiuj ĝi ne nur kulturis nombron da esperantistoj, sed ankaŭ ludis certan rolon en la progresigo de la ĉina Esperanto-movado.

En 1924, akompanate de Won Kenn, Cai ĉeestis la 16-an Universalan Kongreson de Esperanto en Vieno. Dum la kongreso li propraokule vidis la rolon ludatan de Esperanto en pliigo de amikeco kaj interkompreno inter la popoloj. Li diris: "Ĉinoj povas pliigi interkomprenon inter la ĉina kaj okcidentaj popoloj, per Esperanto." Reveninte al la hejmlando, li pli entuziasme subtenis la Esperantan aferon. Dank' al lia subteno fondiĝis Esperanta Redakta kaj Traduka Komitato, kiu eldonis Esperantajn librojn.

En oktobro 1931 Cai iris de Nankino al Kantono kaj ricevis varman bonvenigon de tieaj esperantistoj. En la bonveniga bankedo honore al li, li diris: "Esperanto estas efika instrumento por rapidigi la grandan harmonion de la homaro." Li kuraĝigis la esperantistojn daŭre klopodi kaj kontribui al la disvastigo de Esperanto en Ĉinio.

El la supre menciitaj faktoj oni povas vidi, ke Cai dediĉis sian grandan energion al la disvastigo de Esperanto en Ĉinio. La de li postlasitaj verdaj semoj nun donas grandajn fruktojn. Hodiaŭ la ĉinaj esperantistoj jam havas propran landan organizaĵon — la Ĉina Esperanto-Ligo, kiu eldonas sian organon "La Mondo" kaj "El Popola Ĉinio", kiu ludas rolon en kultura interŝanĝo internacia. Radio Pekino disaŭdigas en Esperanto. La ĉinaj esperantistoj strebas por "interkompreno inter la ĉina kaj okcidentaj popoloj" kaj kulturaj interŝanĝoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Ili volas kontribui siajn fortojn por realigi la deziron de la pioniroj.

## Zamenhof kaj Litovio

*La kuranta jaro estas la 95-a datreveno de la publikigo de "La Unua Libro" L. L. Zamenhof. Por memorigi tiun gravan eventon, nia gazeto represas la jenan artikolon el "Horizonto de Soveta Litovio", kvara kajero, 1979.*

La Red.

"Proksime, trans Polujo, kuŝis tiu lando, kie naskiĝis esperantismo" (E. Privat, "Vivo de Zamenhof", Londono, 1937, 111 p.)

Pri estado de L. Zamenhof en Litovio aperis pluraj publikaĵoj kaj notoj. A. Dambrauskas-Jakstas verkis elĉerpan biografian skizon pri L. Zamenhof ("Uzgesse Ziburiai", Kaunas, 1930, p. 443-488). En la ĉapitro "Zamenhof en Litovio" li skribas i. a. ke Zamenhof naskiĝis en klera familio en Bialystok. En 1885, post diplomitiĝo, li komencis labori kiel kuracisto en la litova urbeto Veisiejai (Vejsėjai). Tie li pretigis por publikigo la vortaron kaj gramatikon de internacia lingvo. Li konsumadis onidire po 3 funtojn da kandeloj dumsemajne; dumtage li ja estis tre okupita pri pacientoj. Lokaj loĝantoj ankoraŭ nun (t.e. dum verkado de la biografio) rememoras la bonkoran brunbar-

ban kuraciston, sed ili ne antaŭsciis, ke li famiĝos tra la tuta mondo ne kiel kuracisto.

Elstara esperantisto de nia respubliko A. Poška en 1925 en Veisiejai enketis la plej aĝajn lokajn loĝantojn. Laŭ liaj notoj, publikigitaj en la revuo "Litova Stelo" (1937, n-ro 4), malkovriĝas karakteraj trajtoj de la personeco de Zamenhof. D-ro L. Zamenhof en Veisiejai manifestiĝis ne nur kiel kompetenta kuracisto, sed ankaŭ kiel nobl-anima homo. Foje dum revojaĝo hejmen Zamenhof rimarkis survoje iun patrinon, kies infano grave malsanis. La infanon sufoke turmentis tuso. Loka ĉarlatano Kuklianskis fuŝkurace kaŭzis toksigon al la infano. Dum ĉirkaŭ tri horoj d-ro Zamenhof laboris kaj forigis danĝeron. Por la kurachelpo li ne prenis pagon, male, al la malriĉa patrino li donis unu rublon por

aĉeti medikamenton. Post ĉi tiu evento ĉiuj parolis pri la kuracisto kun granda simpatio. Dum Zamenhof loĝis en Veisiejai, foje ĉe unu kamparano okazis incendio, brulvundiĝis infanoj, por kiujn kuraci estis alvokita d-ro Zamenhof. Post la medicina esploro de la malsanuloj al la suferinta familio Zamenhof fordonis tutan monon, kiun li havis, kaj por reveni hejmen li mem devis pruntepreni de aliaj. Printempe 1887 Zamenhof vojaĝis en Kaunas. Survoje ĉevalo de fiakristo malfortiĝis kaj mortfalis. Al la fiakristo Zamenhof donis 50 rublojn por aĉeti alian ĉevalon, ĉar ĉevalo estis ja sola fonto de ekzisto por la fiakristo.

Mi aŭdis de lokaj maljunuloj, ke Zamenhof ne scipovis bone la litovan lingvon, tamen kun lokaj loĝantoj interkompreniĝadis litovlingve. Iu loka kamparano transdonas rememorojn de sia



onklo Mykolas Aleksonis: “Nia onklo estis ĉarpentisto. Kiam kuracisto Zamenhof ekloĝis en Veisiejai, li petis la onklon fari en lia loĝejo ian riparon. La onklo scipovis nenian alian lingvon krom sia gepatra, la litova, sekve kun la kuracisto parolis nur litovlingve. Poste Zamenhof, renkontinte mian onklon surstrate, salutadis lin litovlingve kaj demandis “Kaip jusu sveikata?” (Kiel vi fartas?). La onklo rediradis “Dėkui, daktare!” (J. Petrulis, “Fragmentoj pri Zamenhof en Veisiejai”, Heroldo de Esperanto, 1959, n-ro 6).


Siajn rememorojn pri Zamenhof kelkfoje publikigis aŭ rakontis ankaŭ la bofratino de d-ro Zamenhof, Teresa Zilbernik-Kocin: “Ludoviko kaj Klara interkonatiĝis en Kaunas. Foje Zamenhof en nia hejmo restadis ĉirkaŭ dek tagojn. Li esprimis deziron daŭre restadi en Kaunas. En unu el la leteroj al Klara, Ludoviko i.a. skribis: “Via horizonto plezurigas mian koron”. Restis kelkaj leteroj de Klara kaj Ludoviko.

Dezirinde, ke ne estu forgesita ankaŭ la karakterizo de T. Zilbernik-Kocin pri ŝia bofrato, d-ro Zamenhof: “Kiam Zamenhof diris al siaj proksimuloj pri sia intenco eldoni libron pri internacia lingvo, ili opiniis lin nenormala homo kaj estis certaj, ke lia revo estas nerealigebla. Nur mia mortinta paĉjo (Aleksandro Zilbernik, komercisto en Kaunas, bopatro de d-ro L. Zamenhof — rim. de redakcio) komprenis Zamenhofon, volonte helpis lin, donis al li necesajn rimedojn por la eldono de diversaj broŝuroj. Mia paĉjo la unua ellernis Esperanton kaj korespondadis kun Zamenhof esperantlingve. Laŭ vortoj de

mia patro, Zamenhof estis homo sen galo, la boneco mem, li ne komprenis, kiel oni povas koleri, iun ajn ofendi, kaj pro tio estas facile imagi, kiel Zamenhof suferis, kiel doloris al li la koro, kiam ĉirkaŭ li regis nur hommalamo!” (“Litova Stelo,” 1937, n-ro 4, p. 4).

En sia artikolo “La restado de Zamenhof en Veiseje” (Nuntempa Bulgario, 1960, n-ro 11) A. Holzhaus esprimas dubon pri kelkaj datoj de la restado de Zamenhof en Litovio, donitaj en la menciitaj de ni kaj aliaj fontoj. Tio instigas al plua studado por precizigi ĉi tiun demandon. La prezentitaj fragmentoj el biografio de Zamenhof transdonas al ni trajtojn de la nobla persono, montras al ni la harmonion inter lia verkaro kaj personeco kaj ne devas fali al forgeso, se oni ne sukcesos konstati precizajn datojn de ilia okazo. Ja multe pli gravas tio ke Litovion li konsideris sia patrolando, kaj pri tio publike deklaris 21. VIII. 1907 en Londono dum akcepto ĉe la urbestro:

“Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas: ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj, aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavo! Ho, patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernas



*Jen la domo de la edzino de Zamenhof sur la strato Zamenhof, Kaunas, Litovio. Tie loĝis ankaŭ Zamenhof dum mallonga tempo.*

kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco de la tero, kiu lin naskis!” (K. Krüggemann, Historio de Esperanto, Dresden, 1923, p. 65-66).

Duan gravan tezon, karakterizantan la ligojn de Zamenhof kun Litovio, esprimis la eminenta biografo pri d-ro L. Zamenhof, Majorie Boulton: “Oni kredas, ke la kreado de la internacia lingvo trairis sian lastan stadion en Veiseje” (M. Boulton, ZAMENHOF, La Laguna, 1962, p.46).





JIANG TI:

# Hazarda renkontiĝo



**E**N la Printempa Festo de la pasinta jaro mi veturis al Yixing-gubernio, Jiangsu-provinco, por ĉeesti la geedziĝan feston de mia pli aĝa fratino Yun. Dume, utiligante la ŝancon, mi vizitis la faman vidindan lokon Shanjuan-kaverno en Yixing. La kaverno troviĝas ĉe la piedo de Luoyan-monto, 25 kilometrojn sudokcidente de la gubernio. Ĝi ŝajnas ŝtonskulptita domo kun kvar partoj supra, meza, malsupra kaj akva. En la kaverno estas diversaj kuriozaĵoj belkoloraj kaj varifiguraj formitaj el kalkoŝtonoj.

Frumatene de la Printempa Festo, mi ekiris kaj vidis survoje, ke diversaj aŭtoj plenaj de turistoj veturas kiel senfina torento. Baldaŭ mi venis al la kaverno. Unu alta ŝtono kiel kolono staras meze de la enirejo. Ĉirkaŭirinte la kolonan rokon, mi venis al la Leona kaj Elefanta Placo, kiu povas enteni milojn da homoj kaj tiutage estis plena de turistoj, inter kiuj estas multaj eksterlandanoj.

Mi iris al la supra kaverno laŭ ŝtonaj ŝtupoj. Ĝia volbo similas al renversita duonsfera kovrilo. Dekoj da koloraj lampoj instalitaj sur la plafono prilumis la kaverton, dank' al kio klare vidigis la kalejdoskopaj pejzaĝoj.

La kuriozaĵoj de Shanjuan-kaverno troviĝas en la kavernoj malsupra kaj akva. La malsupra estas mallarĝa kaj longa. Tie la falakvo verŝiĝas de rokmuro kaj torento fluas brue. Mi malsupreniris al la akva kaverno laŭ spirala tunelo kaj aŭdis la akvo-bruon iom post iom plilaŭtiĝi. Komence ĝi similas al ondo-bruo en malproksimo, iom poste al bruon antaŭ ventegado kaj ton-drado kaj poste al dekmil-ĉevala galopado. Ĝuste kiam mi raviĝis de la kuriozaĵoj, mi senintence tuŝis kalkanon de antaŭiranto, kiu kriis de tio.

Mi pretervole diris Esperante "Pardonon!"

"Ne gravas!" ankaŭ tiu respondis Esperante.

Mi miregis, ke tie mi renkontas samideaninon. Mi levis la kapon kaj vidis, ke antaŭ mi

staras junulino kun blondaj haroj. Returnante la kapon, ŝi ridetis al mi.

"Ĉu vi estas esperantistino?" mi demandis.

"Jes." Ŝiaj entuziasmaj okuloj brilis de amikeco.


"Ha, bonvenon, samideanino!" Mi saltis de ĝojo.

"Mi estas svedo. Mi venis por viziti vian landon." Ŝi sin prezentis en flua Esperanto. Ŝi etendis la brakojn por brakumi min, por ke mi ne glitfalu sur la ŝtonaj ŝtupoj. Ĉe tio varma fluo trapasis mian tutan korpon.

Tiel ni babilis en Esperanto kiel malnovaj amikinoj. Persono malantaŭ ni interrompis nian babilon, kaj tiam ni rimarkis, ke ni baras lian vojon. Ni subtenis unu la alian kaj malsupreniris laŭ la krutaj ŝtonaj ŝtupoj.

Poste ni eniris en plezurbo-ton. Ni sidis, apogante unu la alian. Ni premis la supran muron de la akva kaverno per remiloj kaj tiel ni glitis antaŭen laŭ la subtera rivero, dum la lirlanta fluo frapetis nian boaton.

*Jiang Ti lernas Esperanton.*





“En la pasinta jaro mi konatiĝis kun multaj amikoj en la 65-a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Inter ili troviĝis kontraŭfaŝismaj herooj en la Dua Mondmilito, internaciaj pachtalantoj, famaj sciencistoj, junaj studentoj kaj eĉ 12-jara knabo . . .” Ŝi entuziasme prezentis al mi la Universalan Kongreson kaj diris sian impreson pri aliaj aferoj.

“Jes, Esperanto estas simbolo de paco kaj amikeco, ĝi interkomprenigas la homojn . . . Mi tre ĝojas, ke vi vizitas nian landon.” Mi prenis ŝin en miajn brakojn.

Ni babilis remante la boaton, sed baldaŭ nia boato jam trapasis la 120-metran subteran riveron kaj ni venis al la aperturo. Sur nin verŝiĝis blindiga sunlumo. La fluo ĉi tie fariĝis toronto. Tiam ŝiaj kamaradoj vokis ŝin. Ni haste adiaŭis unu la alian.

En la mallonga kontaktiĝo kun la sveda junulino mi refoje ĝuis la amikecon kaj ĝojon alportitan de Esperanto.



## SUR NIA LIBROBRETTO

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuajoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

La Red.

### Laŭ la “patrina metodo”

ESPERANTO LAŬ LA PATRINA METODO de August Weide, eldonita de la aŭtoro (adreso: Nordalbingergwg 65, D-2000 Hamburg 61, Germanujo). Formato 14.5 × 21 cm. 320 Prezo 55.20 gld.

Koncerne al la metodiko de la instruado de Esperanto, eble vi aŭdis pri traduka metodo, rekta metodo, Cse-metodo, elekta metodo ktp. Sed jen prezentiĝas “patrina metodo”. Ĉu ĝi ne estas io nova? Kio ĝi estas do? Post tralego de la lernolibro verkita de s-ro A. Weide mi konstatis, ke temas pri kombinaĵo de Cse-metodo kun traduka metodo sed ne la natura metodo, laŭ kiu la patrinoj lernigas sian lingvon al la infanoj.

Tiu ĉi lernolibro rimarkinde emfazas buŝan uzon de la lingvo kaj plenŝtopis ĉiujn siajn 264 paragrafojn per demandoj de la instruisto (kompreneble temas pri kurso sub gvido de lerta esperantisto) kaj lernanto. Eĉ duono de la kontrolaj ekzercoj konsistas el demandoj kaj respondoj por legado! Alia frapa karakterizaĵo de la lernilo estas tio, ke preskaŭ ĉiuj ĝiaj tekstoj estas tradukitaj en la germanan lingvon, kaj eble pro tio la aŭtoro asertas, ke esperantistoj povas uzi lian verkon por lerni la germanan. La tria karakterizaĵo de ĝi estas ripetado de la donitaj tipaj frazoj en

demandoj kaj respondoj. Kompreneble en lernado de lingvo oni devas ripete sin ekzercadi, do tia aranĝo estas pravigebla. Tamen mi volas demandi, ĉu oni ne povus ŝpari parton de ripetado de simplaj frazoj kiel “kio estas ĝi?” kaj doni nur la tipajn frazojn kaj lasi la instruiston aranĝi buŝajn kaj skribajn ekzercojn laŭ la donitaj modeloj?

Koncerne al la donitaj ekzemploj ĝenerale modelaj en la tekstoj mi volas rimarkigi, ke oni ne ĉiam sekvas la ĝeneralan regulon en skribado de bazaj numeraloj, kiel ekzemple “sepcent-okdek-naŭ” sur paĝo 159. Eble tio okazis sub influo de la germana lingvo. Ankaŭ la formoj “Esperantokonversacio” (p. 64) kaj “Esperantofrazo” (p. 212) kaj similaj ne tiel plaĉas. Kial ne uzi la kutimajn formojn “Esperanta konversacio” kaj “Esperanta frazo”?

La papero, bindo kaj preso de la libro estas bonkvalitaj. Mi rimarkis nur malmultajn preserarojn, kiuj ne malhelpas la legadon de spertaj legantoj, tamen povas ja ĝeni glatan lernadon de la komencantoj. Oni devus aldoni erartabelon.

Mia ĝenerala impresio pri la lernilo estas, ke la sperta instruisto serioze klopodis por havigi al la publiko, precipe la germana, taŭgan ŝtupon por posedi la internacian lingvon. Lia kontribuo ja estas bonvena por nia komuna afero.

Recenzis V.K.

### NOVE RICEVITAJ LIBROJ

MIA VIVO de Trifon Ĥristovski, trad. N. Aleksiev, eldonita de Sofia Pres. Formato: 12 × 19 cm. 180 p. Havebla ĉe Bulgara Esperanto-Asocio (adr.: 1302 SOFIO, bul. “Ĥristo Botev” 97). Prezo nemontrita.

BIBLIOGRAFIO pri verkoj de Jordan Jovkov tradukitaj en Esperanton. Verkita de Krastju Karucin k.a. kaj eldonita de Esperanto-Societo “Paco” en urbo Tolbuhin, Bulgario. Formato: 20 × 14 cm. 24 p.



## **CINAJ ESPERANTISTOJ PARTOPRENOS LA 67-AN UK**

Ĉi-jare la Ĉina Esperanto-Ligo sendos al la 67-a UK en Antverpeno ses-membran delegacion kun sia ĝenerala sekretario Zhang Qicheng kiel ĝia estro. Ĝia membro profesoro Io Chou, fama ĉina entomologo, prelegos pri la insekta esplorado de Ĉinio en la Internacia Kongresa Universitato. Alia ĝia membro Qiu Zimin, kantistino de la Pekina Ensemblo, kantas ĉinajn kantojn en Esperanto en amuza vespero. Al la kongreso flugos ankaŭ esperantisto-raportisto el Radio Pekino.

## **ESPERANTO-MOVADO EN JILIN-PROVINCO**

De la lastaj du jaroj la Esperantomovado plivigliĝas kun ĉiu tago en Jilin-provinco en nordorienta Ĉinio. En 1979 okazis en la provinco la unua kurso de Esperanto. Poste ekfunkciis alia kurso, en kiu 142 komencantoj lernas la lecionojn de la dua semestro. De la 4-a ĝis 10-a de februaro ĉi-jare la Esperanto-Instituto de la provinco aranĝis en sia ĉefurbo Changchun fonetikan kurson de Esperanto partoprenitan de 136 homoj el 41 urboj kaj gubernioj. Inter la lernantoj troviĝis inĝenieroj, instruistoj, kuracistoj, laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj ŝtataj oficistoj. Post unu semajno ili ellernis la prononcon

kaj ortografion de Esperanto, kaj jam povas mem lerni pli facile la lingvon.

La Esperanto-Asocio de Siping de tiu provinco estis elektita kiel urba avangarda organizaĵo de 1981 en la scienca kaj teknika rondo, ĉar ĝi fervore propagandis kaj lernigis Esperanton dum unu jaro post sia fondiĝo. Nun la asocio daŭre funkcias Esperanto-kurson en la 14-a Mezlernejo en tiu urbo.

Krome, ankaŭ esperantistoj de Dehui, Huadian kaj aliaj gubernioj de la provinco starigis sian studrondon.

## **ESPERANTA STUDRONDO EN ŜTALA URBO**

En februaro pasintjare, en la ŝtala urbo Anshan, Liaoning-provinco, starigis studrondo de Esperanto. Nun ĝi konsistas el 60 homoj, kiuj havis du Esperanto-kursojn dum la pasinta unu jaro. Ĝi okazigis kunsidojn por interŝanĝi spertojn de lernado kaj organizis renkontiĝon kun esperantistoj de Shenyang. La 25-an de aprilo ĉi-jare esperantistoj de Anshan invitis gesamideanojn de ok urboj kaj gubernioj de la provinco pasigi somerajn tagojn kune kun ili en la landfama pitoreskejo Qianshan.

## **PREPARA KOMISIONO DE ESPASOCIO DE SHASHI STARIGITA**

Post sia interkonsiliĝo kaj sekreta balotado la 15-an de februaro ĉi-jare, esperantistoj de Shashi starigis preparan komisionon de la Esperanto-Asocio de sia urbo kun Deng Huijin, Fang Xianjiang kaj Kang Zhong kiel ĝiaj prezidanto kaj vicprezidantoj. Nun ekfunkciis sekcioj de sekretarioj, organizantoj kaj informantoj sub la komisiono.

La 1-an de majo en Zhongshanparko de Shashi okazis renkontiĝo

de la membroj de la prepara komisiono, la Junula Federacio de Shashi, la rapida Esperanto-kurso de Wuhan kaj la Esperanto-kurso de Jingzhou. Dume oni informis pri nia lingvo kaj prezentis programe-rojn.

## **EN SEP LANDOJ AKTIVIS TIBOR SEKELJ**

Ekde la UK en Brazilo ĝis la fino de 1981, la fame konata jugoslava esperantisto Sekelj restadis en sep landoj: Brazilo, Venezuelo, Kolombio, Panamo, Usono, Britio kaj Francio. En ĉiuj vizititaj lokoj, escepte de Panamo, li partoprenis kunvenojn de esperantistoj kaj prelegis aŭ diskutis kun ili pri la Espmovado, precipe pri preparoj por la jubileo de Esperanto. Li ankaŭ gvidis du rapidkursojn en Nov-Jorko kaj Parizo.

Tamen la plej grava laboro plenumita de Tibor Sekelj estis lia unumonata agado en Nov-Jorko kaj same unumonata en Parizo, kie li, kiel komisiito de la Universala Esperanto-Asocio por la movado de nealiancigitaj landoj, kontaktis kun 28 reprezentantoj de pluraj nealiancigitaj landoj ĉe UNO kaj UNESKO kaj diskutis pri la lingva problemo en tiu movado. El tiuj intervjuoj 26 favoras Esperanton.

## **ESP-KURSO EN TEHERANO**

De februaro ĝis aŭgusto 1981 funkciis en la granda moskeo "Zarabĥane" en la nordo de Teherano Esp-kurso sub la gvido de f-ino Ŝirin Ahmad-Nia. La kurso kun 46 partoprenantoj okazis du horojn ĉiusemajne. Inter ili sin trovis instruistinoj, lernantinoj, studentinoj, flegistinoj, oficistinoj, bankistinoj kaj dommastrinoj, el kiuj 12 jam membriĝis al UEA. Ĉe la sukcesa finiĝo de la kurso la gvidantino kaj la kursaninoj kune faris malgrandan feston en la moskeo. Estas antaŭ-



viditaj pluaj Esp.-kursoj sub la sama gvidantino en la sama loko.

## INTERNACIA LITERATURA KONKURSO

La Patronaro de la "Fundación Esperanto" decidis organizi Internacian Literaturan Konkurson en Esperanto. Estos du premioj.

Premio "Sancho Rebullida" de 12 000 k. 6 000 pesetoj respektive estos pro la du plej bonaj verkoj kun la temo "Popola Rakonto" aŭ "Priskribo pri urbo aŭ regiono kun la monumentoj kaj tradiciaj festoj kaj moroj", laŭ libervola elekto, en amplekso de 4-6 folioj.

Premio "Juan Miguel Piquero" de 10 000 k. 5 000 pesetoj respektive estos pro la du plej bonaj porinfanaj rakontoj originalaj aŭ tradukitaj en facila lingvo, en amplekso de 2-3 folioj. La rakontoj estu por ekinstrui Esperanton al infanoj 7- ĝis 10-jaraj kaj povas esti ilustritaj aŭ nur literaturaj. La ilustraĵoj devos esti originalaj.

La regularo postulas, ke ĉiu konkursanto sendu kvin ekzemplerojn

de la konkursaĵo tajpitajn kun duoblaj interlinioj, kun la indiko: "Por la Konkursado de 'Fundación Esperanto', premio. . ."; la konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la konkursanto, kaj en aparta fermita koverto surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto; la limdato (laŭ la poŝta stampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 30-a de septembro 1982, kaj oni sendu la tekstojn al Inés Gastón, P de la Constitución 35, 4º dcha., Zaragoza-1, Hispanio.

## DUA TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

La Dua Tutamerika Kongreso okazos de la 17-a ĝis la 20-a de julio ĉi-jare en Bogotá, Kolombio.

La centra temo de la kongreso estas "Esperanto kaj la Pacaj Interrilatoj de Ĉiuj Landoj". La direktoro de la Loka Kongresa Komitato invitas ĉiujn amerikajn asociojn igi sin reprezenti en la kongreso kaj esperas havi abundan kaj selektan

ĉeeston kaj varman renkontiĝon de ĉiuj, kiuj volas partopreni, ne nur el Ameriko, sed ankaŭ el Eŭropo, Azio, Afriko kaj Aŭstralio. Li speciale invitas tiujn, kiuj kvankam ne parolas la lingvon, tamen komprenas kaj kunsentas la esperantistajn idealojn, sendi siajn respondojn de apogo al la programo de la Dua Tutamerika Kongreso.

## PRI LA ESP-MOVADO EN RUMANIO

En n-ro 2 de "La Mondo" 1982, dumonata revuo eldonata de la Ĉina Esperanto-Ligo, aperis la ĉinlingva traduko de artikolo de rumana esp-isto Constantin Apreotesei kun la titolo "El la Esperanta Agado de Rumanio". Li detale priskribis la Esp-movadon inter la jaroj 1978-81 en Rumanio. Interalie li menciis la ampleksajn studojn pri Esp-aj kaj interlingvistikaj problemoj iniciatitajn de la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko kaj la debatojn inter rumanaj esp-istoj pri demandoj rilate al Esperanto. La artikolo servis al la konatigo de la rumana Esp-movado al ĉinaj esp-istoj, kaj sekve ili multe interesiĝis.



*Esp-isto de la urbo Shashi, Hubei-provinco, kantas Esperante ĉe la renkontiĝo.*



## SIMPLIGO DE LA ŜTATA KONSILANTARO DE ĈINIO

La simpligo de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj ĝiaj ministerioj kaj komisionoj komenciĝis de la lasta tagdeko de februaro ĉi-jare kaj plenumiĝis en la lasta tagdeko de aprilo.

La 22-a sesio de la Konstanta Komitato de la Kvina Popola Kongreso jam aprobis la proponon pri reduktado de vicĉefministroj kaj instalado de ŝtataj komisiitoj kaj proponon, ke la ĉefministro, vicĉefministroj, ŝtataj komisiitoj kaj ĝenerala sekretario estu partoprenantoj de la Konstanta Kunveno de la Ŝtata Konsilantaro kaj servu kiel gvidantaro zorganta la ĉiutagan laboron de la Ŝtata Konsilantaro.

Post la reformado la 52 ministerioj kaj komisionoj de la Ŝtata Konsilantaro reduktiĝis al 41. Statistiko el 38 ministerioj kaj komisionoj montras, ke escepte de la kumulaj ministroj, la nombro de ministroj kaj vicministroj reduktiĝis de 505 al 167, kies meznombra aĝo estas 58 jaroj, ses jarojn malpli ol antaŭe. Ministroj, kiuj havas klarecon de altlernejo, konsistigas 37% antaŭe, sed 52% nun. Laŭ statistiko el 28 ministerioj kaj komisionoj, la nombro de departementoj kaj burooj sub tiuj ministerioj reduktiĝis de 720 al 488, kaj la nombro de iliaj estroj reduktiĝis de 2 450 al 1 398, kies meznombra aĝo reduktiĝis de 59 al 54. 49% de tiuj kadroj havas klarecon de altlernejo, sed antaŭe nur 36% havis tiugradan edukon.

## ĈINIO PUBLIKIGIS KOMUNIKON PRI PLENUMADO DE LA NACIA EKONOMIA PLANO DE 1981

La Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio informis en la fino de aprilo, ke

la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo en 1981, kalkulata laŭ la konstantaj prezoj de 1980, estis 749 000 milionoj da juanoj, kio estis plimultiĝo je 4.5% kompare kun tiu de 1980. La nacia enspezo estis 388 000 milionoj da juanoj, je 3% pli alta ol tiu de 1980.

La komunikado diras, ke surbaze de la disvolvo de produktado pli kaj pli vigliĝis la en- kaj eksterlanda komerco kaj pliboniĝis la popola vivo.

La komunikado ankaŭ diras, ke fundamente efektiviĝis ekvilibro en spezado en 1981; la prezoj de plejparto de la varoj estis stabilaj, la proporcioj de la ĉefaj branĉoj de la nacia ekonomio daŭre pliraciĝis kaj plie disvolviĝis la produktado.

La ĉefaj problemoj de la nacia ekonomio en 1981 montriĝis en tio, ke ankoraŭ nesolida estis la ekvilibro de la spezado, leviĝis la prezoj de iuj komercaĵoj, malmulte profitis granda parto de la entreprenoj, iom reduktiĝis la energia produktado kaj la produktado de porkonsumaj varoj ne kontentigis la aĉetpovon de la socio.

## LA UNUA ĈINA PASAĜERA AVIADILLO DEBUTIS EN PEKINO

La aviadilo "Yun-7" por mallonga kaj meza distanco debutis en aprilo. Ĝi faris demonstradon kun 41 personoj en si. Sep minutojn post la ekleviĝo ĝi atingis altecon de 3 000 metroj kaj flugis je hora rapideco de 410 kilometroj kaj sekure surteriĝis.

La aviadilo havas 48 sidlokojn. Ĉinio jam produktis naŭ tiajn flugmaŝinojn. Baldaŭ oni produktos ĝin serie.

## ŜANHAJO — BAZO POR PROSPEKTORADO DE OLEO KAJ GASO EN LA ORIENTA ĈINA MARO

Kun la disvolviĝo de la esplorado por oleo kaj gaso en la Orienta Ĉina Maro Ŝanhajo fariĝis ĝia plej granda bazo.

Nun la bazo havas oketaĝan domon kiel komandan centron, laboratorion, komputilan stacion, ses oceanajn esplorsipojn, unu putoboran stacion, dek servoŝipojn, du konstantajn ĝetkajojn kaj staplojn, aŭtan taĉmenton kaj komunikantan stacion. Tie laboras pli ol 2 300 teknikistoj kaj laboristoj.

La du 3 300-tonelaj esplor-sipoj "Haiyang n-ro 1" kaj "Haiyang n-ro 3" de la bazo sin trovas en la vicoj de grandaj samspecaj ŝipoj en la mondo. Ili estas ekipitaj per satelita naviga sistemo, cifera sismografo, gravitomezurilo, magnetomezurilo kaj aliaj modernaj aparatoj.

De 1974 la ŝipo "Haiyang n-ro 1" faris esploradon per sismo, gravito kaj magneto, profundmezurado, kolektadon de specimenoj kaj putoboradon en kontinenta breto de la Orienta Ĉina Maro kaj akiris grandan kvanton da geologia materialo.

La du 3 300-tonelaj esplor-sipoj konstatis, ke la Orienta Ĉina Maro havas esperigan perspektivon pri konservo de petrolo kaj gaso.


## KONSTRUADO DE "VERDA GRANDA MURO"

Ĉi-jare la ĉina registaro disponigos 40 milionojn da juanoj por la forstozono 7 000 kilometrojn longa de Heilongjiang-provinco en la Nordoriento ĝis la Xinjiang-a Uĝura Aŭtonoma Regiono en la Nordokcidento.


La Forsta Buroo de Nordorienta, Norda kaj Nordokcidenta Ĉinio ĉi-jare planis arbarizi milionon da hektaroj en 190 gubernioj suferantaj de sablo kaj leŭso, kaj por tio pretigis 2 500 milionojn da arbidoj.

La "Verda Granda Muro" trairos 11 provincojn kaj la konstruado komenciĝis en 1978. Ĝis nun la ĉina registaro jam disponigos 300 milionojn da juanoj, konstruiĝis forsto kun areo de tri milionoj da hektaroj kaj plenumiĝis kulturado de arbidoj sur 330 000 hektaroj.





Ripozeto post promenado



Opero prezentata kaj rigardata de emeritoj



En tetrinkejo

Matena korpoekzercado






# Plezuroj de maljunuloj

Fotoj de YAN ZHONGYI kaj QU WEIBO


En Ĉinio la maljunuloj estas prizorgataj kaj respektataj de la tuta socio. Plejparto de la emeritoj plezure vivas kune kun siaj gefiloj. La vivo de la senhelpaj maljunuloj estas bone zorgata de la popola registaro, kaj ili feliĉe pasigas siajn lastajn jarojn. Ili ankaŭ volentas fari ion utilan por la socio. Jen fotoj pri ilia vivo.

La 102-jara Gao Junfeng estas membro de la Chongwen-distrikta komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco, Pekino.











Čiu havas sian šatokupon.







Praavo kaj pranepo

## En Zhengzhou

## kaj Huayuankou

de ZHENG ZHENJIE

**A** DIAŬINTE Luoyang, mi trajne daŭrigis mian vojaĝon orienten kaj atingis Zhengzhou, la ĉefurbon de Henan-provinco. Ĝi estas politika, ekonomia kaj kultura centro de la provinco.

### RONDVETURO EN LA URBO

La trian tagon post mia atingo de Zhengzhou, mi trarigardis la urbon.

La urbo estas grava trafikpunkto. Tie kruciĝas du fervojoj: unu interligas la partojn orientan kaj okcidentan de Ĉinio, kaj la alia ĝiajn nordan kaj sudan partojn. En la suda parto de la urbo estas ĉiuj departementoj sub la Fervoja Buroo de Zhengzhou, kiuj okupas kvaronon de la areo de la tuta urbo. Tie estas ne nur la stacioj por pasaĝeroj kaj varoj, ĝia ofic-domego, sed ankaŭ vicoj post vicoj da loĝdomoj por la fervojistoj.


La administra kvartalo troviĝas en la orienta parto de la urbo, kie situas ankaŭ la provincaj oficejoj, sciencaj institutoj, muzeo k.a.

Ĉe la urbo ofte blovas nordorienta vento, pro kio ĝia industria distrikto situas en la okcidenta parto de la urbo. Tie troviĝas multaj fabrikoj, kiel la Unua, Tria, Kvara, Kvina kaj Sesa Kotonteksejoj kaj la Tinktura Fabriko. Mia vojqvidisto diris al mi, ke nun en la urbo havas 400 000 spindelojn kaj 15 000 teksmaŝinojn, pro kio la urbo jam fariĝis kotonteksa bazo

kaj estas kromnomata ŝpinteksa urbo.

Krom la ŝpinteksaj entreprenoj, en la urbo estas ankaŭ pli ol cent grandaj fabrikoj de alumina rafinado, smirgaj radoj, kabloj, cigaredoj, metalurgio, maŝinoj, aŭtoj kaj traktoroj, kiuj povas produkti pli ol kvin mil specojn de industriaj produktaĵoj. La urbo havas 1.7 milionojn da loĝantoj, inter kiuj pli

*La verda Zhengzhou*





## VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (4)

ol ducent mil estas industriaj laboristoj.

### LA VERDA URBO

Antaŭe la urbo Zhengzhou estis polvoza kaj kota en pluvtago, pri kio tenas bonan memoron iuj pli aĝaj loĝantoj. Sed kiam mi supreniris la monton en la parko Zijingshan, mi vidis, ke la tuta urbo kvazaŭ flosus en verda maro.

La urbo situas sude de la Flava Rivero kaj distancas de ĝi 18 kilometrojn. En 1938, kiam la japanaj invadantoj proksimiĝis al ĝi, la Kuomintanga garnizono detruis la tian riverdigon per eksplodo, ne zorgante pri la vivo de milionoj da loĝantoj. La

riverakvo inundis grandan areon kaj dronigis 890 000 homojn. Plie 12 milionoj da loĝantoj estis plagitaj. Tiuj lokoj, kiujn trafluis la inundo kun amasego da sablo, konsistigis vastan inunditan areon, kie ondis sennombraj dunoj. Nord-oriente de la urbo estis pli ol 400 dunoj, kiuj moviĝis al la urbo je rapideco de 5 metroj jare. La vento kun sablo ofte nebuligis la urban ĉielon.

La tieaj loĝantoj, suferintaj de la vento kun sablo, dediĉis sian apartan atenton al plantado de arboj por subjugi la sablan damaĝon. Nun ambaŭflanke de la urbovoj kreskas platanoj, paŭlovnioj, poploj, akacioj, plorsa-

likoj kaj sikomoroj. Iliaj branĉoj interkruciĝas kaj havas densan ombbron. Promenante surstrate, oni sentas sin kvazaŭ en verda koridoro. Oni diris al mi, ke en la urbo oni jam plantis tri milionojn da arboj, gazonigis 210 000 kvadratajn metrojn, tiel ke 32% de la tuta urbo estas kovritaj de verdaĵoj.

La oficejoj, fabrikoj kaj lernejoj impresas kiel bela parko. Tie la aero estas freŝa kaj la arboj prosperaj. Sole en la Tria Kotonteksejo oni plantis proksimume dek milojn da paŭlovnioj, pomarboj, pirarboj kaj robinioj kaj 900 specojn da floroj, ekz. krizantemoj, peonioj, ĉinaj rozoj, osmantoj k.a.

*La pramejo Huayuankou ĉe la Flava Rivero*





## VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (4)

Ambaŭborde de la riveroj Jinshui kaj Xiong'er, kiuj trafluas urbajn distriktojn, jam formiĝis verdaj muroj de arboj plantitaj dum la lastaj pli ol dudek jaroj. Plibeligas la urbon la arabaj zonoj kune kun la surakva parko Xiliuhu kaj la parkoj Laodong kaj Renmin, kies gazonoj etendiĝas de okcidente orienten laŭ la rivero Jinshui.

### REFOJE ANTAŬ LA FLAVA RIVERO

Forlasinte la urbon Zhengzhou, mi veturis duonhoron kaj atingis Huayuankou. Tie mi supreniris la digon de la Flava Rivero kaj vidis, ke antaŭ mi etendiĝis larĝa rivero, kiu torentas orienten. Ambaŭborde de la rivero sterniĝas senlima verda kamparo. Ĉe la digo la akvokonduka kaj pompa stacioj irigas la akvon de la rivero al la tritikkampoj.

Mi klopodis trovi postsignon de la inundo en 1938 el la vidaĵoj antaŭ mi, sed malsukcesis. Nun ĉie kreskas nove plantitaj arboj. La vojoj estas nove pavimitaj. Unu fervojo, kiu speciale servas la Flavan Riveron, kaj unu ŝoseo etendiĝas paralele kun la granda riverdigo. Proksime de la digo sterniĝas vasta fekunda tero, irigaciata de la rivero. Tia loĝanto diris al mi, ke en la komunumo Huayuankou oni jam fosis pli ol 400 putojn. 2 133 hektaroj da kampoj estas bone irigaciataj kaj pro tio estas garantiata dufoja rikolto de rizo kaj tritiko.

Inter la konstruantoj de Huayuankou troviĝas nemalmultaj

postvivantoj de la katastrofo kaj ilia idaro. Tie mi renkontis Shi Xiaosan, kiu estis nur sesjara en 1938, kiam okazis la katastrofo. Kaj kiu, savite, fariĝis vagabondo. Li revenis al sia hejmloko post la Liberiĝo kaj partoprenis la tiean rekonstruadon. Nun li laboras kiel gvidanto ĉe la elektra pumpstacio ĉe la digo.

### IRIGACIA PUMP-STACIO MANGSHAN


La Flava Rivero trapasas multe da malprofundaĵoj ĉe Zhengzhou, kio malutilas al la ŝipveturado. Tial la rivero povas nur irigacii kampojn kaj liveri akvon al la industrio kaj popola vivo. Por informiĝi pri la uzado de la akvo, mi speciale vizitis la Irigacian Pump-stacion.

La stacio situas ĉe deklivo de Mangshan-monto, nordokcidente de Zhengzhou. Ĝi dorse sin apogas al la monto kaj rigardas al la Flava Rivero. Laŭ

aspekto ĝi similas al alta fabrikdomego. La stacio unue kondukas akvon el la rivero en la kluzon, kaj tie oni per ok pumpiloj kondukas akvon tra ok tuboj ĉiu kun diametro de unu metro al la loko kelkdek metrojn alta, de kie oni kondukas la akvon per akvopumpiloj al la montosupro. Tie la sablo en la akvo precipitiĝas, kaj la klara akvo estas kondukita en la akvoturon.

Proksime de la stacio situas ĝardeno, en kies kiosko mi rigardis la riveron ĉe la montpiedo: La rivero torentas de okcidente kaj formas vastan lagon ĉe ĝi. Kaj de tie ĝi iras orienten kaj perdiĝas en la nebula malproksimo. Du pontegoj, kvazaŭ ĉielarkoj, kuŝas super la rivero: Unu estas iama fervoja ponto konstruita antaŭlonge sed nun funkcianta kiel ŝosea ponto kaj la alia estas nove konstruita dutraka fervoja ponto, tra kiu bruante trairas vagonaro po minutoj.

*La kanalo Popola Venko apud Zhengzhou*



# Sekreto en gajno de krono

— Notoj pri vizito al la Ŝanhaja Kotonvelura Fabriko

**A**NTAŬ mi staras viro de pli ol 40 jaroj, mezastatura kaj fortika, kun energio neniam elĉerpebla. Li estas Zen Weicai, ĉefa respondeculo de la fabriko. Forte premante al mi la manon, li diris: “Kiajn opiniojn vi aŭdis pri la kordurojo de nia fabriko?” Poste li rimarkis, ke la demando estas iom malĝentila, kaj ridete petis min sidiĝi.

En koridoro de la fabrika administrejo, mi iris post du personoj, ŝajne inĝenieroj, kaj hazarde aŭdis ilian jenan interparolon: “Hieraŭ mi kaj mia edzino vidis surstrate knabinon en vesto el maldika kordurojo produktita de nia fabriko . . .” “Kia mirindaĵo troviĝas en tio?” “Ŝi portis ĉemizon el kordurojo kiun oni ordinare uzas kiel ma-

terialon por jupo. La ĉemizo estis tre bela. Mi longtempe sekvis ŝin, kio multe embarasis ŝin.” “Ĉu via edzino koleriĝis pro tio?”

Kiam mi estis trairanta la viligan laborejon, iu maldika alta junulo alpaŝis kaj demandis min, frapante mian ŝultron: “Ĉu vi estas ĵurnalisto?” Mi kapjesis. “Ĉu vi vizitis la Kordurojan Fabrikon de Changzhou? Kiel ĝi statas? Kiajn novajn specojn ĝi prezentas?” Li ŝutis sur min salvon da demandoj. Post kiam mi diris al li, ke mi ne vizitis Changzhou, li foriris malgaje.

En la ekspoziciejo de novspecaj produktaĵoj de la Ŝanhaja Kotonvelura Fabriko bela knabino plendis al mi: “Vidu, mi vicatendis kvar horojn, sed mi

sukcesis aĉeti nenion. Ĉiuj produktaĵoj elvendiĝis.” Mi demandis, kial ŝi nepre volas aĉeti kordurojon. Kun okuloj larĝe malfermitaj pro miro, ŝi diris: “Vi ĵurnalisto ne scias la nunan kordurojan furoron?” Poste ŝi honteme diris al mi, ke ŝi baldaŭ edziniĝos, kaj tial volas aĉeti kordurojon por fari sofotegilojn kaj fenestrokurtenojn. Fine ŝi bedaŭre foriris en suspiroj.

Estis verŝajne ĝuste tiuj maldordaj impresoj, kiuj vekis en mi profesion intereson kaj instigis min esplori la produktadon de la Ŝanhaja Kotonvelura Fabriko. En tri jaroj la fabriko savis sin el la marĉo de malbona kvalito, monotonaj specoj kaj longdaŭra stagna vendado de kordurojo, kaj gajnis arĝentan ŝtatan medalon pro bonkvalita produktaĵo kiel ankaŭ titolon de “Fama Produktaĵo” donitan de la Tekstila Ministerio. Ĝiaj produktaĵoj ektrovis grandan debiton en la tuta lando.

La Ŝanhaja Kotonvelura Fabriko estas kaj tinkturejo kaj teksejo produktanta kordurojon kaj kotonan veluron kun presitaj desegnaĵoj. En la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj ĝi ĝuis altan famon pro sia helkolora kordurojo, sed poste kotona-polies-teraj kaj mezlong-fibraĵaj ŝtofoj supere rivalis kun kordurojo. Precipe en la dekjara tumulto de 1966 ĝis 1976, la produktado de la fabriko estis en haoso kaj la kvalito de ĝiaj produktaĵoj malaltiĝis. Tial ĝi multe distancis de sia rivalo, la Korduroja Fabriko de Changzhou. En la Kan-

Projektistoj



tona Foiro de 1975 ĝi ricevis mendojn de eksterlandaj komercistoj egalajn al tridekono de tiuj ricevataj de la Korduroja Fabriko de Changzhou. En la Tutlanda Kunveno de Kvalitotaksado de Tekstilaĵoj de 1979, diverskoloraj kordurojoj de la Korduroja Fabriko de Changzhou ricevis la honoran titolon "Produktaĵo de Fama Marko", tial la Ŝanhaja Kotonvelura Fabriko perdis sian kronon.

La fiaskoj skuis la gvidantojn kaj laboristojn de la fabriko kaj vekis ilin el la multjara inerto. La gvidantoj de la fabriko plurfoje kunvokis teknikistojn kaj interkonsiliĝis kun veteranaj laboristoj. Post seriozaj analizo kaj esplorado ili fine trovis la kialon de la malsukcesoj: Pro longtempa neglekto al enketo pri la merkato, ĝiaj produktaĵoj fariĝis monotonaj kaj la specoj de kordurojo malnovaj, kio tute ne povis plenumi la bezonon de la popolo. La gvidantaro de la fabriko tuj sendis teknikistojn al Changzhou por lerni ĝian bonan sperton kaj al ŝtofvendejoj por kolekti opiniojn de klientoj.

Kun la leviĝo de la popola vivnivelo, precipe post kiam la kamparanoj ekhavis pli da enspezo, la klientoj fariĝis pli postulemaj rilate vestadon. Mez-kaj altgradaj ŝtofoj trovis grandan debiton kaj pliiĝis ankaŭ la aĉetkvanto de la ŝtofoj por enĉambra uzo kaj mebla ornamo.

La teknikistoj de la fabriko plie analizis la staton de sia fabriko kaj tiun de la Korduroja Fabriko de Changzhou. Kvankam iliaj ekipaĵoj estas malnovaj kaj la fabrikdomoj tro malgrandaj, ili tamen posedas pli altan nivelon de teknikoj en teksado,



*Laboristinoj kontrolas la kvaliton de produktaĵoj.*

desegno-presado, desegna kaj teknologia projektado. Ĉar la Korduroja Fabriko de Changzhou superas ilian fabrikon en produktado de diverskoloraj kordurojoj, ili decidis ĉefe disvolvi novajn specojn de kordurojo kun presitaj desegnaĵoj.

Pasis du jaroj kaj ilia klopodo rikoltis sukceson. Ili sukcese provproduktis pli ol ducent novajn specojn kun pli ol mil varioj. Iliaj produktaĵoj vendiĝis en Usono, Japanio, FR Germanio, Singapuro kaj aliaj sume pli ol 40 landoj. La produktokvanto de ilia kordurojo en 1980 superis je 46% tiun en 1976. En la tiujara tutlanda kvalitotaksado la kvalito de iliaj produktaĵoj superis tiun de la Korduroja Fabriko de Changzhou, tiel ke iliaj kordurojoj kun presitaj desegnaĵoj ricevis arĝentan medalon. Antaŭ la nacifesto de 1980 la fabriko okazigis ekspozicion en la plej granda magazeno en Ŝanhajo kaj Pekino kaj vekis sensacion. En Ŝanhajo

elĉerpiĝis en du horoj tiom da ŝtofo, kiom laŭ ilia takso vendiĝus en unu tago, dum en Pekino la klientoj estis tiel multaj, ke ili preskaŭ renversis vendotablojn.

La fabriko havas 20 inĝenierojn kaj pli ol cent teknikistojn por kiuj la gvidantaro ĉiamaniere kreis bonajn kondiĉojn por disvolvi ilian iniciatemon.

Ekde la sepdekaj jaroj furoris en la mondo flanelo simila al ĉama ledo, sed ĝin povis produkti nur malmultaj teknike progresaj landoj. Unu eksterlanda komercisto proponis, en intertraktado kun la fabriko, vendi al la fabriko kompletan ekipaĵon kaj la koncernan teknikan patenton por kvin milionoj da usonaj dolaroj. Iu maljuna inĝeniero de la fabriko, kiu iam studis en Usono, opiniis, ke la propono estas tro multekosta kaj la fabriko ne devus importi. Esplorinte specimenon de ĉamleda flanelo de alia lando, li




proponis, ke la fabriko mem provproduktu la bezonatajn ekipaĵojn por produkti tian ŝtofon. La fabrika gvidantaro akceptis lian proponon kaj diris al li: "Vi agu kuraĝe, ni respondecos." Post peniga laboro de pli ol 4 monatoj, elspezinte ĉ. 300 000 juanojn, ili ekproduktis bonkvalitan flanelon similan al ĉama ledo. La produktaĵo ricevis laŭdojn kaj bonvenigojn de multaj konsumantoj.

La fabriko havas ok desegno-projektistojn. Por pligrandigi ilian vidkampon, la gvidantaro de la fabriko kreis por ili favorajn kondiĉojn, por ke ili ofte povu enketi la staton de la merkato kaj viziti pitoreskejojn por fari skizojn. Ili projektis diversajn porornamajn kordurojojn kun desegnaĵoj de orfiŝoj, mondfamaj pentraĵoj kaj parkoj de Suzhou.

Generale oni portas kordurojajn vestojn en printempo, aŭtuno kaj vintro, kaj ne en somero. Unu inĝeniero volis projekti kelkajn specojn de maldika kordurojo taŭga por someraj jupoj. Post dumonata klopodo li sukcesis, kaj sur merkato aperis maldika kordurojo traktita per speciala teknologio, kiu havas diafanajn desegnaĵojn kaj donas al la portantoj malvarmeton. Ankoraŭ estas aliŝpeca kordurojo simila al veluro kun enteksitaj oraj kaj arĝentaj fadenoj. Jupoj kaj roboj el tia ŝtofo estas tre elegantaj.

Nun mi devas fini mian artikolon, ĉar la Ŝanhaja Kotonvelura Fabriko okazigas refoje ekspozicion de siaj novaj specoj de kordurojo en Pekino kaj ankaŭ mi volas min puŝi en la homamasojn por elekti por mi taŭgan ŝtofpecon.

*Nova speco de kotona veluro ŝatata de klientoj*



## En la natur-rezervejo de Changbai-montaro

de ZHOU YUCHEN

**L**A impona Changbai-montaro kiel longa drako kuŝas en la orienta parto de la provincoj Liaoning, Jilin kaj Heilongjiang. Ĝia ĉefa pinto en Ĉinio sin kaŝas en vasta arbaro de sudorienta Jilin. En 1960 Ĉinio starigis la natur-rezervejon de Changbai-montaro, kaj en januaro 1980 Unesko metis la lokon en la rezervejaron de la internacia biosfero. La rezervejo, kun areo de 217 000 hektaroj, estas la plej granda en Ĉinio. Kun plezuro ni vizitis ĝin en somero pasintjare.

La administracio de la rezervejo situas apud la rivero Erdaobai ĉe la supra baseno de Songhua-rivero. Frumatene ni ekveturis de tie al la montaro Changbai. Sovaĝaj fruktoj aromis en kvietaj, densaj arbaroj ambaŭflanke de la vojo. Kun la leviĝo kaj malleviĝo de la montodeklivoj la primitiva arbaro serpentumas kaj etendiĝas malproksimen. Nia aŭto moviĝis kvazaŭ boato

veturanta sur verda maro. Nin salutis la arboj dekstre kaj maldekstre. Foriĝis la malantaŭaj kaj alkuris la antaŭaj. Tiuj kelkdekmetrojn altaj arboj similas al grandaj verdaj ombreloj. Tra densa arbokrono penetris multaj strioj de sunlumo kvazaŭ radiaroj de scenejaj lumoj. Eĉ tiuj lumkolonoj fariĝis verdaj en la arbaro.

Rezerveja prizorganto Lao Jin montradis al ni diversajn arbojn kvazaŭ siajn proprajn trezorojn, kiel la alta ruĝa pino, la lariko kun krono simila al pagodo, la rara arbo kun trunko flava ene kaj la delikata tilio. El ili la alte staranta ruĝa pino impresis nin plej profunde. Ĝia ŝelo estas ruĝa kaj flaveta, ĝiaj branĉegoj etendiĝas horizontale kaj ĝiaj branĉetoj leviĝas supren kiel belaj brakoj. Oni donis al tiu montara arbospecio la nomon "pino-belulino", kiun ĝi vere meritias.

Dume nia aŭto transiris ponteton. Sub la ponteto fluis klara rivereto, super kiu libere flugis paroj da birdoj kun ĉarma plumaro. "Ĉu vi konas tiajn birdojn?" Lao Jin demandis kaj mem respondis, ke ili estas ambirdoj. Ili amas kunesti duope. Li daŭrigis: "Changbai-montaro estas ne nur grandega verda trezorejo kun virgaj praarbaroj sed ankaŭ mondo plena de raraj bestoj, kiel la nordorientĉinia tigo, makulcervo, zibelo, lutro, ruĝverta gruo kaj ambirdo. Post la starigo de la naturrezervejo la tieaj bestoj kaj vegetaloj estas bone protektataj. Nun nia naturrezervejo havas pli ol 50 specojn de bestoj, pli ol 200 specojn de birdoj kaj ankaŭ pli ol 1 800 specojn de rampuloj, fiŝoj kaj aliaj bestoj kaj vegetaloj."



*Tianchi-lago en Changbai-montaro*

Nia aŭto limake rampis supren en la montaro. Iom post iom malaperis la larĝfoliaj arboj ambaŭflanke de la vojo kaj ekaperis pingloarboj, kiel ruĝa pino, piceo kaj abio. Kiam ni atingis protektejon de termofonto 1 800 metrojn super la marnivelo, la vojo fariĝis pli kruta, la klimato pli malvarmeta kaj la vento pli granda. Pli supre de la protektejo kuŝas Baitou-monto, la ĉefa pinto de Changbai-montaro. Surmetinte lanvestaĵon, ni elaŭtiĝis kaj komencis grimpi supren. Tie kreskas nur betuloj. Pro granda vento kaj malalta temperaturo la betuloj perdis sian ĉarman aspekton kaj fariĝis malaltaj kaj kadukaj. De iliaj trunkoj, kiu estas proksimaj al la tero, elkreskis kelkaj kurbaj trunketoj kvazaŭ maljunaj kverkoj priskribitaj en fabelo de Andersen.

La absoluta alteco de la monto estas malpli ol 3 000 metroj. Sed pro la malsameco de la terenoj oni povas travivi en kelkaj horoj la kvar sezonojn de la jaro kaj vidi la malsamajn flaŭrojn de la mezvarma zono ĝis la malvar-

ma. Ni jam vidis du flaŭrojn: unu estas la zono de pingla- kaj larĝa-foliaj arbaroj 600-1 200 metrojn super la marnivelo kaj la alia estas la pinglo-arbara zono 1 200-1 800 metrojn super la marnivelo. La zono de betularo, kie ni staris, estas 1 800-2 000 metrojn super la marnivelo. Pli supre estas la zono de altmonta frostiĝinta tero. Tia vertikala dispozicio prezentas miniaturon de la horizontala dispozicio de la flaŭroj en la norda parto de Eŭropo kaj Azio.

Ni ripozetis en betularo kaj subite ekvidis paron da grandaj viglaj okuloj en arbetaro kelkdek metrojn fore. Ni retenis la spiron kaj kaŭriĝis malantaŭ arbo. Post momento singardeme eliris makulcervo. La blankaj makuloj sur ĝia korpo similis al umefloroj kaj la paro da altaj kornoj sur ĝia kapo similis al arbetoj. Timeme rigardinte ĉirkaŭen, ĝi levis la kapon kaj ekblekis. Aŭdinte ĝian blekadon, aliaj kvar elkuris. Poste ili ĉiuj komencis iri en vico. "Sume kvin!" mi diris pretervole. Aŭdinte mian voĉon, ili



tuj ekkuris kaj klak-tuŝis arbo-branĉojn. Ni miris, ke ni forgesis foti. Lao Jin diris: “Troviĝas malmultaj bestoj en la betularo. Tiuj cervoj venis supren por somerumi.”

Ni eliris el la betularo kaj vidis neniun arbon plu. Tie estas la zono de altmonta frostiĝinta tero. Dank’ al la sunradioj, en la arbustaro kaj herbaro kreskas buntaj floroj, kiuj formas grandan girlandon ĉirkaŭantan la monton Baitou. Estas neimageble, ke sur monto 2 000 metrojn super la marnivelo troviĝas tiel bela ĝardeno. Ni plukis kelkajn florojn, metis ilin sur la ĉapon kaj grimpis sur Baitou-monton sen spirhalto.

Dek ses pintoj de la monto staras ĉirkaŭ Tianchi-lago. Iuj el ili similas al flugiloj de aglo kaj aliaj aspektas kiel jada kolono skrapanta la ĉielon. Ili havas kolorojn grizetan, flavetan, ruĝan, violan, verdan. . . Nordokcidente de la lago estas la kruta montpinto Baiyun, la plej alta en nordorienta Ĉinio, 2 691 me-

trojn super la marnivelo. Vidalvide al ĝi staras la 2 749 metrojn alta montpinto “Generalo”, la plej alta el la montpintoj de Baitou, kiu troviĝas en nia najbarlando Koreio. Tianchi-lago, konata kiel la komuna lago de Ĉinio kaj Koreio, aspektas kiel safira inkrustajo inter montpintoj. Ĝi kun klara akvo spegulanta blankajn nubojn kaj altajn montpintojn impresas per kvieteco kaj profundeco.

“Antaŭe Tianchi ne estis tiel kvieta,” diris Lao Jin. Inter la jaroj 1597 kaj 1702 tie okazis tri grandaj erupcioj. La lago formiĝis ja el kratero, en kiu iom post iom akumuligis akvo. La meza profundeco de la lago estas 204 metroj kaj la plej granda profundeco 373 metroj.

Ni estis ĝuantaj pejzaĝojn, kiam subite alflugis nuboj de malproksime. Post momento la nuboj kovris la montpintojn kaj la lagon. Ni vizitantoj ne povis vidi nin reciproke, kvankam ni distancis unu de alia nur je kelkaj paŝoj. Post dekelkaj minu-

toj la nuboj disiĝis kaj denove montriĝis belajoj.


Ni iris norden de la lago kaj vidis ravinon inter du montpintoj. La akvo de la lago trafluas ĝin kaj falas de la krutajo. Jen impona akvofalo. La akvofalo kun alteco de 68 metroj estas la plej alta en Ĉinio. Ni proksimiĝis al la plaŭdanta akvo. La faltantaj akveroj fariĝis kiel nebulo, en kiu montriĝis buntaj arkoj dank’ al la sunbrilo. Lao Jin diris al ni, ke la rivero Songhua fontas el Changbai-montaro, kiu estas ankaŭ la fonto de la riveroj Tumen kaj Yalu.

Tiuvespere ni banis nin en la termofonto proksime de la akvofalo kaj post tio ni noktis en hotelo ĉe la piedo de Baitou-monto. Sub la hele brilanta luno la montpintoj, la akvofalo, la termofonto kaj la arbaro prezentigis denove antaŭ niaj okuloj. La malvarmeta vento enblovis en niajn orelojn la flustradon de rivero, la ĉirpadon de cikadoj kaj la pepadon de birdoj. Kaj ni endormiĝis en akompano de tiu simfonio de la naturo.

*Ruĝa cervo, unu el la sovaĝbestoj en Changbai-montaro*







# *Kvar Sezonoj de Changbai-montaro*

Fotoj de LI LI kaj WANG YING

Printempaj floroj





Somera arbaro



Vintra neĝo







Ora autuno



FOTOJ PRI NATU-  
RAJ BELAĴOJ FA-  
RITAJ DE E-ISTOJ

de IVICA SPOLJAREC  
(Jugoslavio)

Leontodoj en nor-  
da Jugoslavio



MIKSITA  
PLADO



Ĉinaj pladoj



# Darvino — scienca koloso

C. R. Darvino

**L**A 24-an de novembro 1859 okazis io eksterordinara en Londono.

Tiutage svarmoj da urbanoj de Londono torentis en iun libron por aĉeti novan libron “La Origino de Specioj”. Ĝi estis la unua granda verko de la fondinto de la evoluismo Charles Robert Darwin. La 1 250 ekzempleroj de ĝia unua eldono rapide elĉerpiĝis en la unua tago de la apero kaj grandan bedaŭron sentis tiuj, kiuj ne sukcesis aĉeti ĝin. La eldoninto, kiu komence ne tre volis akcepti la presadon de la libro, multe vigliĝis de la bona vendado kaj eldonis ankoraŭ

3 000 ekzemplerojn. Ankaŭ tiuj baldaŭ forvendiĝis. Nemalmultaj legantoj de aliaj landoj en Eŭropo sendis leteron por mendigi la libron, kio ja estis malofta fenomeno tiutempe.

## MONDSKUA EVOLUISMO

En sia libro Darvino skribis: “Mi plene kredas, ke la specioj ne estas senŝanĝaj”, “Mi rigardas ĉiujn plantojn kaj bestojn ne kiel apartajn kreaĵojn, sed . . . kiel rektajn posteulojn de iuj malmultaj vivaĵoj.” Tiuj liaj vidpunktoj, kvazaŭ tondro en serena ĉielo, skuis la tutan Eŭropon kaj eĉ la tutan mondon, ĉar antaŭ

tio multaj kredis je «Genezo» la unua libro de la jud-kristara “Malnova Testamento”, ke ĉiuj vivaĵoj inkluzive de la homo estas kreitaj de Dio en la daŭro de ses tagoj. Regate de teologio la biologio fariĝis komentario de «Genezo», kiu distrumpetis, ke ĉiuj bestoj kaj plantoj estas kreitaj de Dio kaj, kiel kreaĵoj laŭ la volo de Dio, ili estas neŝanĝipovaj. “La Origino de Specioj” rompis la katenon de «Genezo».

En la komenco Darvinon subtenis personoj tre malmultaj sed fortaj, inter kiuj estis la biologoj Thomas H. Huxley kaj Joseph Dalton Hooker. En sia letero al

## Miksita plado

### Materialoj:

muelita porkoviando	150 g.
muelita fiŝviando	150 g.
freŝaj salikokoj	10
ovoj	4
platoj el amelo kaj salikoko	100 g.
orelfungoj akvotrempitaj	50 g.
verda kapsiko	1
sal	10 g

vino	15 g.
trapa amelo	10 g.
kokvianda supo (sen viando)	1 000 g

### Preparado:

1. Miksu la muelitan porkoviandon kaj fiŝviandon aparte kun vino, salo kaj trapa amelo. Faru bulojn el la fiŝvianda miksaĵo kaj ilin kuiru.

2. Disrompu kaj plene batu la ovojn, varmigu la kaserolon kun iom da oleo, enverŝu en ĝin la bati-tajn ovojn, sterni ilin en krespojn kaj sur ilin metu la muelitan por-

koviandon. Kunvolu kaj vaporumu ilin. Tranĉu en pecojn la kunvolvaĵojn, kiam ili malvarmiĝis.

3. Forigu la antenojn kaj piedojn de la freŝaj salikokoj kaj ilin fritu.

4. Miksu trapan amelon kun la platoj el amelo kaj salikoko kaj fritu ilin.

5. Aldonu en la kaserolo la kokviandan supon, kondimentojn, fiŝbulojn, kunvolvaĵajn pecojn, frititajn salikokojn kaj platojn el amelo kaj salikoko, orelfungojn kaj kapsikpecojn. Plene vaporumu ilin kaj poste ĝuu la pladon.



Darvino Huxley diris: “Vi kredis, ke ĉiuj prudentaj homoj dankos vin ĉiam, lasu boji la hundadojn . . .” Leviĝis en diversaj landoj de Eŭropo debato inter la sciencoj kaj teologio. En junio 1860 okazis en Oksfordo granda debato, en kiu la evoluismo akiris decidan venkon. Ĝia granda eĥo en la mondo forte ekscitis eĉ famajn scienculojn.

## LONGA KAJ MALFACILA VOJO

Darvino naskiĝis la 12-an de februaro 1809 en urbeto apud la rivero Severn en okcidenta Anglio en familio de fama kuracisto. Lia patro esperis, ke li heredos la profesion. Post la diplomitiĝo el mezlernejo Darvino studis medicinon en la Universitato de Edinburgo laŭ la deziro de sia patro. Tamen lin forlogis la intereso pri biologio. Lia patro, malkontenta pri sia filo, postulis, ke li studu teologion en la Universitato de Kembriĝo. Tie li sisteme studis botanikon kaj geologion. Post la diplomitiĝo el la universitato li faris sciencajn esploradojn ĉie en la mondo, veturante sur la ŝipo “Beagle”, en kvin jaroj kiel natursciencisto. Tio estis ege malfacilaj kvin jaroj, tamen li metis en tiu tempo fundamenton por la estonta brila sukceso de siaj aferoj. Malfeliĉe, ĉe la provnavigado de la ŝipo “Beagle” lin subite atakis kormalsano. Sed li kaŝis tion antaŭ aliaj kaj suriris la ŝipon. Marmalsano turmentis lin tage kaj nokte, sed li eltenis. En la esplorado li grimpis sur multajn neĝmontojn, kie li ofte rigidiĝis de frostoj kaj iam terure suferis de neĝŝtormo. Por vidi pli multajn rarajn plantojn kaj bestojn, li emis iri en dezertajn regionojn. Kelkfoje li ne povis trovi eĉ guton da akvo por

sensoifigi sin post piedirado de dekelkaj horoj, kaj pli terure estis, ke lin ofte minacis tertremoj, atako de kanibaloj, serpentoj kaj rabobestoj. Venkinte diversajn malfacilojn per firma volo, li bonege finis sian esploradojn pri geologiaj statoj kaj faŭno kaj de flaŭro de ĉiuj kontinentoj. Precipe en 1835 li suriris la Galapagojn kaj trovis, ke birdoj de iu specio (*Gospiza*) sur ĝiaj diversaj insuletoj estas diferencaj unu de alia en formo kaj vivkutimoj. Poste li sciigis, ke origine neniu birdo troviĝis sur la insularo kaj post kiam la plej fruaj birdoj flugis el suda Ameriko, ili pli kaj pli multiĝis per generado. Pro la izoliteco de la insuloj kaj malsamaj cirkonstancoj la birdoj pli kaj pli diferenciĝis inter si. Sekve li konkludis, ke vivaĵoj ne estas neniel ŝanĝiĝipovaj, sed male, estas ŝanĝiĝipovaj. Similaj eltrovoj fine kondukis lin al malakcepto de la ideo, ke Dio kreis ĉiun specion, kaj li komencis esplori pri la evoluo de vivaĵoj.

En 1836 li revenis de la esplorado kun granda sukceso, tamen la longa vojaĝo detruis lian santon. Anstataŭ ripozo kaj edziĝo li tuj komencis ordigi la materialojn kaj verki disertaĵojn. Li ankaŭ kolektis faktojn pri vario de plantoj kaj bestoj sub malsovaĝiĝo kaj esploris la leĝojn de vario de plantoj kaj bestoj sub naturaj kondiĉoj per la teorio de selektado. Tiel li fondis la evoluismon kaj verkis la libron “La Origino de Specioj”, en kiu li eksplikis la evoluon de la specioj de bestoj kaj plantoj per natura selektado. Por tiu teorio li konsumis 20 jarojn kaj kiam la libro aperis en la mondo, li jam aĝis 50 jarojn kaj terure malfortiĝis. Tamen li sentis en tio grandan ĝojon, ĝuste kiel li mem di-

ris, “se mi povos iom kontribui al la naturaj sciencoj, tio estos la plej bona maniero uzi mian vivon”. Li ne haltis antaŭ siaj sukcesoj, sed post 12 jaroj li plenumis alian faman libron “La Deveno de Homo kaj Selektado en Rilato kun Sekso”, en kiu li pruvis, ke la homo devenas de simio. En siaj lastaj jaroj li okupis sin pri esplorado de botaniko kaj eĉ du tagojn antaŭ sia morto li ankoraŭ skribis raporton pri eksperimento de plantoj. Je la kvara horo de la 19-a de aprilo 1882 li forpasis en sia aĝo de 73 jaroj.

## GRANDA INFLUO

La jaro 1859 dividas la sciencajn historion en du partojn, la antaŭan kaj la postan. Pro la eldono de “La Origino de Specioj” okazis al la biologio revolucio kun profunda signifo. La biologio plene liberigis sin de la teologio kaj ideismo kaj rapide progresis. La evoluismo kondukis al profunda esploro de la materia bazo kaj leĝoj de la genetiko kaj variado kaj malfermis la vojon por disvolvi la molekulan genetikon kaj molekulan biologion. En la pasintaj cent jaroj la molekula biologio reviziis, riĉigis kaj perfektigis lian teorion, tamen la fundamentaj principoj de Darvino pri la genetiko, variado kaj natura selektado restas ankoraŭ bazo por koni la evoluon de plantoj kaj bestoj.

La evoluismo de Darvino havas signifon ne nur en la sfero de naturaj sciencoj. En la batalo inter materiismo kaj ideismo ĝi liveris al la unua solidajn argumentojn de naturaj sciencoj. Samtempe ĝi influas senescepte la konceptojn pri la socio kaj religio. En la fino de la 19-a jarcento ĝi enkondukiĝis en Ĉinion

kaj estis varme akceptita de la ĉinaj intelektuloj. La fama ĉina tradukisto Yan Fu ĉinigis lian libron "La Evoluo kaj Aliaj Traktaĵoj", per kio li bone informis pri la evoluismo. Ankaŭ Sun Jatsen, Li Dazhao kaj Lusin estis aprobantoj kaj diskonigantoj de la evoluismo. Mao Zedong montris, ke la evoluismo per sia teorio pri natura selekto kuraĝigis la ĉinan popolon en ĝia batalo kontraŭ feŭda superstiĉo kaj eksterlandaj agresantoj por vivrajto kaj progreso, kaj en la konstruado de sendependa kaj potenca Ĉinio.



*La 47-jara Darvino (1856)*

## OKAZE DE LA CENTA DATREVENO DE DARVINO

La 19-a de aprilo ĉi-jare estis la centa datreveno de la forpaso de Darvino, la mondfama brita natursciencisto kaj fondinto de evoluismo.

Tiutage la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj Ĉina Scienca kaj Teknika Asocio kune okazigis kunvenon por memori lin. La kunvenon ĉeestis preskaŭ mil biologoj, medicinistoj, antropologoj, agronomoj

kaj aliaj fakuloj. Iuj el ili faris prelegojn pri la evoluismo de Darvino kaj la disvastiĝo kaj influo de lia doktrino en Ĉinio.

Tiutage malfermiĝis en Pekino ekspozicio, kiu prezentis la vivon de Darvino, formiĝon de lia teorio kaj uzo kaj disvolvo de la evoluismo en Ĉinio. Ĝi montris fotojn de insektaj specimenoj kolektitaj de Darvino, vojaĝan mapon de lia tutmonda scienca esplorado kaj modelon de la ŝipo Beagle. La Muzeo en la naskiĝloko de Darvino do-

nacis al la ekspozicio faksimilon de tri paĝoj el la taglibro de Darvino pri la esplora vojaĝo.

Krome la Biologia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj okazigis en Pekino seminarion pri Darvino dum kvar tagoj.

Publikiĝis dum tiu tempo ankaŭ la fama libro de Darvino "Deveno de Homo kaj Selektado en Rilato kun Sekso" en la ĉina lingvo kaj "Kroniko de Darvino" kompilita de ĉinaj scienculoj.



---

YEH CHUN-CHAN:

## Ŝekspiro en la hodiaŭa Ĉinio

---

**D**UM la pasintaj dek du monatoj oni surscenigis kvar teatraĵojn de Ŝekspiro en diversaj ĉinaj urboj, inkluzive de Pekino kaj Lhasa. Ili estis “La Venecia Komercisto”, “Makbeto”, “Rimedo pro Rimedo” kaj “Romeo kaj Julieta” luditaj respektive de la Ĉina Junulara Arta Teatro, la Teatrogrupo de la Ĉina Dramaturgia Instituto, la Popola Arta Teatro kaj la nove fondita Tibeta Drama Trupo konsistanta el junaj tibetaj geaktoroj, kiuj antaŭ nelonge diplomitiĝis el la Ŝanhaja Dramaturgia Instituto. Ilia prezentado de “Romeo kaj Julieta” altiris multajn rigardantojn en Ŝanhajo, Pekino kaj Lhasa (vd. EPC n-ro 12/1981, p. 8-10).

Ĉinoj ekkonis Ŝekspiron en la unua jardeko de la nuna jarcento, kvankam ne kiel dramiston, sed kiel rakontiston. La verkaĵo, kiun oni tiam tradukis en la ĉinan kaj atribuis al li, fakte estis la rakontoj el liaj teatraĵoj skribitaj de Charles Lamb kaj lia fratino Mary Anne. Strange

estis, ke la tradukinto Lin Shu (1852-1924), fakulo pri la ĉina klasika literaturo, ne scipovis legi la anglan. Amiko interpretis por li la originalan tekston, kaj li faris rudimentajn notojn. Surbaze de tio, kion li komprenis el la rakontoj, kun aldonoj el sia propra fantazio, li produktis ĉinajn versiojn en la nomo de Ŝekspiro, en stilo simila al tiu de Tang-dinastia prozo de la 7-a ĝis 9-a jarcento p.K. Ĉar la rakontoj estis tre ekzotikaj, la klasika lingvaĵo legiĝis elegante kaj tre plaĉe al la oreloj de la tradicia beletristaro, baldaŭ eĉ lernantoj prenis la ĉinan “ŝekspiraĵon” kiel modelon por siaj eseoj. Tia traktado eble ŝajnus ŝoka al la granda angla dramisto, sed ĝi bone efikis por diskonigi lin en ĉi tiu antikva lando.

Tamen ne longe poste oni eksciis, ke Ŝekspiro estas fama dramisto kun tutmonda graveco. Sekve oni konkludis, ke ankaŭ liaj dramoj devus esti ludataj sur ĉinaj scenejoj. Oni do ekstudis liajn verkojn kaj teatrotrupoj

komencis pensi pri surscenigo de kelkaj el ili. Por ke ili taŭgu al la gusto de la tradiciaj ĉinaj teatramantoj, reĝisoroj ŝanĝis ilin en ĉinajn operojn kun ĉinaj titoloj. Tiel “Romeo kaj Julieta” fariĝis Pekin-opero sub la titolo “La Amjuro”, kaj “Hamleto” aperis en Sichuan-opero kiel “Preno de la Edzino de Frato per Lia Mortigo”. Kaj ĉi tiuj operoj sufiĉe sukcesis. Kiam oni establis, en la malfruj dudekaj kaj fruaj tridekaj jaroj, la modernan eŭropstilan ĉinan teatron, verkoj de Ŝekspiro estis tradukitaj en sia originala formo kaj surscenigitaj pli-malpli en la eŭropa maniero. Sed sistema studado de liaj verkaro kaj teatra tekniko devis atendi ĝis Ĉinio iĝis popola respubliko en 1949.

En la fruaj kvindekaj jaroj “Romeo kaj Julieta” estis ludita surbaze de la teksto tradukita de la bone konata dramisto Cao Yu. La prezentado tamen estis sufiĉe eksperimenta, sed ĝi vekis grandan intereson inter teatroartistoj kaj ĉe la ĝenerala publiko. La Fremdliteratura Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj faris apartan esploron pri Ŝekspiro. Ankaŭ eldonejoj komencis publikigi la verkojn kompetente tradukitajn, tiel ke liaj tragedioj kaj komedioj fariĝis atingeblaj ankaŭ de ordinara legantoj. Kaj la prezentado de liaj dramoj estis bonvenigata de la publiko. Bedaŭrinde, kiam komenciĝis la “kultura revolucio” en 1966, liaj dramoj estis subite malpermesitaj kiel burĝaĵoj, same kiel la verkoj de ĉiuj aliaj ĉinaj kaj eksterlandaj aŭtoroj. Nur antaŭ tri jaroj, kiam la literatura agado reviviĝis, oni komencis reeldoni kaj disvastigi liajn verkojn.



Sub ĉi tiuj cirkonstancoj intereso surscenigi la Ŝekspirajn dramojn komencis kreski inter teatruloj, kaj ankaŭ la publiko havis la deziron vidi novajn prezentadojn sur ĉinaj scenejoj. Kelkaj trupoj serioze traktis la aferon. Oni jam esploris la teatran teknikon de la Elizabeta epoko (1533-1603 p. K.) kaj montris konsultocela la televidadajn prezentaĵojn produktitajn en Anglio. Eĉ la sperton de anglaj reĝisoroj oni penis akiri. En la antaŭnelonga prezentado de "Rimedo pro Rimedo", la brita reĝisoro Toby Robertson estis invitita kunlabori. Do ne estas mirige, ke kvar Ŝekspiraj teatraĵoj jam aperis sur ĉinaj scenejoj unu post alia dum la mallonga daŭro de unu jaro, kaj ankaŭ kun sukceso. La ĉina publiko ĝuis la prezentaĵojn ne kiel purajn distraĵojn, sed kiel efektivigojn de pli altnivela teatra arto. Ĉi tio estas grava pro tio, ke post periodo de dorma izoleco for de la ekstera mondo trudita de la Kvarpersona Bando, la ĉina publiko remalkovris la valorojn de la plej bonaj eroj el la okcidenta kulturo. Ĉi-rilate la grandegaj eldonoj de la fabeloj de Hans Andersen en la ĉina traduko estas plia indiko pri la nova tendenco.

Enkondukante eksterlandan literaturon kaj arton por enlanda konsumo, la ĉinaj verkistoj kaj artistoj kompreneble havas propran kriterion. En la kazo de Ŝekspiro, ekzemple, la ĉinaj reĝisoroj sin detenis de formala aŭ mekanika transigo de liaj dramoj laŭ la eŭropa stilo sur ĉinajn scenejojn. Ili havas siajn proprajn interpretojn kaj traktmanierojn. La surscenigo de "La Venecia Komercesto" estas tia

kazo. Dum la origina temo estis serioze konsiderita, oni substrekis precipe la avarecon de la ĉefa rolo. La konfliktojn inter judismo kaj kristanismo, inter la juda popolo kaj la kristanoj, oni preskaŭ tute preteratentis. Antonio estis portretita kiel prototipo de la nove leviĝanta burĝaro, kaj Shylock kiel tipa specimeno de primitiva feŭda uzuro. Ĉi ties ruzeco, avaro, malico kaj stulteco elstaris pro forta reliefigo, kaj mono estis kondamnita, estante simbolo de la kapitalisma socio. Tiurilate la prezentado estis ankaŭ instrua por la ĝenerala ĉina publiko, kiu klopodas firmigi la socialisman sistemon

kaj neniiigi la ekspluatadon de homo al homo.

Sed tiu unuflankeco en la interpreto, laŭ kelkaj kritikistoj, ŝajne malsukcesis esti justa al la originalo. Ili opiniis, ke oni ne devus neglekti la fakton, ke Shylock estis ano de subpremata popolo. Vere, li estis egoisma, etmensa, avara kaj malnobla, sed la socio ja estis respondeca pro tiuj liaj abomenaj trajtoj. La malestimo, diskriminacio kaj humiligo tiutempe truditaj al la juda popolo, ili argumentis, multe kulpis pro la ŝtonkoreco kaj krueleco en lia karaktero. La duobla personeco, izoleco kaj



*La Tibeta Drama Trupo prezentas "Romeo kaj Julieta".*



humiligo unuflanke, kaj senkompato kaj turmentemo aliflanke, en la origina priskribo de Ŝekspiro, konvinkas la rigardantojn pri la aŭtentikeco de lia karaktero. La prezentaĵo estus iĝinta multe pli bunta kaj viva, se ĉi tiujn komplikajojn oni estus ĝuste prezentinta. Tiu kritiko estas ankaŭ instrua pri la sinteno, kun kiu oni enkondukas eksterlandan literaturon kaj arton en Ĉinion.


En la surscenigo de "Rimedo pro Rimedo" la reĝisoroj enkondukis plurajn ŝanĝojn teknike, aŭ pli ĝuste reiris al la kutimoj de la tradicia ĉina teatro. La scenejon oni ĝis maksimumo simpligis, kun nur la necesaj iloj. Okazis neniu kulisofalo por dividi aktojn, kun la rezulto, ke tempo estis ŝparita por aktorado kaj deklamado. Tio konformas al la kutimo de la tradicia ĉina opero kaj tiu de ĉina spektantaro, precipe la tradicia spektantaro, kiu ĉeestas prezentadon ne por la rakonto, sed por la aktorado, deklamado kaj kantado, "por aŭdi teatraĵon," por tiel diri, ne "por vidi teatraĵon".

La prezentaĵo de "Romeo kaj Julieta" en la tibeta lingvo estas vere neordinara pro tio, ke Ŝekspiro estas la unua eksterlanda dramisto, kaj fakte ankaŭ la unua specimeno de okcidenta literaturo, enkondukita en la terĉirkaŭitan, antikvan kaj tamen novan Tibeton, regatan dum jarcentoj de obskura servuta sistemo kun la loĝantaro plejparte en servuto. Ĝi estas ankaŭ simbola por la vigeleco kaj eblecoj latentaj ĉe la iam postrestantaj nacimalplimulto de Ĉinio por adapti la plej bonajn

erojn el la monda kulturo por riĉigi la propran. La tibeta prezentaĵo estis sukceso laŭdita de ĉiuj, kiuj vidis la tragedion, kvankam ĝin ludis grupo de gefiloj de antaŭaj servutuloj, kiuj havis nenian kontakton kun kulturo, des malpli kun okcidenta kulturo. Dobuji, kiu ludis la rolon de Romeo, havas dudek kvar jarojn kaj Deyang, la ludantino de Julieta, dek naŭ jarojn. Ili fakte estas la plej junaj aktoroj ludantaj ĉefrolojn en Ĉinio. Ili lernis kiel aktori nur ekde kiam ili venis studi en la Ŝanhaja Dramaturgia Instituto. Ili aperis sur la scenejo unue en Ŝanhajo, poste en Pekino, kaj pli poste ili profesie prezentis por la tibeta publiko en Lhasa. La malmultaj komentoj faritaj de eksterlandaj gastoj, kiuj rigardis la teatraĵon, kiam la trupo

estis en Pekino, povas servi kiel indikilo pri la perspektivo de ilia estonteco: Sir Kenneth Cork, estro de la Reĝa Ŝekspira Teatro, diris: "Ŝi (Deyang) estas vera Julieta kaj Dobuji vera Romeo! Tio estas unu el la plej bonaj kombinoj de junaj aktoro kaj aktorino, kiujn mi vidis ludi Romeon kaj Julietan en fremdlando." Priscilla Oaks, usona specialisto pri Ŝekspiro, asertis: "Mi jam vidis prezentaĵojn de tiu dramo luditajn de dek internacie famaj trupoj kaj ĉi tiu estas unu el la plej bonaj surscenigoj, kiujn mi vidis." Kiam oni petis ŝin skribi kelkajn vortojn en la gastlibro, ŝi deklaris: "Ĉi tiu estas mia plej ŝatata prezentaĵo de 'Romeo kaj Julieta'."

*(Origine verkita en la angla lingvo kaj esperantigita de s-ro Geoffrey Sutton)*



*Sekspiraj verkoj eldonitaj de Ĉinio*



### ĈINAJ KORD-MUZIKILAJ GRUPOJ PREMIITAJ EN BRITIO

La Dua Internacia Konkurso de Portsmouth inter Kord-muzikilaj Kvartetoj finiĝis en la fino de marto en Portsmouth, Britio. La kord-muzikila grupo el Aŭstrio gajnis la unuan lokon. Kaj la grupoj el Ĉeĥoslovakio, FR Germanio, Britio kaj Francio gajnis la duan, trian, kvaran kaj kvinan lokojn respektive.

La ĉina vira grupo ricevis "La Premion Menuhin" destinitan por la plej esperplena grupo. La ĉina virina grupo estis honorita per "La Premio Prezidanto" destinita por la plej juna grupo en la konkurso.

La konkurso estis iniciatita de Menuhin kaj aliaj famaj muzikistoj, celante malkovri kaj instigi junajn talentulojn.

La konkurson partoprenis 28 grupoj el 12 landoj. La ĉinaj muzikistoj neniam montriĝis en tia internacia konkurso dum la pasintaj pli ol 20 jaroj.

### ĈINA-FRANCA MEDICINISTA RENKONTIĜO EN ĈINIO

Dum du semajnoj ekde la mezo de aprilo okazis ĉina-franca medicinista renkontiĝo en Pekino, Ŝanhajo kaj Hangzhou. En tiu tempo 12 francaj medicinaj profesoroj havis akademian diskutojn kaj interŝanĝojn kun siaj ĉinaj kolegoj pri dek unu fakoj, inkluzive de oftalmologio, kardiologio, pediatrio, dermatologio kaj nervologio. La francaj profesoroj ankaŭ aranĝis ekspozicion pri francaj medicinaj verkoj en Ŝanhajo.

### ĈINA EKSPOZICIO DE TREZOROJ EN BELGIO

La ekspozicio fermiĝis la 18-an de aprilo en la Belarta Domo de Bruselo post tri-monata montrado kaj per tio finiĝis ĝia eksponado en Eŭropo.

Laŭ statistiko 300 000 urbanoj, preskaŭ triono de la loĝantoj, vizitis la ekspozicion. Tio estis malofta en Belgio.

La vizitantoj interesplene rigardis 133 trezorajn originalojn, precipe kvar argilajn militistojn kaj ĉevalojn elterigitajn en la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio. La artaj trezoroj produktiĝis inter 5 000 a.K. — 907 p. K.

Antaŭ tio la ĉina ekspozicio havis lokon en Danlando, Svislando, FR Germanio kaj Okcidenta Berlino.

### ĈINA CERAMIKAJA EKSPOZICIO MALFERMITA EN TOKIO

Aprile en Tokio ekspozicio de ĉinaj ceramikaĵoj elterigitaj en la lastaj jaroj en la ruinoj de ceramikaj bakujoj estis okazigita kune de la Arta Galerio Idemitsu kaj la Japana-Ĉina Asocio por Kultura Interŝanĝo por celebri la 10-an datrevenon de la starigo de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio.

La 500 argilaj kaj porcelanaj eksponaĵoj pruntitaj de la Muzeo de la Imperiestra Palaco de Ĉinio estis elterigitaj en la ruinoj de ceramikaj bakujoj de diversaj dinastioj en 45 gubernioj de 13 provincoj de Ĉinio. La eksponaĵoj allogis japa-

najn vizitantojn kaj arkeologojn per siaj brilaj koloroj kaj delikataj desegnaĵoj.

### KANADA PIANISTO DEBUTIS EN PEKINO

Kanada pianisto André Laplante estis aplaŭdata ĉe sia unuafoja ludado en Ĉinio en aprilo ĉi-jare. Li solludis verkojn de Mozarto, Beethoven, Maurice Ravel kaj Franz Liszt.

André Laplante iam gajnis superajn premiojn en internaciaj pianaj konkursoj en Parizo, Ĝenevo kaj Sidnejo. Ĉi-foje en Ĉinio li speciale ludis "Panoramon de Sichuan" komponitan de ĉina muzikisto Huang Huwei kaj ricevis aplaŭdon. La kanada pianisto diris, ke li tre ŝatas tiun komponaĵon pro ĝiaj bela melodio kaj nacia karakterizaĵo. Li diris ankaŭ, ke ĉinoj profunde impresas lin per sia absorbiteco en la aŭskultado.

### HISPANA HARPISTINO EN PEKINO

En la unua tagdeko de aprilo la hispana harpistino Maria Rosa Calvo-Manzano, kiel la unua harpistino el eksterlando, okazigis recitalon en Pekino kaj estis aplaŭdata de ĉinaj muzikistoj kaj aŭskultantoj.

En la recitalo ŝi ludis, krom verkoj de hispanaj komponistoj, ankaŭ tiujn de Handel kaj Mozarto. Per sia lerteco kaj esprimriĉa ludado ŝi profunde impresis la ĉinajn spektantojn.







## Monumentoj al bestoj

Oni starigas monumentojn ĝenerale por honori meritojn de herooj. Iuj homoj tion faris pro siaj sentoj eĉ al bestoj.

Estas monumento al iu hundo starigita en urbeto proksime al Leningrado pro ĝia helpo al la fama fiziologo I. P. Pavlov en fondo de lia granda teorio. Alia simila monumento troviĝas en Parizo por rememorigi pri hundo, kiu savis kvardek homojn el lavango. Bedaŭrinde la kvardek-unua savoto mortigis ĝin, ĉar li prenis ĝin por lupo.

En Parizo kaj Tokio estas po unu monumento starigita de sciencistoj memore al poreksperimentaj ranoj.

En la Moskva Ekspoziciejo de Sovetiaj Ekonomiaj Atingoj estas du monumentoj, kiujn oni konstruis por honori du konkursajn ĉevalojn, ĉar ili plurfoje gajnis la ĉampionecon. Hungaroj faris aluminian statuon de ĉevalo por honori sen-nombrajn batalĉevalojn mortintajn en la Dua Mondmilito. Sur la statuo estas la skribaĵo "Dediĉe al la fidelaj kunbatalantoj".

Ankaŭ azeno restas en la homa memoro. Dum la Unua Mondmilito azenoj estis ĉefa trafikilo por la italaj trupoj. En Romo staras statuo de azeno kun kanontubo sur la dorso. Tia statuo troviĝas ankaŭ en urbeto de Svislando kaj Teksaso, Usono.

La nederlanda bovino estas mondfama pro siaj bonaj lakto kaj viando kaj ludas gravan rolon en la nederlanda ekonomio, sekve oni faris statuon de nederlanda bovino.

En Velingtono, Nov-Zelando, oni konstruis monumenton por honori iun delfenon pro ĝia kompetenta

pilotado. Dum kvardek jaroj ĝi sekurigis tieajn boatojn kontraŭ rifo.

En germana urbeto staras monumento al porko. Pri tio cirkulas jena interesa rakonto: Antaŭe mankis al la urbeto salo, kiu estis tre kara por la loĝantoj. Foje, vidinte, ke iu porko per sia muzelo turnadas teron, loĝantoj tie faris fosaĵon kaj trovis grandan kvanton da salo. Jen kial oni starigis la monumenton.



## Bovofaligado en Venezuelo

Faligo de bovo estas tre interesa popola amuzo en Venezuelo. Ĝi diferencas de la hispana bovbatalo. Kutime la hispana bovbatalisto estas bunte vestita, kun speciala ĉapelo sur la kapo. Li incitas la bovon per ruĝa tuko kaj pikmortigas ĝin per longa spado. Tial la enira bileto estas multekosta. Sed la venezuela bovofaligisto ne portas apartajn vestojn. Rajdante sur ĉevalo, li ludas ĉirkaŭire kun la virbovo por kapti ĝian voston. Li venkas, se li faligas la beston. Tion oni rigardas senpage.

Antaŭe la bovofaligado estis populara amuzo por paŝtistoj, sed poste ĝi estis enkondukita en la urbojn. En festotagoj okazas en ĉiuj urboj popola amuzado kun bovofaligo kiel la kulmino.

La aktivado estas aranĝita kutime sur ducent-tricent-metra kurejo aŭ sur larĝa strato ĉirkaŭita de palisaro, ekster kiu svarmas preskaŭ mil rigardantoj. Jen komenciĝas la ludo. En la areno estas tri ĝis kvin fortaj virbovoj. La ludantoj kuras surĉevalo kaj laŭeble proksimiĝas al la bovoj por kapti ilian voston. Ili faligas la bovojn per sia tuta forto

helpate de la ĉevala impeto. Sed estas nefacile por la ludanto kapti la bovan voston. La ludanto malvenkas, se la fortega bovo sin ĵetas al li kaj faligas lin de sur la ĉevalo.

Por la aktivado oni ankaŭ invitas belajn knabinojn sidi en la unua vico sur la teraso. Venkinte la bovon, la ludinto faras ĉirkaŭiron kune kun la ĉevalo kaj venas al la knabinoj, kiuj prezentas al li bukedon da rozoj.

## Enigma de kolosaj bildoj

En la centra parto de Peruo sin trovas Nazca, ebenaĵo izolita kaj dezerta. Iam aviadilo estis fluganta super ĝi, kiam la aviadisto hazarde rigardis malsupren kaj vidis kolosajn groteskajn bildojn, inter kiuj troviĝas dek-kilometra bildo de homo, bildoj de birdoj, bestoj, vegetaĵoj kaj bildoj similaj al geometriaj figuroj. Tio forte mirigis la aviadiston.

Post tio multaj sciencistoj veturis tien esplori kaj malkovris, ke la kolosaj bildoj konsistas el longegaj strioj ekzakte desegnitaj.

Kaj pli interesa estas tio, ke ĉiu mano de tiuj homfiguroj havas nur kvar fingrojn. Tial iuj arkeologoj asertas, ke la kolosajn bildojn en Nazca kreis inkaoj inter la 11-a kaj 16-a jarcentoj por fari grandan religian ceremonion. La homfiguroj en la kolosaj bildoj simbolas la sundion, je kiu kredis la antikvaj inkaoj. Sed multaj aliaj sciencistoj diras, ke ne la inkaoj tion faris, ĉar en ĉiu alia bildo la inkaa sundio havas kvin fingrojn. Kaj krome, en la historia literaturo pri la antikvaj inkaoj estas neniu noto pri tiel grandega bildo, por ne paroli pri la farado de tiel multe da tute samaj bildoj sur ebenaĵo kun areo de kelkcent kvadrataj kilometroj. En tiuj bildoj vidiĝas preciza desegnado, al kiu oni aplikis riĉajn matematikajn sciojn. Estas malfacile imageble, ke tiel grandaj verkoj naskiĝis en la antikveco kun ne alte disvolvitaj scienco kaj kulturo.

# Porinstruista Esperanto-kurso



Fotoj de LI CHUNGEN kaj CAI HAIFENG


Postleciona gvido

La Ĉina Esperanto-Ligo fondis porinstruistan Esperanto-kurson en Pekino en novembro 1981. La kurson vizitas 18 junaj instruistoj el 16 altaj lernejoj de diversaj lokoj de Ĉinio. Ĝin vizitas ankaŭ gejunuloj senditaj de la Yunnan-a Esperanto-Asocio kaj Pekina Esperanto-Asocio. Post unujara lernado ili revenos al sia lernejo instrui nian lingvon. Ili lernas tre diligente. En aprilo ĉi-jare ili finis studon de la unua semestro kaj bone trapasis la ekzamenon. Ili havas pli profundan komprenon pri la supereco de Esperanto kaj ĝia utileco.



Veterana esperantisto Laulum donas lecionon.






Kursanoj kaj brita esperantisto s-ro Geoffrey Sutton, kiu laboras en la redakcio de El Popola Ĉinio



Legado en la korto de la lernejo



Matene



La festaj lanternoj de la antikva urbo Quanzhou havas longan historion kaj famas pro sia delikateco kaj eleganteco. Ili estas diversspecaj, kiel ekz., senskeleta lanterno, lanterno kun turnigantaj figuroj, staranta lanterno, karpoforma lanterno k.a. kun belaj desegnoj. Ciujare, en la nokto de la Lanterna Festo je la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina kalendaro, ĉie en la urbo paradas tiaj lanternoj, kiuj alportas al la urbo ĉarmon kaj poeziecon.


# Lanternoj de Quanzhou



En la nokto de la Lanterna Festo

Lanterno de la  
Ĉampionea Pokalo


Rigardo al lanternoj







Foiro de lanternoj



La lanterno Majtrejo

Homfiguraj lanternoj



# Jadskulptisto

(Novelo)

Ilustritaj de SONG ZHEN



**E**N movoplena bazaro de nia urbo fame konata tra la tuta lando estis vendataj frandaĵoj, aromaj kaj dolĉaj fruktoj, freŝaj legomoj, vivaj fiŝoj, lerte faritaj pajloplektaĵoj . . . He, la okulfrapa loko apud la pajloplektaĵoj tiutage estis okupata de ordinara maljunulo.

Lia vizaĝo estis plena de sulkoj. Li, iom pli-ol-70-jara, havis grizajn brovojn kaj barbon. Li sidis sur tabureto kun kurba dorso. Antaŭ li staris ligna bastono kun du horizontalaj bastonetoj supre, sur kiuj pendis malgrandaj ŝtonskulptaĵoj. Ĉiufoje, kiam iu preteriris, li levis sian kapon, kvazaŭ li volus diri: "Aĉetu . . ."

Pasis longa tempo, sed neniu aĉetis ilin. Kelkfoje iuj ĵetis al ili indiferentan rigardon. Ho ve, homo tiel grandaĝa! Eĉ se li ne povus ĝui siajn lastajn jarojn en la hejmo, li ja ne devus iri tien por sin vivteni. Ĉu li ricevas pension? Ĉu li ne havas gefilojn? Ĉu li povas sin vivteni per vendo de tiaj objektoj?

Li laciĝis de sidado kaj eble perdis paciencon de atendado. Li malrapide rektigis la talion kaj faris longan elspiron.

Juna ŝminkita virino en modaj vestoj promenis tie kun bunte vestita knabineto. La maljunulo levis la kapon kaj rigardis ilin.

La knabineto subite haltis kaj kriis: "Panjo, rigardu, vitraj simietoj!"

La virino returnis la kapon kaj apatie respondis: "Ej, vendisto de talkaj simietoj."

La infano retiris sian maneton kaj saltetante kuris al la maljunulo.

Ekvidinte klienton, la maljunulo tuj stariĝis kaj klinis la bastonon, por ke la knabineto vidu pli klare.

La virino tamen malaprobis, ke li allogas la infanon, kaj ĵetis al li malkontentan rigardon, dirante: "Nenio rigardinda, iru!"

Sed la infano svingis sian maneton: "Panjo, venu rigardi, estas ankaŭ tigroj, cignoj . . . knabo rulanta neĝbulon . . . ho, dika avo vidigas sian ventron pro ĝojo . . ." la infano ridklukis.

La virino malpacienĝis: "Ej, tenu vian langon, iru tuj! . . . Mi aĉetos por vi ĉokoladan glaciaĵon!"

"Mi volas ne glaciaĵon, sed simieton!" obstinis la infano, skuante la korpon.

La virino iom koleriĝis, iris al ŝi kaj frapis ŝian sidvanganon: "Knabinaĉo, vi eĉ ne obeas min!"

La infano ekploris pro neplenumiĝo de sia deziro.

Ne trovante alian rimedon, la virino malvole demandis la maljunulon pri la prezo.

"Dek cendoj," moviĝis la buŝo de la maljunulo.

La prezo estis bagatela. La virino pagis senpripense kaj iris al aliaj standoj, lasante la infanon ĉe la maljunulo.

La maljunulo estis afabla. Li pene kliniĝis al la infano kaj ameme diris: "Infano mia, atente rigardu: Prenu kion vi ŝatas."

Li ŝovis la ĵus ricevitaĵojn dek cendojn en ŝian poŝon: "Nu, aĉetu por vi glaciaĵon."

La infano estis ravita de la malgrandaj ŝtonskulptaĵoj. Simieto kun kurbaj brakoj kaj gamboj, strabanta aglo kun levitaj flugiloj, ĉevaleto antaŭ galopo . . . ankaŭ knabo kaj avo estas tre plaĉaj. Ŝi tuj ekhavis simpatian al ili kaj ne volis foriri. Tamen ŝia patrino jam forpromenis al aliaj standoj.

Fine la maljunulo donis al la infano simieton kaj makulcervon kun grandaj okuloj, kaj nur tiam ŝi gaje postkuris sian patronon saltetante.

La maljunulo kun rideto rigardis ŝin foriĝanta.

Pro tio li eĉ ne rimarkis la alvenon de maljunulo kun nobla aspekto kaj junulino, kiuj rigar-





*Antaŭ li staras ligna bastono kun du horizontalaj bastonetoj supre.*

dis liajn varojn kun granda intereso.

La alirinta maljunulo estis maldika, duonkalva kaj blankhara. Li portis okulvitrojn kaj surbruste insignon de la urba belarta instituto. La junulino estis gracia. Ŝi havis longan hararon falantan sur la ŝultrojn kaj portis brilajn rubenajn orelpendaĵojn. Ŝiaj transmaraj vestaĵoj estis tre okulfrapaj.

La maljunulo, rigardinte la ŝtonskulptaĵojn, subite mire demandis kun larĝe malfermitaj okuloj: "Majstro, ĉu ili estas viaj verkoj?"

Nur tiam la vendanto sin turnis al li kaj tuj sin klinis: "Jes, ili estas malgrandaj objektoj de mi skulptitaj, ne atentindaj por vi." Li vespiris kaj diris: "Efektive mi pensis pri ili jam antaŭ dekoj da jaroj, sed nun la okuloj estas malmiopaj kaj la manoj tremaj, tial la deziroj fariĝis mal-

facile plenumebaj. Post skulptado mi rigardis ilin foje kaj refoje kaj trovis ilin ne tre plaĉaj al . . ."

La apuda junulino afekte admiris: "Ho, ili estas tre belaj! . . . Ili similas al elegantaj kaj ravaj poemoj!"

La blankhara maljunulo kapjesis, dirante: "Jes, kvankam ili estas malgrandaj, tamen la figuroj estas versimilaj kaj la ĉizado lerta, la strukturo strika kaj la imago riĉa. Ĝuste pro sia miniaturreco ili estas raraj."

La junulino ridetis: "Oĉjo, se mi kunportos al Usono iujn el tiaj ŝtonskulptaĵoj kaj donacos ilin al miaj iamaj instruistoj kaj samlernejanoj de la belarta instituto, ili certe rigardos ilin trezoraj kaj ĝojos freneze! Kaj romantika profesoro certe prenos unu kiel sian ĉapel-insignon kaj ĉien iros por ĝin montri!"

"Ne nur kiel ĉapel-insignon," serioze diris la blankhara mal-

junulo, "la plastiko de iuj povus esti uzata por ornamo urbojn kaj plibeligi ilin."

La junulino ruĝiĝis de emocio kaj vikle diris: "Ho, ĝuste pro tio, tuj post mia diplomitiĝo mia patro ordonis, ke mi revenu al la patrolando por pririgardi. Li esperis, ke mi progresos en pentrado kaj ĉerpos nutraĵojn el la belo de famaj montoj kaj riveroj de la patrolando kaj el ĝiaj kutimoj kaj moroj! Sed mi ne atendis, ke tiel belaj ŝtonskulptaĵoj estas sur strato de la patrolando!"

"Tiajn artaĵojn mi vidis neniam antaŭe," diris la blankhara maljunulo.

Ĉirkaŭ ili kolektiĝis multaj homoj. Ankaŭ ili aprezis kaj admiris la artaĵojn. . .

"Majstro, mi volus demandi, kiom da mono mi devas pagi por aĉeti unu?" demandis la junulino.

"Dek cendojn," moviĝis la buŝo de la maljunulo.

"Kiom?" La blankhara maljunulo klinis al li siajn dubemajn orelojn, ankaŭ la junulino mire malfermis sian buŝon.

"Dek cendojn," la maljunulo etendis sian montran fingron.

. . . Malaperis la brila gajo sur la bela vizaĝo de la junulino.

Ŝi meditis kaj ŝia vizaĝo paliĝis. Post momento ŝi murmuris, detenante sin de emocio: "Kial nur dek cendojn? Ili egalas nur al ses usonaj cendoj! Tio . . . simple estas moko al la arto!"

Ŝi tiris sian onklon por foriri, sed la homamaso baris al ŝi la vojon. Ŝi diris kun tremanta voĉo: "Oĉjo, mi ne volas aĉeti. Mi ne volas profani la arton per aĉeto de tiel malmultekostaj artaĵoj."

Si daŭrigis: “Oĉjo, de post kiam mia patro fariĝis estro de la orient-arta fako de la ŝtata universitato, oni ofte petis lin ekspertizi antikvajn kaj modernajn metiartarojn el Ĉinio. Ekvidinte tiujn raraĵojn, li tre fieris, ke ili venis el Ĉinio, sed samtempe malĝojis, ke ili ne plu apartenas al Ĉinio. Li iam eĉ larmis pro tio. Sed hodiaŭ tia artaĵo vendiĝas nur por dek cendoj. Kiel ĉagreniĝos mia patro, se li informiĝos pri tio!”

Si malgaje rigardis la maljunulon en ordinaraĵ vestaĵoj, subite malfermis sian mansaketon, elprenis la monujon kaj eltiris el ĝi bileton de dek juanoj . . .

Sia onklo tuj komprenis ŝian intencon kaj mangestis al ŝi, ke ŝi ne agu senpripense. Li certe pensis, ke senkaŭza almozo iel vundas la dignon de la ricevinto, kaj plie antaŭ ili estas kompetenta metiartisto. Li sincere proponis: “Majstro, vi devas altigi la prezojn.”

“Prave, vi altigu la prezojn!”  
“Altigu, altigu, ni aĉetos!” kriis ĉirkaŭstarantoj.

“Ne . . .” La maljunulo ridegis. “Ej! Vi miskomprenis min! Ĉu vi prenis min por kolportisto de talkaj simietoj kaj orel-purigiloj en la malnova socio? Vi, bonkoraj, kompatas min? Ej, mi vere iam vendis talkajn simietojn, sed tio okazis en mia juneco, kiam mankis al mi vivrimedoj. Nun mi estas emerita jadskulptisto kaj ĉiumonate ricevas pension de pli ol cent juanoj. Krome miaj gefiloj ofte donas al mi monon. Ĝi ja ne mankas al mi.”

“Kial do vi vendas tiajn objektojn?” demandis iu el la ĉirkaŭstarantoj.

La maljunulo iom meditis kaj diris: “Verdire mi ja ne timos viajn mokojn. En la pasintaj jaroj mi ĉiam opiniis, ke la jadskulptado kiel arto similas al literaturo kaj muziko. Ĝiaj eminentaj verkoj povas vigligi la spiriton de la homoj, doni al ili forton kaj refreŝigi ilian animon. Ili devas esti konservataj por la posteuloj, montrataj kaj apartenantaj al ĉiuj homoj. Sed kie estas 80-90% de la eminentaj artaĵoj faritaj de la antikvaj jadskulptistoj? Tio estas nedirebla per unu vorto. De la lasta jaro, kiam mi emeritiĝis, mi estis senfara en la hejmo. Mi do aĉetis forĵetotajn ŝtonetojn de nia fabriko kaj skulptis tiujn etaĵojn. Ili estas malgrandaj, tamen mi ne ŝparis mian energion por fari ilin. Mi pensis, ke mi maljuniĝis, sed mi ankoraŭ povas fari ion. Mi volas dediĉi tiajn etaĵojn al la homoj diligente laborantaj por la mondo.

Tio ne vanigos mian tutan jadskulptistan vivon.”

La ĉirkaŭstarantoj meditis kaj remaĉis liajn vortojn.

Post momento li daŭrigis: “La prezoj egalas nur al tiuj de miaj aĉetitaj ŝtonoj. Se mi ne postulus monon por tiuj etaĵoj, kiu volus ricevi ilin senpage? Se mi altigus la prezojn pro multeco de klientoj, ĉu tio ne estus malhonoro al la arto de jadskulptado?”

Revenis la juna virino, kiu ne laŭvole aĉetis talkan simieton. Nun, aŭskultinte, ŝi iom komprenis kaj diris: “Ho, nun mi scias, kial la maljunulo ne pensis pri la mono.” Tion dirinte, ŝi forte kisis sian infanon. Oni ne sciis, ĉu ŝi hontis pro sia ĵusa senscienco aŭ ĝojis pro la genio de sia filino en aprezado al artaĵo.

*Kun intereso rigardas noblaspekta maljunulo kaj junulino.*





Multaj homoj etendis al la maljunulo sian manon kun mono, vicatendante post la blankhara maljunulo kaj la junulino. La vendanto elektis por la junulino dekelkajn artaĵojn kaj lasis la blankharan maljunulon elekti kelkajn por si. Poste li komencis vendi al aliaj. La etaj artaĵoj estis tuj forvenditaj.

La gajaj maljunulo kaj junulino atendis por pagi, sed la vendinto akceptis nur la monon pagitan de la antaŭa, rifuzante alian pagon por lia nevino kaj repuŝante sian manon kun mono. “Knabino,” li diris, “pro via ĵusa simpatio al la arto kaj, krome, via longa vojaĝo al la patrolando, tiuj etajĵoj estu memorajĵoj donacitaj de mi, via samlandano. Monon mi ne akceptos.”

La blankhara maljunulo kaj la junulino fariĝis maltrankvilaj.

“Ne . . . Avo . . .” diris la junulino.

La maljunulo ŝajnis ne aŭskulti kaj diris al la junulino: “Knabino, mi volas doni al vi komision, vi nepre konsentu.”

“Kia komisiono, avo?” demandis la junulino.

“Mi petas vin transdoni miajn vortojn al via patro,” diris la maljunulo. “Mi petas, ke li estu trankvila, kvankam en la malnova socio nemalmultaj valoraj metiartaĵoj de Ĉinio estis portitaj eksterlanden, kio estas kordoloriga, tamen feliĉe ni heredis la teknikon kaj ankoraŭ scias fari multajn metiartaĵojn. Laŭ mia opinio, estonte skulptitaj valoraj metiartaĵoj el smeraldo, agato, jado kaj aliaj estos eksponataj en diverslokaj muzeoj de nia lando kaj senditaj al alilandaj muzeoj

por kultura interŝanĝo, por ke ĉiuj povu rigardi kaj aprezi kaj ĉiuj amantoj de belarto ĝuu el tio belon. . .”

La bela espero vekis varman brilon en la okuloj de la maljunulo. Liaj vortoj skuis la koron de la ĉirkaŭstarantoj kaj aperigis rideton sur ilia vizaĝo.

La junulino kapjesis, ŝiaj okuloj malsekiĝis. Ŝi demandis respektoplene: “Avo, ĉu mi povus peti vian nomon?”

La maljunulo eldiris sian nomon.

La blankhara maljunulo estis mirigita kaj tuj kaptis ties brakon: “Ho, vi plurfoje ricevis en- kaj eksterlande orajn kaj arĝentajn medalojn pro jad-skulptado!”

La maljunulo svingadis sian manon kaj montris sin iom hontema: “Ne diru tion, ne! Koncerne la arton, en la mondo estas multaj eminentaj majstroj, kaj poste aperos ankoraŭ pli eminentaj. Mi ne indas la honoron, tion diri vekos ridon de aliaj. . .”

Tiam iu demandis la maljunulon, en kiu tago li refoje venos tien. La maljunulo bedaŭre rigardis la ĉirkaŭstarantojn kaj kapneis: “Mi ne venos. La etajĵoj estas forvenditaj. Hieraŭ nia fabrikestro venis al mia hejmo kaj demandis min, ĉu mi volas reveni al la fabriko por instrui metilernantojn. Ĝuste tion mi deziregis, ĉu mi povus ne reiri? Kaj estonte vi vidos pli bonajn!”

Tion dirinte, li kapsalutis la blankharan maljunulon, la junulilon, la junan virinon, ŝian filinon kaj la aliajn, levis de sur la tero sian tabureton kaj foriris. Sed la ĉirkaŭstarantoj ne tuj foriris, sed rigardis la maljunulon malproksimiĝanta. . .

TIANXING:

## Rara besto—

la

**I**NTER diversaj sovaĝaj bestoj la granda pando ŝajne havas intiman rilaton kun la homaro. Pentristoj pentras ĝian petoleman kaj amindan aspekton, artistoj projektis desegnojn kaj fabrikmarkojn kun pandoj. La pando domo de zoologiaj ĝardenoj estas loko ŝatata de vizitantoj. Ĉu plenkreskuloj ĉu infanoj senescepte gaje ridas, vidante mallertajn kaj komikajn grandajn pandojn en grimrado de ŝtuparo, ludo kun pilkoj aŭ transkapiĝo.

En la lastaj jaroj multaj eksterlandaj vizitantoj, veninte Ĉinion, la hejmlokon de la grandaj pandoj, volas rigardi ĉi tiujn bestojn. Ĉinio donacis grandajn pandojn al iuj amikaj landoj. En 1980 la Monda Sovagbesta Fonduso (MSF) decidis preni kiel sian insignon orumitan grandan pandon faritan el lado. MSF subskribis interkonsenton kun Ĉinio pri starigo de esplora centro por protekti grandajn pandojn en la natura rezervejo Wolong en Sichuan-provinco. Nun la esplora centro estas en konstruado kaj tie jam komencis

## granda pando

labori esplora grupo el ĉinaj kaj eksterlandaj sciencistoj.

La granda pando estas antikva rara besto postvivanta la naturan evoluon. Antaŭ ĉirkaŭ 12 milionoj da jaroj ĝi apartiĝis el la karnomanguloj kaj antaŭ ĉirkaŭ 600 000 jaroj evoluis en la nunan grandan pandon. Fosilioj de tiu besto troviĝis vaste tra suda Ĉinio kaj la najbara sudazia regiono. Poste la grandaj pandoj malmultiĝis pro la ŝanĝiĝo de la tergloba klimato, ŝanĝiĝo de terformoj kaŭzita de glacirivera movado, influo de homa agado, malmultiĝo de sia nutraĵo kaj siaj malforta generado kaj malgranda kapablo kontraŭ atako de malamikoj. Nun grandaj pandoj vivas en la meza, nordokcidenta partoj de Sichuan-provinco kaj la suda parto de Gansu-provinco. Fakuloj taksis, ke ilia totala nombro estas malpli ol dumil.

La granda pando de longe vivas sur la terglobo, sed la homoj trovis ĝin malfrue. Vintre de 1864, iu ĉasisto trovis kuriozan kaj amindan beston en la nord-

okcidenta parto de Sichuan. Li ne volis pafmortigi ĝin kaj kaptis ĝin en ĝia dormo. Laŭ ĝiaj formo kaj vivo li donis al ĝi la nomon granda pando. La informo vekis grandan atenton de ĉinaj kaj eksterlandaj zoologoj. Eksterlandaj zoologoj venis unu post alia al Ĉinio por trovi la grandan pandon, sed malmultaj sukcesis.

La granda pando apartenas al la mamuloj. Ĝia aspekto similas al urso kaj ĝi havas dikajn krurojn. Ĝia kapo estas ronda

kaj la muzelo mallonga, kio klare distingiĝas de urso. Ĝi havas densajn hararojn nigran kaj blankan, ĝiaj kruroj, kolo, ŝultroj kaj oreloj surhavas la nigran. La nigra kaj blanka koloroj estas harmonie aranĝitaj. La hararoj ĉirkaŭ la okuloj similas al okulvitroj kaj la nigra hararo de la kolo ĝis la antaŭaj membroj al skarpo.

La granda pando ĝenerale vivas inter profundaj montoj, kie kreskas densaj bambuoj, vintre estas ne tre malvarme kaj some-

*Granda pando en la Pekina Zoologia Ĝardeno naskis post arta ensemado.*





re ne tre varme, kreskas dikta-  
volaj muskoj kaj murmuris ri-  
veretoj. Ĝia ĉefa nutraĵo estas  
bambuo, sed ĝi ankoraŭ konser-  
vas iujn karakterizaĵojn de kar-  
nomanguloj. Plenkreska granda  
pando ĉiutage manĝas 20 kilo-  
gramojn da bambuo. Estas inte-  
rese, ke post kiam ĝi estas man-  
ĝinta ĝissate, ĝi iras al rivereto  
por trinki, post kio ĝi reiras kaj  
post kelkaj paŝoj ĝi refoje iras  
trinki. Tiel post plurfoja trinko,  
kiam ĝi neniel plu povas trinki,  
ĝi malrapide foriras. La granda  
pando ne konservas manĝaĵojn  
nek kutimas vintrodormi tial ĝi  
serĉas manĝaĵojn eĉ dum la vin-  
tra neĝado.

La granda pando havas mal-  
akrajn vidpovon, aŭdpovon kaj  
flarsenton, sed ĝi povas vadi  
akvon, naĝi kaj grimpi arbon.  
En zoologia ĝardeno la breditaj  
pandoj estas petolemaj kaj amin-  
daj, sed sovaĝaj grandaj pandoj  
povas mordi arbon profunden je  
kelkaj centimetroj kaj venki  
ferocan leopardon.

La granda pando ŝatas vivi  
sola. Nur en la pariĝa tempo ĉe  
la fino de printempo la virpando  
kaj pandino vivas kune. Poste  
ili disiĝas. La esplora cen-  
tro por protekti grandajn  
pandojn en la natura rezervejo  
Wolong en Sichuan spuris per  
radioinstrumentoj grandan pan-  
dinon kaj observis ĝian oestron,  
pariĝon kaj akuŝon. Sciencaj  
laborantoj metis kolringon kun  
mikrodissendilo al kaptita pan-  
dino nomata Zhenzhen kaj ĝin  
ellasis. Post unu monato la  
dissendilo sur tiu pandino eli-  
gis fortan signalon, kiu kondukis

ĉinajn kaj eksterlandajn sciencis-  
tojn al ŝia vivloko. Jam de dis-  
tanco de kelkdek metroj ili aŭdis  
la muĝon de pandoj kaj vidis  
Zhenzhen kaŭranta surtere kaj  
antaŭ ŝi du virpandojn luktantaj.  
Ili muĝis kaj sin ĵetis unu kon-  
traŭ la alian, sed ne vundis.  
Post unu kaj duona horoj la  
venkito foriris. Poste ekpariĝis  
la venkinto kaj la pandino Zhen-  
zhen.

Post pli ol unu monato, per la  
dissendilo kaj analizo, scien-  
cistoj konstatis, ke gravediĝis  
Zhenzhen. En la samjara sep-  
tembro la radio-instrumento  
montris, ke subite malpliĝis ĝiaj  
agadoj. La sciencistoj konjektis,  
ke ŝi verŝajne naskis idon.  
Oktobre la fakuloj vidis ŝin ser-  
ĉanta nutraĵon kaj aŭdis krion  
de ido en la nesto. Kiam ili  
alproksimiĝis al la nesto, la  
milda Zhenzhen fariĝis timiga,  
forte sin ĵetis kontraŭ ilin kaj  
poste rapidis al sia ido.

La ĵus naskita pandino matu-  
riĝas post ses-sep jaroj. De mar-  
to ĝis majo en ĉiu jaro ĝi oestras  
kaj pariĝas. Ĝi gravedas kvin  
ĝis ses monatojn kaj naskas idon  
en septembro aŭ oktobro. Nas-  
konte la pandino serĉas por si  
arbotruon aŭ kavernon kaj ne  
permesas alproksimiĝon de vir-  
pando. La ĵus naskita pandi-  
do pezas nur 90—130 gra-  
mojn. Inter la idoj de la ma-  
muloj la ido de pando estas pli  
granda nur ol tiu de la kanguruo.  
Post tri monatoj la ido povas  
rampi kaj post tri jaroj vivas  
unuopa, forlasinte la patrinon.  
La granda pando ĝenerale vivas  
20 ĝis 25 jarojn.

La ĉefa malamiko de la granda  
pando estas la leopardo, kiu ofte  
prenas junan kaj maljunan pan-  
dojn kiel manĝaĵon. Askaridozo  
ofte minacas la grandan pandon.  
Ĝi obstrukcas la intestan vojon,  
truigas la inteston kaj eĉ mortig-  
gas la pandon. Fakuloj trovis,  
dissekcinte pandan kadavron, pli  
ol du mil askaridojn en ties  
intesto.

Ĉar la granda pandino pariĝas  
kun virpando nur en marto ĝis  
majo kaj disiĝas post la pariĝo,  
la pandino gravediĝas malofte,  
kaj gravediĝinte, ĝi povas naski  
nur unu aŭ du idojn. Por generi  
plimulte da pandoj ĉinaj fakuloj  
provas plioftigi la kontaktojn  
inter pandinoj kaj virpandoj kaj  
komencis provi artefaritan gra-  
vedigon. La virpando Pipi kaj  
pandino Lili en la Pekina Zoolo-  
gia Ĝardeno naskis idon Ming-  
ming en septembro 1963. Ĝi  
estis la unua pandino naskita en  
zoologia ĝardeno en la mondo.  
Ĝis nun pli ol 20 pandinoj naski-  
ĝis en ĉinaj zoologiaj ĝardenoj  
per tia metodo. En la fino de  
1980 Ĉinio unuafoje sukcese  
gravedigis pandinon per fridigita  
spermo de virpando. La nove  
naskita pandino kun la nomo  
Rongsheng nun vivas en la  
Zoologia Ĝardeno de Chengdu.  
Ses pandinoj naskiĝis per tia me-  
todo, kvankam la procento, kiu  
plu vivas, estas malalta. La fa-  
kuloj tamen jam akiris certan  
sperton en generado de pandoj.

La ĉina registaro difinis la  
grandan pandon kiel la unuan  
inter la raraj bestoj kaj severe  
malpermesas kapti aŭ mortigi  
de ĝi.



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mal-longigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 respo. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Esperantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPC povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

La Red.

### SOMERUMADO APUD LA ADRIATIKA MARBORDO

En belega parto de la adriatika marbordo, inter Split (17) kaj Omiš (6) km. sur la magistrato, kaj cent m. de la maro, vi povas somerumadi en esperantista rondo. En ĵus finita domo, mi luigas ĉambrojn kun kuirejo (laŭ interkonsento), kaj ĉiuj interesuloj estas petataj skribi antaŭe, al la adreso: Davor Grgat, Paiĉeva 21-58000 Split, Jugoslavio, aŭ al tel: 058/512-565.

\* S-ro Kataoka Tadaŝi, 37-j. akupunkturisto blinda, dez. kor. kun ĉinoj blindaj pri iliaj profesoro kaj vivo.

Adreso: Kami-maĉi, 4-10-3. Koĉiken, 780 Japanio.

\* Tefik Bejtullahu, 18j. mezlernanto, dez. kor. kun esp. el la tuta mondo, Reke, Tuweli i Pare, 38220 Mitrovice e Titos, Kosove, Jugoslavio.

\* S-ro Assalit Pierre, fervojisto 40-j., 18 Rue Lamartine, 21300 Chenove, Francio, deziras korespondi kun ĉin(in)o fervojista kaj interesanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn kaj muzik-kasetojn.

\* Eric Cellignan, 23j. studento, dez. kor. pri ĉiu temo kun junul(in)o ĉ. samaĝa el la tuta mondo. Rue Bidant, 4000 Lieĝo, Belgio.

\* Peter Ĉekme, Mierova bl. 10, 966 81 Žarnovica, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. kun ĉinoj pri naturbelajoj, poŝtmarkoj ktp.

\* Deziras korespondi kun la espistoj en la urbo Jinan en Ĉinio por profundigi amikan rilaton inter urboj Jinan kaj Wakayama. Harukuni Egawa, 2506-Z, Noogawa, Wakayama-si Japanio.

\* 16-j. lernanto dez. kor. kun alilandaj gelernantoj pri diversaj


temoj. Marko Blok, Os. Bataljonow Chtopskijch 1/24, 32-650 Kety, Woj. B'jelsko-B, Pollando.

\* F-ino D. Lind, Brandsnäs Herrgård, S-57300 Tranås, Svedio dez. kor. kun ĉ. landoj. Interŝ. nacipupojn kaj memoraĵojn.

### Renkonte al la 100-jara datreveno Leksikono de Jugoslaviaj Esperantistoj

Konata jugosl. esperantisto Marinko Ĝivoje (p.p. 5025, 41040 Zagreb-Dubrava) finpretigas manuskripton por Leksikono de pli elstaraj jugoslaviaj esperantistoj, kiu devus aperi komence de 1983. En ĝi aperos ne sole verkantoj, tradukantoj, redaktoroj, movadgvidantoj, sed ankaŭ kunfondintoj de unuopaj E-societoj (ekde la jaro 1909), kursgvidantoj, prelegantoj kaj aktivuloj sur aliaj kampoj. Pluraj jugoslavo aktivis kaj aktivas en aliaj landoj; ankaŭ iliaj biografioj aperos en la Leksikono, tiel ke ĝi havos proksimume mil biografiojn kun 400 bildoj. Estas petataj ges-anoj, kiuj de la kompilinto ne ricevis demandaron kun specimeno, kaj meritas esti reprezentitaj en la Leksikono, sendi siajn biografiajn informojn al la supra adreso.

### LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Sanhajo
2. Raoyang-gubernio
3. Xi'an
4. Baoji
5. Dalian
6. Yixing-gubernio
7. Zhengzhou
8. Changbai-montaro
9. Kaili-gubernio
10. Sichuan-provinco
11. Gansu-provinco



# La Ekonomio en la Periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj

de BA HONG

## PROGRESO DE LA FERFANDA TEKNIKO

Dum la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj, dank' al apliko de nova tekniko la ferfanda metio disvolviĝis kaj feraj produktaj instrumentoj estis iom post iom aplikataj en la agrikulturo kaj metio, kio altigis la produktivon.


En 513 a. K. Jin-regno (en la nuna Shanxi-provinco) publikigis kriminalan kodon kaj alforĝis ĝin al tripieda fer-kaldrono. Sendube tio estus nerealigebla sen blova ekipaĵo, kiu tiam estis farita el bovledo. La progreso de la blova ekipaĵo por ferfando akcelis la disvolviĝon de ferfando kaj ferforĝado. La tekniko estis aplikata 1900 jarojn pli frue ol tiu de Eŭropo. En 1976 en Changsha, Hunan-provinco, oni trovis spadon en tombo de

la lasta etapo de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno. Kemia analizo montris, ke ĝi estis farita el ŝtalo entenanta 0.5% da karbono. Metinte ĝian sekcaĵon sub lupeon, oni povas vidi la mezan parton de la spado forĝitan el sep ĝis naŭ tavoloj.

En Ĉinio cirkulas rakonto pri spadoj de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno: Tiutempe paro da geedzoj loĝis apud Hangzhou en Zhejiang-provinco. La edzo Gan Jiang kaj lia edzino Mo Ye ambaŭ estis kompetentaj spadoforĝistoj. La spadoj faritaj de ili estis blue brilaj kaj per tia spado oni povis tranĉi kupran aŭ feran objekton. Informiĝinte pri tio, la Wu-regna reĝo Helü ordonis, ke ili forĝu por li specialan spadon en tri jaroj. Se ili ne plenumos tion en la limigita tempo, ili estos senkapigitaj.


Gan Jiang kaj Mo Ye elektis la monton Mogan en la norda parto de Zhejiang-provinco kiel spado-forĝejon. La geedzoj klopodis preskaŭ tri jarojn, sed ne sukcesis. Antaŭ la fino de la limigita tempo la edzino saltis en la fanditan feron por peti helpon de dio. Retenante sian kordoloron, Gan Jiang sukcesis fari du spadojn inan kaj viran. Gan Jiang decidis enterigi la viran en la monto kaj prezenti la inan al la reĝo. Antaŭ sia foriro li ordonis al sia filo: "Post kiam mi prezentos la spadon al la Wu-regna reĝo, li certe mortigos min. Kiam vi plenkreskos, vi venĝu min per la vira spado." Ricevinte la spadon, la reĝo timis, ke Gan Jiang faros spadojn por aliuloj, kaj tial ordonis mortigi lin. Poste la filo de Gan Jiang venĝis sian patron.

*Fera soko en la periodo de Militantaj Regnoj*



*Speco de mono en la periodo de Militantaj Regnoj*





Nun ĉe la piedo de la monto Mogan troviĝas lageto, kiu portas la nomon "Spada Lageto". Legendo diras, ke ĝi estis la spado-forĝejo de la geedza paro. Apud la lageto estas granda ŝtono, kiu laŭlegende estis ilia amboso.

Kvankam la rakonto estas nur legendo, ĝi tamen montras, ke jam antaŭ pli ol 2 400 jaroj iuj kompetentaj metiistoj de Ĉinio posedis la teknikon de fera fando kaj forĝo.

## AGRIKULTURO KAJ AKVOUTILIGO

Elterigita bronza bovforma vinujo de la malfrua stadio de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno montras, ke tiam bovo portis nazringon, kio signifas, ke ĝi estis bredita kiel laborbruto kaj ĝenerale uzata por plugado. Kaj en la periodo de Militantaj Regnoj oni jam komencis uzi plugilon tiratan de du bovoj. La kvindentaj sarkiloj kaj feraj plugiloj elterigitaj en la ĉefurbo Xiadu (en la nuna Yixian-gubernio, Hebei-provinco) de Yan-regno montras, ke la tiamaj terkulturaj teknikoj estis tre avangardaj.

Tiam ankaŭ la irigacia metodo estis plibonigita, tiel ke en centra Ĉinio oni ĝenerale aplikis akvoĉerpajn levstangojn anstataŭ primitivaj iloj por irigacii kampojn.

En la periodo iuj feŭdulaj regnoj konstruis kanalojn kaj akvo-provizajn instalaĵojn por irigacii kampojn. Inter ili la plej fama estas la granda digo Dujiang (en la nuna Guanxian-gubernio de Sichuan-provinco) konstruita sub la gvido de Li Bing. Tiam la rivero Minjiang torente trapasis tieajn altajn montojn kaj en ĉiu somero kaj aŭtuno ĝia flukvanto multege pliiĝis kaj inundis multajn lokojn de Guanxian-gubernio kaj aliaj. Ĉirkaŭ 250 a. K., sub la gvido de la prefekto Li Bing de Sichuan-provinco, oni breĉis monton ĉe la maldekstra bordo de la rivero por ellasi akvon el ĝi kaj konstruis en pli supra parto de la rivero akvodividan digon kaj akvovalvon por reguligi la akvokvanton, kio dividis la riveron en du fluojn internan kaj eksteran. Tiu irigacia konstruaĵo ne nur forigis la inundan plagon, sed ankaŭ povis irigacii pli ol 200 000 hektarojn da kampoj. Hodiaŭ ĝi ankoraŭ ludas gravan rolon en irigaciado.

Alia fama irigacia konstruaĵo estas Zhengguo-kanalo. Zheng Guo estis fama akvoutiliga fakulo de Han-regno. En 246 a. K. li venis al Qin-regno. Sub lia gvido centmiloj da popolanoj de la regiono Guanzhong (okcidente de la Qin-regna ĉefurbo Xianyang) fosis en dekelkaj jaroj kanalon ĉe Zhongshan (nordokcidente de la nuna Jingyang, Shaanxi-provinco), kiu kondukis la akvon de Jingshui-rivero al Luoshui-rivero (en la okcidenta parto de Henan-provinco) kaj longis je 150 km. La kanalo estis navigebla kaj povis irigacii pli ol 260 000 hektarojn da kampoj. Ĝi transformis la regionon Guanzhong de Qin-regno en fekundan landon. Dank' al la disvolviĝo de agrikulturo, Qin-reg-



*La edzino Mo Ye saltas en la fanditan feron por peti helpon de dio.*

no fariĝis la plej potenca lando en ĉi tiuj periodoj.

Tiutempe la ĉefaj agrokulturaj plantoj estis milio, glueca milio, rizo, tritiko, sojfabo ktp.

La silkraŭpa bredado prosperis en la baseno de la Flava Rivero jam antaŭ la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj kaj iom post iom disvolviĝis al la baseno de Jangzi-rivero dum ĉi tiuj periodoj. La historiaj objektoj elterigitaj en Chu-regnaj tomboj en Changsha, Hunan-provinco, en la pasintaj jaroj montras, ke tiam jam prosperis la silkraŭpa bredado kaj silka teksado en la baseno de Xiangshui-rivero.

Kun la ekonomia disvolviĝo ankaŭ fruktoproduktado fariĝis grava entrepreno. Tiam la regiono Jingzhou (la nuna Hubei-provinco) famiĝis pro produktado de mandarinoj kaj pampel-



musoj, kiuj vendiĝis malproksime en centra Ĉinio. Ankaŭ jujuboj kaj kaŝtanoj produktitaj en Yan-regno (la nunaj provincoj Hebei kaj Liaoning) estis fame konataj.

## APERRO DE URBOJ


Antaŭ la meza stadio de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno, la loĝantaro de la feŭdulaj regnoj estis ne tre multa kaj ilia virga tero estis tre vasta. En la periodo de Militantaj Regnoj, multe pliiĝis la loĝantaro. Dank' al la disvolviĝo de agrikultura kaj metia produktado kaj komerco, disvolviĝis ankaŭ la urboj.

Tiam en la basenoj de la Flava Rivero kaj Jangzi-rivero jam aperis relative grandaj komercaj urboj. Ekz., Linzi, la ĉefurbo de Qi-regno, ĉe Ziherivero, konsistis el du urboj granda kaj malgranda. La granda longis je 4.5 km. kaj larĝis je 4 km., kaj sudokcidente de ĝi la malgranda urbo havis kvin-kilometran perimetron. En la granda urbo estis komercaj kvartaloj, kaj tie loĝis diversnivelaj oficistoj, bienuloj kaj ordinaraj popolanoj. En la malgranda urbo loĝis la reĝo kaj la nobeloj. Historia literaturo priskribis la prosperan Linzi jene: En la urbo Linzi troviĝis 70 000 familioj. La urbanoj estis tre riĉaj. En ĝi okazis diversaj amuzaj aktivadoj, en kiuj partoprenis ludistoj de diversaj muzikiloj. Sur la ĉefstratoj ĉaroj kuris unuj post aliaj kaj ofte okazis kolizioj, kaj ankaŭ la pasantoj estis multaj sur la stratoj.

Tiam estis pluraj urboj tiel grandaj kiel Linzi, ekz., Daliang

(la nuna Kaifeng en Henan-provinco), la ĉefurbo de Wei-regno, Ying (norde de la nuna Jiangling-gubernio, Hubei-provinco), la ĉefurbo de Chu-regno, kaj aliaj. Tiam en la grandaj urboj loĝis generacion post generacio individuaj metiistoj, kiel forĝistoj, ĉarofaristoj, ledistoj, lignajistoj, lakistoj kaj aliaj. Krome, tie troviĝis aŭguristoj kaj vendistoj de hundviando, ĉevaloj, kunikloj, pajlo kaj alkoholaĵoj. En la lasta stadio de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno aperis mulditaj bronzaĵoj, kiuj havis diversajn formojn, kiel tiuj de sonorilo, tranĉilo, konko, kaj

ankaŭ rondan formon kun ronda truo en la mezo. Ili cirkulis en la respektivaj feŭdulaj regnoj. En la lastaj jaroj de la periodo bronzaĵoj jam cirkulis inter la ordinara popolo, kaj greno produktita de kamparanoj jam estis aĉetita per bronzaĵoj. En la periodo de Militantaj Regnoj la bronzaĵoj jam cirkulis vaste, ankaŭ oro komencis esti uzata kiel mono kaj fariĝis valora. Tiam la registaroj, nobeloj kaj altranguloj posedis grandan kvanton da oro. Valoraj varoj, kiel bonaj ĉevaloj, spadoj kaj vulpofelaj vestoj, vendiĝis kontraŭ oro.



*La 2.9 metrojn alta ŝtona statuo de Li Bing farita en 168 p. K. estis lokita ĉe la rivero kiel mezurilo por akvo-nivelo, poste ĝi malaperis en la rivero kaj estis re-trovita en 1974.*

# Luŝeng- festivalo

de PENG ZHENGYANG



*Mjaŭ-aj virinoj*

**L**UŜENGO estas popola muzikilo kun anĉoj inventita de la prapatroj de la mjaŭ-a kaj jaŭ-a nacimalplimulto en sudokcidenta Ĉinio. Eĉ hodiaŭ ĝi restas ŝatata de la nacimalplimulto, kiuj ĉiujare okazigas luŝeng-festivalon laŭ sia nacia tradicio.

En februaro ĉi-jare mi speciale veturis de Pekino al Kaili-gubernio, Guizhou-provinco, por tie pasigi la festivalon, kiu okazas unufoje jare. Februaro estas ĝenerale pluva tempo en la provinco, sed ĉi-jare, kiam mi atingis la gubernion, min trafis densa neĝo. La neĝo obstrukcis la trafikon. Mi maltrankviliĝis timante ke mi estos retenita tie. Sed mia vojqvidisto Wu Peihua diris, ke nenio malhelpos la mjaŭojn partopreni la festivalon. “Ju pli densa la neĝo, des pli abunda la rikolto”, pro tio la mjaŭoj estos certe pli viglaj dum la festivalo.

La 13-an de februaro ĉesis la neĝo kaj la suno denove elrampis el la nubtavolo. Estis ĝuste tagmeze, kiam mi aŭte atingis la lokon laŭ la zigzaga monta ŝoseo. Tie jam svarmis homoj, el kiuj multaj venis el la najbaraj gubernioj malproksimaj je ĉirkaŭ 60 km. La grandaj kaj malgrandaj luŝengoj staris arbare. “U-u-!” sonis la grandaj luŝengoj, skuante la teron. “Zilili — zilili —!” klare sonis la malgrandaj luŝengoj. Tie oni formis 30 cirklojn, en kiuj knabinoj en festaj vestoj dancis per facilaj paŝoj, akompanate de belsonaj muzikaĵoj luditaj de knaboj. Spegulate de la ĉirkaŭa neĝo, la arĝentaj ornamoj sur iliaj kapoj kaj vestoj trembrilis, tintis kun la moviĝo de la knabinoj kaj harmoniis kun la muziko. Je la 5-a posttagmeze la luŝeng-halo jam estis tiel plena de homoj, ke spektan-

toj devis stari ĉirkaŭe sur la montdeklivo.

“Baldaŭ falos la vespera krepusko. Kie tranoktos la vizitantoj?” Kun tiu demando mi turnis min al la vojqvidisto. Li eksplodis de ridego, dirante: “Ĉiu, kiu ĉeestas nian festivalon, estas nia gasto. Se li ne povos hejmeniri, ni regalos lin per manĝaĵoj kaj disponigos al li lokon por tranokti. Tio estas regulo starigita por ni de nia antaŭulo Wu Nielei. Ĉiuj loĝantoj en la ĉirkaŭaj kvin vilaĝoj estas liaj posteuloj.” Sekve de tio li rakontis al mi la historion de la halo. Antaŭ la 14-a jarcento la halo situis en la vilaĝo Huangjin. La mjaŭnacieco de antikve lerte kantas kaj dancas. La gejunuloj serĉis por si la amaton dum dancado. Krome, la bravaj mjaŭoj ofte kolektiĝis por ribeli kontraŭ la feŭdaj subpremantoj. Antaŭ

ĉirkaŭ 550 jaroj, en Ming-dinastio, pro timo de popola leviĝo la feŭda monarko sendis forrabi kaj detruigi la luŝengojn kaj malpermesis kolektiĝi, minacante per severa puno. Ekde tiam dum kvin generacioj inter la mjaŭoj ne aŭdeblis la muziko de la luŝengoj kaj la gejunuloj perdis ŝancon interkonatiĝi kaj amuziĝi. Tio daŭris ĝis la tempo de Wu Nielei. Wu havis kvar ĉarmajn kaj saĝajn filinojn kaj unu belan kaj bravan filon. Kiam liaj gefiloj plenkreskis, Wu iniciatis restarigi la luŝenghalon, por ke ili havu la deziratajn amatojn. Tio tuj ricevis aprobon de la mjaŭoj de ĉiuj gubernioj, ili unu post alia rapidis al la loĝloko de Wu la 15-an de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Ili ludis luŝengojn kaj dancadis, serĉante


amaton. Realigis ankaŭ la espero de la gefiloj de Wu, kiu buĉis 99 porkojn kaj kuiris 99 potojn da glueca rizo por regali la vizitantojn. Li starigis la regulon, ke la posteuloj daŭrigu la aktivadon generacion post generacio. Por tio li starigis ŝtonan monumenton, sur kiun oni gravuris noton pri la okazaĵo.

Luŝeng-halo estas loko, kie la knabinoj konkuras unuj kun aliaj pri sia beleco, arto kaj riĉo por akiri favoron de la knaboj. Ili ĉiuj portas vestojn mem broditajn: senkoluman kaj duonmanikan ĉemizeton, ornamajn manumojn kun ĉarmaj broditaj desegnaĵoj, plisitan jupon kaj kruringojn el nigra tolo. Oni diris al mi, ke por ili estas honto porti aĉetitajn vestojn, kio ja atestus la malkapablecon de la

portanto malgraŭ ŝia ĉarmo. Ili portas arĝentajn ornamaĵojn, kiaj arĝentaj kolieroj, braceletoj, feniksa aŭ kornforma har-pingloj kiuj simbolas riĉecon. Ili portas diversajn arĝentajn ornamaĵojn sur la brusto kaj dorso, similajn al kiraso de antikvaj militistoj, aŭ pli ol cent arĝentajn tintilojn. La knabinoj dancas, honteme malle-vante la kapon kaj okulojn, sed intertempe kaŝrigardas la ĉirkaŭajn knabojn, kiuj senskrupule rigardas la knabinojn per larĝe malfermitaj okuloj. La knaboj arope staras, flustras kaj faras siajn rimarkigojn pri la knabinoj. Dume la apudaj patrinoj kaj bofratinoj alude kuraĝigas la knabinojn rekte renkonti la provokantajn rigardojn de la knaboj kaj kuraĝe elekti siajn amatojn. Ankaŭ knabinetoj, kiuj



*Goja Luŝeng-festivalo*





ankoraŭ ne komprenas la okazaĵojn, dancas naive malantaŭ siaj fratinoj per mallertaj danc-movoj, kio ofte vekas ridon ĉe la rigardantoj . . . Oni senlace ludas muzikajn instrumentojn kaj dancas ĝis duono post la sepa, kiam falas la nokto. Nur tiam ili malvolonte disiĝis.

Iom ripozinte en la loĝejo, mi, invitite de la voĵgvidisto, iris gastigi ĉe la avo de lia kuzo. En la ĉefa salono de la maljunulo estis pli ol 40 homoj, kiuj ĉiuj salutis min en sia nacia lingvo. Mi ne povis kaŝi mian miron kaj demandis, kiom da membroj estas en la familio. La gvidisto respondis, ke lia familio konsistas el nur ok homoj, kaj la ceteraj estas gastoj venintaj de aliaj lokoj por ĉeesti la festivalon, inter kiuj estas kaj konatoj kaj nekonatoj. Salutinte unu alian, ni sidiĝis ĉe tri tabloj, kiuj troviĝis po unu en ĉiu ĉambro. La pladoj, kvankam ne multaj, estis abundaj. Meze de la tablo staris samovaro. Antaŭ ĉiu manĝanto estis metita bovlo da kuirita fumajita porkaĵo. Tie ili ĉiuj drinkis per bovlo. La atmosfero estis varma. La pli aĝaj viroj kaj gastinoj kantis apude. Oni diris al mi, ke la kantado estis enhavoriĉa, ekz. pri admiro, respekto kaj demandoj pri historiaj okazintaĵoj. Kiam mi adiaŭis la gastiganton kaj forlasis la vilaĝon, jam batis la 11-a, belsona muziko kaj ĝojaj ridoj sendiĝis al miaj oreloj de tempo al tempo.

Antaŭtagmeze de la sekva tago mi vizitis la maljunan luŝeng-faranton Wu Bingxiang, kies patro kaj avo okupiĝis profesie ankaŭ pri tiu metio. Survoje mi renkontis la gejunulojn renkontiĝintajn en la festivalo.




*Mjaŭ-a infano kun kapornamo*

Ili arope staris ambaŭflanke de la ŝoseo kaj kante demandis la nomon, familion, produktajn, mastrumajn, astronomiajn kaj geografiajn sciojn kaj tiel plu. Se gejunuloj kontentigas unu la alian pri la saĝo kaj scio, ili kune forlasas la bruon amason kaj sin direktas al kvieta loko por elverŝi sian koron unu al la alia.

Preterlasinte la feliĉajn gejunulojn, ni surgrimpis la krutan montodeklivon kaj atingis la hejmon de la maljuna metiisto. Lia bambua domo estas tre alta. En la ĉefa salono staris dekkelkaj luŝengoj. Inter ili la plej granda estis kvin metrojn alta kaj eĉ tuŝis la plafonon. Eble

ĝi estas la plej alta muzika instrumento sub la ĉielo. Ĝi sonas forte kaj laŭte kaj tre similas al la kontrabaso el la okcidentaj muzikiloj. Sed pro la alteco kaj pezo ĝi povas esti ludata nur staranta surtere. La luŝengo malpli ol du metrojn alta aspektas pli gracia kaj sonas oreplaĉe. La metiisto diris al mi, ke por fari luŝengon la ŝlosilo estas la anĉo. Li per antikva metodo faras diversspecajn kuprajn anĉojn kaj ekzamenas ilian tembron. Post tio li faras bambuajn tubojn longajn kaj mallongajn por adapti al ili la anĉon. La de li faritaj luŝengoj estas venditaj en ĉiuj mjaŭaj vilaĝoj en la sudorienta provinco Guizhou.



**D**E Parizo al Bruselo oni flu-  
gas 45 minutojn. Rigardate  
de la ĉielo, Belgio aspektas kiel  
giganta verda tapiŝo, por kies de-  
segnaĵoj servas la densaj fervo-  
joj, ŝoseoj kaj gotikaj konstru-  
aĵoj.

Belgio situas en la okcidenta  
parto de Eŭropo. Ĝi kovras are-  
on de 30 513 kvadrataj kilome-  
troj kaj havas 9.84 milionojn da  
loĝantoj (laŭ statistiko de 1978):  
55% de la loĝantaro estas fland-  
droj, kiuj parolas la germanan  
lingvon, 44% estas valonoj, kiuj  
parolas la francan, kaj la ceteraj  
estas germanlingvanoj. Belgio  
havas mildan oceanan klimaton  
kaj tial ne konas severan vin-  
tron kaj bakantan someron. En  
somero la tagmeza temperaturo  
estas inter 25° kaj 30°C.

Belgio havas tre potencon  
trafikon. Ĝi estas unu el la  
landoj kun plej densa fervoja  
reto. Ĝia ĉefurbo Bruselo estas  
tre grava internacia navigacia  
stacio de Eŭropo. Cetere Belgio  
havas ŝoseojn kun totala longe-

WANG ZONGXIN:

## Belgio, gastiganto de la 67-a UK

co de pli ol 12 000 kilometroj.  
Nokte, enveturante Belgion, oni  
tuj sentas klarecon por la okuloj,  
ĉar tie la ŝoseoj estas lumigataj  
per tre intensaj lampoj.

### “ĈEFURBO DE EŬROPO”

La belgoj estas tre fieraj pri  
sia Bruselo. Tie funkcias pli ol  
700 internaciaj institucioj kaj  
oficejoj kaj okazas sinsekvo da  
internaciaj kunvenoj. En Bru-  
selo ankaŭ laboras la stabo de  
la Eŭropa Ekonomia Komunumo  
kaj la stabo de la Organizaĵo  
de Nord-Atlantika Traktato, pro  
kio pluraj eŭropaj landoj devas  
sendi al Bruselo tri ambasado-  
rojn. Jen kial Bruselo estas no-  
mata ankaŭ “Ĉefurbo de Eŭro-  
po”.

Bruselo estas impona kaj bela.  
Ĝiaj konstruaĵoj en variaj arki-  
tekturaj stiloj vidigas ĝian evo-  
luadon dum la pasintaj pli ol  
mil jaroj. La urbo havas 1.04  
milionojn da loĝantoj kaj kovras  
162 kvadratajn kilometrojn. Tie  
troviĝas modernaj ĉielskrapantoj,  
superbazaroj kaj mezepokaj kas-  
teloj kaj katedraloj. Ore brilantaj  
antikvaj palacoj estas najbaraj al  
komfortaj modernaj domoj.  
Majstre aranĝitaj promenejoj  
videblas ĉie en la urbo. La na-  
tur-rezervejo ĉirkaŭ Bruselo  
estas same granda kiel la urbo-  
parto. Tie la tuta loko estas ko-  
vrita de densaj verdajoj kaj la  
aero tre freŝa.

En Bruselo staras multaj fa-  
maj antikvaj konstruaĵoj. La  
Granda Placo en la urbocentro  
estas ĉirkaŭita de multaj impo-  
naj antikvaj konstruaĵoj el la  
15-a kaj la 16-a jarcentoj. Tie  
estas la loĝejo de la fama franca  
verkisto Victor Hugo (1802-  
1855). Nemaŭ proksime de la  
placo estas tre interesa bronza  
statuo de pisanta knabo tute  
nuda. Oni nomas lin William.  
Oni diras, ke en milito antaŭ tre  
multaj jaroj, malamiko volis  
forbruligi Bruselon. La saĝa  
knabo savis la urbon koste de  
sia vivo. Por memorigi pri la pa-  
triotista knabo, oni titolis lin la  
Unua Civitano de Bruselo kaj  
starigis la bronzan statuon. Dek  
kilometrojn sudoriente de Bru-  
selo estas Vaterlo, kie en 1815  
definitive malvenkis Napoleono.  
Tie sur monteto gardas bronza  
leono pezanta ok tunojn, farita  
el trofeoj. Al la iama batalkam-  
po seninterrompe venas turistoj.

### ANTVERPENO, PERLO SUR TRONO

45 kilometrojn norde de Bru-  
selo estas Antverpeno, la dua  
plej granda industria centro de  
Belgio kaj ankaŭ unu el la plej  
grandaj havenoj de la mondo. La  
67-a UK okazos en tiu urbo.

Antverpeno rajdas sur la mal-  
supra parto de la rivero Skeldo.  
La urbo situas en la centro de  
okcidenta Eŭropo kaj 250 kilo-

metrojn for de ĝi estas Bonno, Luksemburgo kaj Amsterdamo, 300 kilometrojn for estas Parizo kaj Londono, kaj 500 kilometrojn for estas Berno. Antverpeno havas naturajn kondiĉojn por transporti varojn de okcident-eŭropaj landoj.

Antverpeno konstruiĝis en la 13-a jarcento kaj en 1460 ĝi fariĝis la unua komerca urbo de Eŭropo kaj la komerca kaj trafika centro de norda Eŭropo. En la 16-a jarcento ĝi estis la plej vigla eŭropa urbo de komerco kaj arto. Nun ĝi posedas multajn modernajn industriojn de petrolo, kemio, metalurgio, aŭto, fero, maŝino, ŝipo, medikamento k.a. En Antverpeno estas la Reĝa Belarta Muzeo kaj mezepoka katedralo, kie oni povas aprezi la kulturon kaj arton de la longa historio de Belgio.

Antverpeno estas unu el la tri plej grandaj havenoj de Eŭropo. En 1967, oni konstruis tie la plej grandan dokon de la mondo. Rigardante malsupren de la ĉielskrapanto plej frue konstruita en Eŭropo la bonorde vicigitajn kajojn kaj havenan kanalon larĝan je 300-500 metroj, oni senescepte admiras la diligentajn kaj saĝajn antverpenanojn, kiuj konstruis tiel grandan havenon.

La antverpenanoj nomas sian urbon Granda Municipo de Belgio. Estante la tria plej granda haveno de Eŭropo, Antverpeno plenumas en- kaj elportadon de du trionoj de la varoj de Belgio kaj parto da varoj de okcident-eŭropaj kontinentaj landoj. La antverpenanoj fiere nomas ĝin Perlo sur Krono.

## LA ĈINA PALACO

En Eŭropo estas malfacile trovi konstruaĵon tute en ĉina

## ABONTARIFO DE "E.P.Ĉ."

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	5.70	9.60	13.30
Aŭstrio	Sch	80.00	130.00	190.00
Belgio	BF	180.00	300.00	420.00
FR Germanio	DM	10.80	18.00	25.20
Britio	£	3.00	5.00	7.00
Finnlando	FMK	24.00	40.00	56.00
Francio	FF	26.00	44.00	62.00
Hispanio	Pts	600	1010	1400
Italio	Lit	5200	8800	12400
Japanio	Yen	1400	2800	4000
Jugoslavio	Din.	180	300	420
Nederlando	Gld.	12.60	21.00	29.40
Nov-Zelando	NZ\$	6.70	11.20	15.60
Portugalio	Esc	400	685	920
Svisio	SF	10.00	17.60	24.50
Usono	US\$	6.00	10.00	14.00
Kanado	Can\$	7.20	12.00	16.80

\* \* \*

Por aliaj landoj en Eŭropo:

£	3.00	5.00	7.00
US\$	6.00	10.00	14.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

£	2.20	3.60	5.00
US\$	4.30	7.20	10.00

**Ekde julio 1982 validas la tarifo.**

stilo. Sed norde de Bruselo sin trovas ĉina palaco ombrata de verdaĵoj. La palaco en la antikva gusto staras vidalvide al la moderna arĝenta konstruaĵo de la Belga Atom-muzeo kaj ili kune formas belegan vidaĵon.

La verde glazuritaj tegoloj, la fajnaj malmollignaj skulptaĵoj kaj aliaj konstrumaterialoj por la palaco estis importitaj el Ĉinio. La juvelaĵoj, jadaĵoj kaj skribilaroj (en Ĉinio oni kutime kunigas paperon, tuĉpenikon, inkon kaj inkfrotujon en grupon), porcelanaĵoj el Qing-dinastio kaj palaca lito kun ornamaĵo en for-

mo de drako . . . ĉiuj tiuj objektoj en la palaco faris impreson de la Imperiestra Palaco en Pekino. La palaco estas aparte kara por la ĉinoj en Belgio. Ĝi estis konstruita laŭ propono de la tria reĝo de Belgio, Alberto, kiu tre alte taksis la ĉinajn kulturon kaj arton. Kiel parto de la Belga Reĝa Historia kaj Arta Muzeo, la Ĉina Palaco estas bone prizorgata kaj servas kiel simbolo de la amikeco inter Ĉinio kaj Belgio.

Estas alia grava okazaĵo en la historio de la interrilatoj de Ĉinio kaj Belgio. En la Scienca





La ĉefa punkto kiu incitas min skribi al vi estas artikolo de Zhang Qicheng: *Lingvo kaj Nacia Sento* (n-ro 1/1982). En ĝi estas aludita la ebleco alpreni la anglan kiel internacian. Mi povas diri al vi, ke tio estas tute ne ebla kaj la kialoj ne estas montritaj en tiu artikolo. Qicheng diras nur, ke tio estus humiligo k. diskriminacio por la popoloj kies lingvoj ne estas la anglaj.

Laŭ mi la ĉefa kialo estas ke ĝi estas tre malfacila lingvo: ekzemple tiel nomataj "neregulaj verboj" *take, took, taken*, ktp. Kaj antaŭ ĉio la prononcado ne nur estas tre malfacila por neangloj sed diferencas de unu regiono al la alia ĝis la fakto ke angloj ofte ne komprenas unu alian; ke la USONANOJ turnas siajn frazojn tiel, ke neangloj lernintaj la anglan povas apenaŭ kompreni usonanojn.

Kiel oni devus agi por sukcesigi Esperanton? La unua afero estu, ke la instruistoj aŭ estontaj instruistoj sciu kio estas Esperanto; aŭ pli ĝuste kiaj streboj estis faritaj ĝis nun por doni komunan lingvon al la homaro. Mi ne scias kiel okazas en Ĉinio, sed mi supozas ke la situacio estas preskaŭ la sama kiel aliloke. En Belgio, franclingvano povas fariĝi doktoro pri lingvaj sciencoj kaj profesoro de universitato sen esti aŭdinta la vorton Esperanto.

En via artikolo vi diras, ke Esperanto bezonas esti plibonigata

(rafinado estas la esprimo de la aŭtoro).

Sed ne forgesu:

(1) Zamenhof pripensis sian lingvon dum 15 jaroj de 1872 ĝis 1887 minimume.

(2) Li prezentis sian projekton kiel projekton kaj ne kiel lingvon; dum pluraj jaroj li pridiskutis eblajn ŝanĝojn, sed li neniel sukcesis unuigi sian anaron pri larĝe konsentitaj ŝanĝoj.

(3) Relegu la korespondadojn de Zamenhof kun sia anaro ĝis la fino de la lasta jarcento: kiom da fojoj oni proponis al li ŝanĝojn kaj li respondis ke "ankaŭ li" antaŭe pripensis tiun formon sed ĝi ne estis elektita pro tia aŭ alia malhelpo.

Alia avantaĝo de disvastiĝo de Esperanto estas la ebleco forigi la analfabeton. Ĝis nun la ekskoloniigitaj popoloj devas tamen rilati por multaj sciencaj aferoj kun la lingvoj de siaj antaŭaj subpremantoj (kaj tio permesas daŭrigi la subpremadon). Kaj pro tio ke la lingvo de la subpremanto estas tre malfacila, nur malgranda aro da afrikanoj sukcesis havi teknikajn konojn tre bezonatajn. La stato multe pliboniĝus, se ili nur devus lerni facilan lingvon kiel Esperanto.

Kion devus fari granda popolo kiel la via por helpi tiujn landojn? Laŭ mi ne estas necese diskuti pri "plibonigoj" de Esperanto (homa verko do neperfekta), sed oni devas multe helpi tiujn popolojn instrui Esperanton en sia lando kaj publikigi multajn sciencajn librojn en tiu lingvo.

MARKO FORĜO (Belgio)

EPĈ ĉiam alvenas akurate. Vidante ĝin en mia leterkesto, mi ekĝojas. La teksto kaj bildoj estas same ĝuindaj. Kun granda intereso mi legis la raporton "La Ĉina Komununa Lingvo kaj Esperanto".

La nova vojo estas certe pli fruktodona, ankaŭ por ni. Kun miro mi konstatas la multnombrian partoprenon de Esp-kursoj en via lando. Vere gratulinda por Esperanto. Viaj Esp-novaĵoj bone informas la legantojn pri la agadoj. Per la legado de EPĈ mi sentas min via amiko.

KLARA JUSTIS  
(FR Germanio)

Min interesas ĉefe la speciale ĉinaj respondoj al hodiaŭaj mondproblemoj, ekz. naskolimigo, protektado de la medio, senlaboreco, problemoj de la grandaj urboj, tendenco de krimoj ktp. Rilate tion mi interesiĝas ĉefe pri informoj el propra ĉina fonto, kiu povas korekti aŭ aliigi la nuntempe relative multajn informojn el plej diversaj okcidentaj gazetoj, do mi esperas trovi en EPĈ informojn alimaniere netroveblajn por normala mezeŭropano pri la "ĉina vojo". Pro tio: **Ne iĝu tro senpolitike**. Ne tro pri Esp-informoj. Kaj ankaŭ ne tro pri sporto (flugpilka ĉampioneco — cetere koran gratulon al la ĉinaj sportistinoj), pri "Deziras Korespondi", ne tro pri "Nia Kultivejo". Sed anstataŭe pli pri minoritatoj, historio, arto ktp de Ĉinio. Malpli da Esp-movado kaj ekz. tiuj "Fotografioj pri Naturaj Belaĵoj Faritaj de E-istoj", kiuj havas neniun rilaton al Ĉinio kaj ofte laŭ mi eĉ ne estas bonaj.

kaj Teknika Muzeo de la Ŝtata Universitato de Gento staras bronza belga viro en ĉinaj vestaĵoj. Lia belga nomo estas Ferdinand Verbiest. Post kiam li venis

al Ĉinio, li nomis sin Nan Huairan. Kiel astronomo li gvidis la meteologiajn aferojn por Qingdinastio, kompilis por la kortego «Porĉiama Kalendaro de Kang-

xi» kaj projektis la observatorion, kiu ankoraŭ staras en Pekino kaj estas difinita de la ŝtato kiel unu el la ĉefe protektataj antikvaj konstruaĵoj.

Kaj kial ne foje scienca artikolo pri difinita temo kun literatur-indikoj kaj esenca bibliografio (kompreneble ankaŭ nacilingva)?

**BERNHARD PABST**  
(FR Germanio)

La "KOREKTO" sur p. 45 de n-ro 3 de EL POPOLA ĈINIO aparte interesas min. Mi ne rimarkis ĝis nun, ĉu vi regule enpresas la rubrikon "Korekto". Foliumente kelkajn numerojn, mi almenaŭ trovas tian rubrikon sur p. 46 de la n-ro 7/1981. Tamen, temas ĉefe pri korektoj, kiuj ne rilatas al gramatiko.

Mi vigle aprobas vin, kaj ankoraŭ pli aprobas, se vi konstante luktos kontraŭ lingvaj aŭ gramatikaj eraroj per aperigo de "KOREKTO".

Mi nepre konsilos al alia bone konata revuo kiel MONATO imiti vin. Se ĉiuj gazetoj agas regule kiel vi faris ĉi-foje, mi opinias, altiĝus la nivelo de la lingvo.

Alia problemoj: la propraj nomoj (landoj, riveroj, ktp). Ekzemple: Mi trovis en diversaj libroj la lokonomon Hohhot/Huhehaote/Houhehot. En la lasta EPĈ, vi mem uzis la vorton kaj aldonis la prononcon en Esperanto (bedaŭrinde, mi ne povas trovi kie). Kiel mi devas prononci HUUJUCZ? Mistero. Mi sugestus jenon: aperigu liston da literoj en la ĉina lingvo kaj la respondaj sonoj en Esp. Tio povus okazi ĉiujare en la unua numero. Ekzemple: sh=ŝ, x=s (shanxi=ŝansi); faru liston de 100, 200. . . propraj nomoj, kiujn vi sendus unu fojon por ĉiam al la abonantoj de EPĈ, Ekz. Shanxi (=Ŝansi); provu indiki la sonojn de la literoj. Ekz: sh=ŝ, x=s, kaj fine por ĉiu nova vorto indiku ĝian prononcon aŭ apud ĝi, aŭ piednote de la paĝo. Ekz: sur p. 27 filharmonio Zhongsheng (=?). Kompreneble restos certa nombro da nomoj por kiuj tio ne utilos. Sed almenaŭ ne plu estos kaprompige legi EPĈ!

**LENTAIGNE** (Francio)

Fine de decembro 1980 forpasis franca esperantistino f-ino M. Bonafous en la aĝo de 79 jaroj.

Ŝi estis emerita profesorino pri la greka kaj latina lingvoj. Kiam ŝi emeritiĝis, ŝi enskribiĝis en la Universitato de Aix-en-Provence por studi la ĉinan lingvon. Poste ŝi deziris praktiki tiun lingvon, kaj ŝi forvojaĝis al Ĉinio. Tie ŝi restadis dum du jaroj kaj laboris kiel fakulino de la franca lingvo sinsekve en la redakcioj de la revuoj "Ĉina Literaturo" kaj "Ĉinio en Konstruado". Krome ŝi verkis poemaron kaj en Ĉinio ŝi, kompreneble, amikiĝis kun multaj esperantistaj ĉinoj, inter kiuj estas s-ro I. Ko.

Kiam ŝi mortis, mi estis petita informi s-ron Ko, kiu lastfoje vidis f-inon Bonafous okaze de la 64-a Universala Kongreso en Luzerno, Svislando en 1979.

Unu monaton poste, mi sendis al tiu samideano la funebran honorparoladon kiu estis prononcita kiam f-ino Marie Bonafous estis enterigita. Mi ankaŭ sciigis al li, ke mi intencis viziti la Universalan Kongreson en Brazilo. Mi ricevis tre kortuŝan leteron memore al nia mortinta samideano. Interalie li informis min, ke li ne povas partopreni al la U.K. en Brazilo, sed lia kolegino s-ino Tan kontaktos min dum la kongreso.

Do, la 27-an de julio 1981 mi konatiĝis kun ŝi, kaj ni interŝanĝis unue varmajn vortojn kaj due modestajn donacetojn, kiuj tamen sigelis nian amikan renkonton.

Kompreneble estis por mi okazo por paroli kun la membroj de la ĉina grupo kaj precipe kun s-ro Ĉen Juan, kiu prelegis tre klare pri la temo "La Kontakto kaj Interfluo de Homaj Lingvoj". Mi promesis al li sendi artikolon por EPĈ. Mi nun plenumas tiun promeson, dank' al la amikaj rilatoj kiuj ekzistas inter Ko kaj mi.

Antaŭ 36 jaroj mi lernis Esperanton, kaj mi ofte spertis, ke tiu mirin-

da komprenigilo estas la sola rimedo por krei veran interamikiĝon en la tuta mondo.

**GUSTAV BLARY** (Francio)

---

## KORAN DANKON

*De tago al tago ni ricevas de niaj diverslandaj legantoj multajn leterojn plenajn de amikaj sentoj kaj entuziasmaj vortoj. Unu el tiuj skribintoj estas s-ro A. Benders de FR Germanio, kiu estas ankaŭ unu el niaj malnovaj abonantoj. Antaŭ dek jaroj li ekkomencis skribi al ni. En siaj leteroj li aŭ donis siajn opiniojn pri la enhavo de El Popola Ĉinio aŭ kunsendis siajn poeziajn verkojn kaj tradukojn. Tiel lia koresponda rilato kun nia redakcio longe daŭras. Precipe dum la pasinta jaro li ne nur tralegis sed ankaŭ poluris la tradukitajn poemojn aperigitajn en nia libro "El Ĉina Poezio". Fojon post fojo li skribis elmetante proponojn pri la ĉirita polurado kaj sendis la poluritajn tradukojn. Kvankam bedaŭrinde ne estas eble aperigi ĉiujn kontribuojn senditajn de li aŭ aliaj kunlaborantoj, ni ĉiam alte taksas lian persistan klopodon kaj profitodonan kunlaboron. Vere tio estas kuraĝigo por la plibonigo de la kvalito de niaj Esp. eldonaĵoj.*

*Nian sinceran dankon meritas s-ro Benders kaj ankaŭ niaj aliaj legantoj kaj amikoj, kiuj sindoneme kunlaboras kun ni en simila maniero.*

**La redakcio de EPĈ**



## LEGINDA LIBRO

# NOVELOJ DE LUSIN

### Plena Kolekto

**LUSIN** (1881—1936) estas la plej fama verkisto de Ĉinio kaj ankaŭ fondinto de la moderna ĉina literaturo. Liaj ĉefaj noveloj estis verkitaj dum la jaroj 1918—1925. Ili klare spegulas la ŝanĝiĝojn de la tiama ĉina socio, forte kritikante la malluman realon kaj esprimante grandan simpatian al la suferantaj popoloj.

La nuna Esperanta eldono enhavas ĉiujn 33 novelojn de la aŭtoro. La antaŭparolo al lia unua novelkolekto *Krioj*, en kiu li klarigis kial li prenis literaturon kiel sian batalilon, helpas al la legantoj kompreni liajn novelojn. Al tiu ĉi volumo estas aldonitaj “Kronologiaj Notoj pri Lusin” kaj 20 tutpaĝaj bonkvalitaj ilustraĵoj.

**Numero:** 10-Es-1290S


**Formato:** 13 × 21cm. 496 pĝ.  
bind.

**Prezo:** £2.80 US\$4.80


**Mendu ĉe:**

Libroservo de UEA  
Peranto de EPC


aŭ Esperanta Sekcio de  
Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI  
SHUDIAN), P. O.  
Kesto 313, Beijing,  
Ĉinio







Kajto en formo de skolopendo kun drakkapo





Kajto en formo de fenikso

# KAJTOJ

Fotoj de LIU CHUNGEN

Printempo estas bona sezono por flugigi kajton. Kajtoflugigado estas ludo ŝatata precipe de infanoj kaj havas historion de pli ol 2 000 jaroj en Ĉinio. Oni faras multspecajn kajtojn, kiel tiuj en formoj de homfiguro, floro, birdo kaj insekto. La plej granda kajto havas longecon de 90 metroj. Troviĝas nemalmultaj delikataj kajtoj kun belaj desegnoj.



Kiel belege!



La fervoja ponto kaj la ŝosea ponto super la Flava Rivero

VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (4)


# Zhengzhou

Fotoj de ZHOU QINJUN



Parto de la Fervoja Stacio de Zhengzhou



Avenuo










Parto de la urbo

Granda pump-stacio apud la Flava Rivero





81518

